

IE IL P O P O L A C I N I O

中國報通

8 1988







VIVO DE ORDINARAJ ĈINOJ

Anĝeloj en verdaj vestoj

Fotoj de LIŬ SIGONG



Leterportistoj



En strateto

En Ĉinio oni nomas leterportistojn “flugantaj birdoj” kaj “anĝeloj en verdaj vestoj” pro tio, ke ili komunikas informojn, donante oportunon al la vivo kaj laboro de la popolo.

La poŝtoficejo Ŝjiŭaj Daĝje estas malgranda en Pekino. La 27 junaj leterportistoj servas al 42 000 familioj kaj 98 entreprenoj. Ili veturas po 25 kilometrojn kaj transportas po 1 771 ekzemplerojn da gazetoj kaj ĵurnaloj kaj po 367 poŝtaĵojn ĉiutage, kun totala pezo de 30.7 kilogramoj. Post laboro ili bredas leterkolombojn kaj kolektas poŝtmarkojn, kio montras ilian amon al la profesio.

“Mi volas fariĝi leterportisto kiel paĉjo!”





Filatelistino



Bredado de leterkolomboj



En ferio

ENHAVO

SUR LA KOVRILO:

Laboristino en Daĉing

Foto de **SJU ŬENFU**

VIVO DE ORDINARAJ ĈINOJ:

Anĝeloj en verdaj vestoj

Fotoj de **LIŬ SIGONG**

La Budhosunuma Festo

Fotoj de **CAJ HAJFENG**

SUR LA DORSKOVRILO:

[FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]

Pejzaĝoj de Rana-intermonto en
Rumanio de **Nagy Akos** (Rumanio)

- 6 En la petrola urbo Daĉing
- 2 La ĉina poŝto kaj telekomunikado
- 14 Elektronika strato de Ĝonggŭancun
- 54 VOJAĜO LAŬ JANGZI-RIVERO (20): Dongting-lago
- 16 Honfan kaj EĈV
- 19 D-ro Josef Kondor kaj lia helpagado por lepruloj
- 21 ESP-NOVAĴOJ
- 23 POR KOMENCANTOJ: Tri fabloj
- 24 Universitato en ĝusta tempo
- 28 Ĉinaj kuracistoj sur la tegmento de Afriko
- 30 POR VIA SANO: Korpo-sanigaj metodoj (II)
- 38 Promesplena naĝsporto de Ĉinio
- 40 Seka herbo (Novelo)
- 44 ĈINA LITERATURO:
 - Poetoj de la malfrua periodo de Tang-dinastio
 - Elektitaj poemoj de la malfrua periodo de Tang-dinastio
- 48 Muzika insuleto Gulang
- 31 ĈINAJ ARTOJ: Lakpentraĵoj de Ĉinio
- 52 Naskiĝo de la ĉina civilizacio
- 61 Hu Ŝjaŭping — estonta vestoprojektistino
- 64 Originala nupto
- 37 ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Jongle Dadjan — enciklopedio de antikva Ĉinio
- 51 ĈINAJ MOROJ: Donacado de faruna ŝafo
- 50 Humuraj anekdotoj (I)
- 66 KURANTAJ AFEROJ
- 5 18 20 KORESPONDI DEZIRAS
- 65 Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

JARABONTARIFO		Britio	£	8.00	Japanio	Yen	3000	Svisio	SF	25.00	
Aŭstralio	\$A	15.00	Finnlando	Fmk	64.00	Jugoslavio	Din.	1500	Usono	US\$	12.00
Aŭstrio	Sch	200	Francio	FF	90.00	Nederlando	Gld.	34.00	Kanado	Can\$	14.00
Belgio	BF	550	Hispanio	Ptas	1200	Nov-Zelando	NZ\$	20.00			
FR Germanio	DM	30.00	Italio	Lit	18000	Portugalio	Esc	1100			

Por aliaj landoj en Eŭropo: £ 8.00 US\$ 10.00 Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko: £ 5.00 US\$ 6.50

La ĉina poŝto kaj telekomunikado

En Pekino estas malfacilaj ne nur loĝo kaj trafiko, sed ankaŭ telefonado. Eĉ la ĉina ministro de poŝto kaj telekomunikado ofte renkontas malfacilojn dum telefonado. Laŭ statistiko, nur 43.32% de la unuafojaj konektoj sukcesis. Por fari ion en multaj okazoj persona veturo pli efikas ol telefonado. Kaj la longdistanca telefonado estas eĉ pli malfacila. Foje en Ĉongĉing mi uzis pli ol du tagojn por telefoni al nia redakcio en Pekino, tamen 29 horoj jam sufiĉas por veturi trajne al Pekino.

Fakte nun estas streĉaj ne nur telefonado, sed ankaŭ la tuta telekomunikado.


Antaŭ la 50-aj jaroj limake disvolviĝis la ĉina telekomunikado. Tiam la telekomunika reto estis kripla, la ekipaĵoj malnovaj, postĝintaj kaj koncentritaj en malmultaj urboj apudmaraj kaj

landinternaj. Estis preskaŭ neniu telekomunika ekipaĵo en la vasta kamparo kaj foraj limregionoj.

De la 50-aj jaroj ĝis la lasta periodo de la 70-aj jaroj multe ŝanĝiĝis la fizionomio de la ĉina telekomunikado. Oni konstruis telekomunan reton ligantan multajn vilaĝojn kaj urbojn, kun Pekino kiel la centro. Tamen la afero malrapide progresis, ĉar Ĉinio longtempe estis en fermiteco kaj duonfermiteco, ĝia var-ekonomio ne bone disvolviĝis, ĝia poŝto kaj telekomunikado servis ĉefe al la partiaj, registaraj kaj armeaj institucioj kaj Ĉinio investis malmulte por la poŝta kaj telekomunika konstruado. En la 35 jaroj de 1949 ĝis 1984 la totala produktovalorde de ĝia industrio kreskis 56-oble, dum la kapacito de la telefonaj centraloj nur 7.4-oble, malsame ol en multaj landoj.

Ŝtata gvidanto Li Peng telefonas al Lhasa per la enlanda reto de satelita telekomunikado.





Servo de enlanda longdistanca telefonado

kies telekomunikado progresis pli rapide ol la industrio. En 1949 Ĉinio havis nur 600 milionojn da poŝtaĵoj, sed en 1984 23.7 miliardojn da poŝtaĵoj, t.e. 38-oble pli multe. La totala transporta kvanto de poŝtaĵoj por la ĉinaj trunkaj linioj superis la totalan transportan kapablon je 25%.

La reformado de la ekonomia sistemo kaj praktiko de la pordo-malferma politiko komencitaj en 1978 grave influis la ĉinan poŝtan kaj telekomunan aferon kun malforta bazo kaj kapablo. Tiam multe kreskis la interregiona interŝanĝo, internacia kontakto, cirkulado de varoj kaj komunikado de informoj, amasiĝis poŝtaĵoj, ne instaligis, ne konektiĝis, nek bone funkciis telefonoj. En kelkaj lokoj neglata telekomunikado ĝenis la investadon far eksterlandanoj. Malforta kaj malbonkvalita telekomunikado, malnovaj ekipaĵoj kaj postiginta tekniko fariĝis unu el la gravaj faktoroj malhelpantaj la ekonomian disvolviĝon kaj socian progreson de Ĉinio, praktikanta reformadon kaj pordo-malferman politikon.

Tio vekis grandan atenton de ĉiuj soci-tavoloj. Por ŝanĝi tian situacion, la ŝtato difinis en 1979 la poŝton kaj telekomunikadon kiel strategie gravan punkton de la naci-ekonomia disvolviĝo kaj ellaboris serion da favoraj politikoj. En la lastaj jaroj senprecedence rapidis la poŝt-telekomunika konstruado kaj rimarkinde altiĝis la telekomunika kapablo kaj kvalito. Precipe de post 1985, la ĉina

poŝta kaj telekomunika kapablo unuafoje en la sinsekvaj tri jaroj kreskis je 50% pli multe ol kresko de la totala produktovaloru de la nacia ekonomio kaj rikoltis bonan socian efikon.

En la 9 jaroj de 1978 ĝis 1987 la fiksa kapitalo de la ĉina poŝto kaj telekomunikado kreskis je pli ol 8 miliardoj da jüanoj, t.e. 1.5-oble pli multe ol tiu en la pasintaj 30 jaroj. La kapacito de la urbaj telefonaj centraloj kreskis de 1.74 milionoj al 4.76 milionoj da linioj, t.e. 2.1-oble pli multe ol tiu en la pasintaj 30 jaroj, kaj tiu de la kamparaj telefonaj interŝanĝiloj kreskis de 2.3 milionoj al 3.15 milionoj da linioj, ke preskaŭ duobliĝis la telefon-populariga procentaĵo en Ĉinio.

En Gŭangdong, provinco plej vigla en reformado kaj pordo-malfermo, preskaŭ ĉiuj vilaĝoj havas telefonojn, i.a. instaligis 90 000 telefonoj en specialigitaj familioj. En la pasinteco multaj individuaj komercaj entreprenistoj veturis per buso por ofertado, kio malŝparis al ili kaj monon kaj tempon. Kun telefono en sia hejmo ili povas tuj paroli kun aliaj kaj plivigli la komercon.

Funkciigo de aŭtomataj telefonoj kaj plibonigo de investa medio fariĝis favoraj kondiĉoj por altiri eksterlandan kapitalon. Iu eksterlanda komercisto volis investi en Ŝunde-gubernio, Gŭangdong-provinco, sed hezitis, timante, ke la tieaj telekomunikaj kondiĉoj estas malbonaj kaj

informoj malfruaj. Tuj kiam ekfunkciis la lokaj program-regataj telefonoj, li investis 10 milionojn da jŭanoj por starigi porkobredejon.

En la 9 jaroj duobligis la nombro de la linioj de longdistancaj telefonoj en Ĉinio. Jam 310 urboj havas aŭtomatan reton de longdistancaj telefonoj. Ĉ. 80% de la urboj havas aŭtomatan telegrafoŝaltan sistemon. Pli ol 50 urboj povas ciferdiske telefoni kun 22 landoj kaj regionoj kaj per rekta telefonado kontaktiĝi kun 44 landoj. Pli ol 40 urboj komencis radio-vokan servon. En Pekino, Kantono, Ŝanhajo kaj Ĉinhŭangdaŭ oni ekservis per radio-telefonoj.

En la 9 jaroj la poŝtaj kaj telekomunikaj departementoj reordigis la transportan reton por transigi poŝtaĵojn, konstruis poŝtajn centralojn kaj kontenerajn kaj flughavenajn traktejojn en iuj provincaj ĉefurboj kaj gravaj urboj, disvolvis akvo-kaj aŭtovojan transportadon, vaste aplikis regionajn kodojn por poŝto, aŭtomate aŭ duonaŭtomate klasifikis paketojn, leterojn kaj presaĵojn kaj servis per ekspresa poŝta servo, poŝta ŝparbanko, elektronika poŝto kaj son-poŝto. Jam 97 ĉinaj urboj entreprenis internacian ekspresan poŝtan servon al 52 landoj kaj regionoj kaj 124 ĉinaj urboj tian servon enlande. Aŭguste de 1987 oni intencis konstrui urbodomon en Naha, Japanio. Informiĝinte pri tio, la Importa kaj Eksporta Kompanio de Metalaĵoj de Fuĝjan-provinco, Ĉinio, sendis specimenon de ŝtonpecoj per internacia ekspresa poŝto kaj la sendaĵo atingis Naha en la tago de mendo, ke tiu japana urbo subskribis kontrakton pri konstrumaterialoj por 300 000 usonaj dolaroj.

La poŝtaj kaj telekomunikaj departementoj energie utiligis ĉiujn sociajn fortojn por formi multkanalan kaj multklasan ampleksan poŝtan reton en kombino de memadministrado kaj

Radio-telefonado



komisiita administrado. Precipe en la lastaj jaroj la komisiita poŝta servo en la ĉina kamparo progresis rapide. Nun en la lando troviĝas pli ol 13 000 poŝtoŝtancoj komisiite administrataj de vilaĝoj, kiuj konsistigas 27% de la totala nombro de la ĉinaj poŝtoŝtancoj. Ili ludis pozitivan rolon en disvolvo de la kampara var-ekonomio, komunikado de informoj kaj helpo de la malforta kampara poŝta servo.


En disvolvo de la poŝto kaj telekomunikado la koncernaj departementoj unuflanke per sia forto faris teknikan renovigon kaj reformadon, elfaris diversajn telekomunikajn ekipaĵojn, kiaj transigiloj, interŝanĝiloj kaj fin-instalaĵoj, kaj konstruis modernan telekomunikatan reton kun grandkapacita mezgrada kablo kaj mikroondo kiel la ĉefaj, kaj aliflanke profitis de la favoraj kondiĉoj de reformado kaj pordo-malfemo por plifortigi kunlaboron kun aliaj landoj, apliki novan teknikon, importi novajn ekipaĵojn kaj akceli la modernan telekomunikatan konstruadon.

Nun la kapacito de la aŭtomataj telefonaj interŝanĝiloj en la ĉinaj urboj konsistigas 85.7% de la totala kapacito de la ordinaraj telefonaj interŝanĝiloj. Jam funkcias 878 000 program-regataj telefonaj interŝanĝiloj. Kaj 21 provincaj ĉefurboj havas aŭtomatajn interŝanĝajn ekipaĵojn por longdistanca telefonado.

La enlanda reto de satelita telekomunikado ekfunkciinta julie de 1986 markas, ke la ĉina poŝto kaj telekomunikado faris grandan paŝon antaŭen al modernigo. La reto, kovranta la tutan Ĉinion, laboras tage kaj nokte senĉese por transsendi televidajn programerojn, telefonaĵojn, telegramojn kaj faksimilajn leterojn. Ĝi havas gravan signifon por forigi la telekomunikatan postigintecon en la foraj limregionoj.

Nun la telekomunika reto konsistanta el dratoj, kabloj, mikroondo, kurtendo kaj satelita telekomunika servo interligis la urbojn kaj vilaĝojn de la lando kaj kontaktiĝis kun aliaj lokoj de la mondo. Precipe en julio de 1986 Ĉinio kaj 16 landoj kaj regionoj de Eŭropo, Azio kaj Ameriko ekhavis aŭtomatajn ciferdiskojn, ke grandaj urboj kaj malfermitaj apudmaraj urboj de Ĉinio aliĝis al la aŭtomata telefona reto de la terglobo. En la ĉina telekomunika reto jam ekfunkciis la monde avangarda teknologio nun uzata, kiel ekzemple, en komunikado per program-regata ŝalto kaj komunikadoj per fibro-optiko, ciferoj, satelito, donitaĵo kaj laŭgrupa ŝalto.

Kvankam la ĉina poŝto kaj telekomunikado rapide disvolviĝis en la pasintaj 9 jaroj, tamen la socia disvolviĝo en reformado pli kaj pli bezonas komunikadon. Precipe en la nuna situacio, ke Ĉinio



En la domo por longdistanca komunikado nove konstruita en Uhan

decidis malfermi ĉiujn siajn apudmarajn regionojn, stimuli ilin energie disvolvi al-eksteran ekonomion, eniri la internacian cirkuladon kaj partopreni la internacian konkurencon, certe streĉos la enlandan kaj internacian telekomunikajn servojn en tiuj regionoj. Tio grave influis la poŝtajn kaj telekomunikajn departementojn.

En la pasintaj 9 jaroj la poŝto kaj telekomunikado plej prosperis en la apudmaraj regionoj, kie estas ankaŭ plej streĉita la telekomunika servo. Ekz., la nombro de telefonoj 2-3-oble, eĉ kelkdekoble kreskis en la apudmaraj regionoj, tamen pli kaj pli akriĝis la kontraŭdiro inter la livero kaj la bezono. En 1987, en Pekino 68 000 klientoj petis instali telefonon, kaj en Ŝanhajo pli ol 80 000 klientoj tion deziris. Telefono estas plej vaste aplikata en Ŝenĝen, kies populariga procentaĵo jam atingis 18.4% (plej alta en Ĉinio), tamen tie ankoraŭ 11 000 klientoj

petis instali telefonon kaj triono de la longdistancaj telefonoj estas malfacile unu-foje konektebla.

La rapida disvolviĝo de la poŝto kaj telekomunikado en la apudmaraj regionoj certe puŝos tiun en la landinterno kaj la okcidenta parto de Ĉinio. Ankaŭ en okcidenta Ĉinio pli kaj pli streĉiĝas la poŝta kaj telekomunika servo, kio pli kaj pli pezas sur la ĉina poŝto kaj telekomunikado.

Tia situacio estas defio al la ĉina poŝto kaj telekomunikado kaj ankaŭ bona ŝanco por ke ĝi akceptu la defion. La ĉinaj poŝtaj kaj telekomunikaj departementoj decidis pluapase mobilizi ĉiujn fortojn de la socio, fari plurflankan investadon, kune entrepreni konstruadon, laŭeble utiligi en- kaj eksterlandajn avangardajn sciencojn kaj teknikojn kaj akceli la poŝtan kaj telekomunikadon disvolviĝon por adaptiĝi al la bezono de la reformado kaj pordo-malfermo de Ĉinio. ■

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: unu internacia respondkupono por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: unu intern. resp. kup. por spaco de unu linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp-organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* Yian-a Esperanto-Asocio kaj ĝiaj geasocioj dez. kor. kun

tutmondaj geesp-istoj pri ĉiuj temoj. Adr.: Yian-a Esperanto-Asocio, Yian, Heilongjiang, Ĉinio.

* Membroj de Tangshan-a Esperanto-Asocio dez. kor. kun esp-istoj kaj E-orgazizoj en ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj. Adr.: 3 hao Xinxiang, Tangshan, Hebei, Ĉinio.

* Mi havas unuataĝajn kovertojn eldonitajn de nia loka poŝtoŝefo (por la Centjara Jubileo de Esperanto) gofritajn de orkoloro kaj stampitajn per tri malsamaj unuataĝaj stampoj, (kun malmulte da aliurbaj E-

filatelaĵoj). Volas interŝanĝi diversajn landajn E-filatelaĵojn (E-pm., pk., UTK., ktp.) Adr.: Ba Jingke, Changji Shi Jiaoshi Jinxu Xuexiao, Xinjiang, Ĉinio.

* S-ro Yuan Yingchun, 25-j. oficisto, dez. kor. tm. pri kulturo, kaj interŝanĝi pm., pk. kaj E-eldonaĵojn. Adr.: 66 Wendelu, Fuyang, Anhui, Ĉinio.

* Pensiulo dez. interŝanĝi bk. pri artaj konstruaĵoj kun aziaj geesperantistoj. J. Tuset, Barcelona 56, 08240 Manresa, Hispanio.

En la petrola urbo Daĉing

Teksto de ĜENG ĜENĜJE

Fotoj de ŜJU ŬENFU

Post 20-hora veturado de Pekino per ekspreso mi atingis la kvietan kaj bonordan petrolan urbon Daĉing de nordorienta Ĉinio. En ĝi sennombraj blankaj oleputoj, nigraj ŝaktoskafaldoj kaj drilmaŝinoj, ombroriĉaj arboj kaj belaj domoj kunfandiĝas harmonie kaj impresas per apartaj trajtoj de petrola urbo.

La petrolkampo Daĉing situas meze de Songnen-ebenaĵo, kun areo de 5 500 kvadrataj kilometroj. Dum la pasintaj dekoj da milionoj da jaroj la regiono estis ĉiam en stabila sinko kaj tie formiĝis sedimenta roko milojn da metroj dika. Ĉinaj geologoj

malkovris la petrolkampon fine de la 50-aj jaroj. En la komenco de 1960, 60 000 laboristoj kaj oficistoj el diversaj partoj de la lando starigis en ŝtormo tendojn sur la vastega sovaĝejo kaj produktis 970 000 tunojn da petrolo tiujare, venkinte multajn neimageblajn malfacilojn. En 1963 Ĉinio ne plu estis lando malriĉa je petrolo kaj efektiviĝis memprovizadon de petrolo.

La petrolkampo Daĉing estas la plej granda en Ĉinio. En 1976 ĝia produktokvanto de nafto atingis 50 milionojn da tunoj. Poste, ĝia stabila produktado daŭris 12 sinsekvajn jarojn. Ĉu Daĉing estas

trezora lagenario en mito? Ĉu la stabila alta produktado daŭros plu post longtempa kaj grandskala ekspluato? Kun la demandoj mi vizitis superan inĝenieron Li Jugeng, estron de la Administracia Buroo de la Petrolkampo Daĉing.

Mi informiĝis de li, ke ankaŭ la petrolkampo Daĉing, kiel alilandaj petrolkampoj, komencis reduktiĝi post certatempa stabila produktokvanto. En 1980 la petrolkampo eniris en ekspluatperiodon de alta akvoenteno. Meznombro 100 tunoj da nafto estas ekspluatitaj, ankaŭ pli ol 70 tunoj da akvo miksite elterigitaj. Ĉiujare la produktokvanto de nafto malpliĝas je 4 milionoj da tunoj kaj la ekspluata kosto de nafto pliĝas pli-ol-trioble, kompare kun tiu antaŭ 10 jaroj. Sciencistoj de la petrolkampo alprenis diversajn rimedojn por pliprodukti nafton, ŝanĝi plejparton de la oleputoj ne povantaj mem ŝpruci nafton en mekanikajn, pliigi novajn oleputojn en nafto-havaj lokoj ktp. Krome, oni importis proksimume 2 000 avangardajn aparatojn kaj ekipaĵojn kaj 180 teknikojn, kio ludis pozitivan rolon en la produktado.

En la Konstru-projekta Instituto de Daĉing-petrolkampo iu inĝeniero diris al mi, ke en la 60-aj jaroj ni emfazis praktikadon por malfermi novan vojon kaj en la 80-aj jaroj ni aplikas sciencojn kaj teknikojn por disvolvi la petrolkampon. Apliki komputilan teknikon kaj avangardan teknologian proceson estas ankaŭ malfacile kaj postulas penigan studa-


En Daĉing



don. Estis jam post la deka vespere, kiam mia vizito finiĝis. Tamen oni ankoraŭ laboris en la Projekta Domo kaj Eksperimenta Domo de la petrolkampo. Dank' al tia diligenta laboro, ĝiaj pli ol 17 000 sciencistoj kaj teknikistoj sinsekve gajnis 40 000 sciencajn fruktojn, el kiuj 624 estis premiitaj, 70 atingis la mondan avangardan nivelon aŭ proksimiĝis al ĝi. Ekz., la tekniko de akvoenlasa ekspluato ricevis la ŝtatan specialan premion de scienca kaj teknika progreso kaj akiris rektan ekonomian profiton de 1.3 miliardoj da jŭanoj.

Knabino Ju Ŝjaŭhong laboras en la dua taĉmento de la Kompanio de Petrola Konstruado. Post kvarmonata diligenta lernado de tekniko, ŝi trapasis la ekzamenon kiel veldistino. Kaj post pliaj kvar monatoj ŝi ricevis manipulan atestilon donitan de la Ĉina Veldista Asocio kaj fariĝis altklasa veldistino. Marte de 1985 ŝi eklernis en kurso por superaj veldistoj gvidata de fakulo el FR Germanio. En la diploma ekzameno ŝi la unua sukcese trapasis ĉiujn 13 testojn. En konstruado de grandega olecisterno farata de Ĉinio kaj Japanio perturbiĝis la aŭtomata veldmaŝino, kio kaŭzis al veldolokoj skoriretenon kaj estis necese mane refari veldon. Fakulo proponis, ke oni donu la malfacilan taskon al Ju Ŝjaŭhong. Post la veldado oni kontrolis la veldolokojn per iksradia filmado kaj trovis nenian mankon. Ŝi estis laŭdita de fakuloj.

Por pli longe teni altan kaj stabilan produktokvanton de nafto, centoj da geologoj multe faris sciencajn kalkulojn en la pasintaj jaroj kaj fine trovis novan geologian nafto-rezervon. Nun prospektorado estas farata streĉe ĉirkaŭ la petrolkampo Daĉing. La prospektorata regiono etendiĝis al Hajlar, Fularĝji kaj aliaj lokoj, centojn da kilometroj for de la petrolkampo. Nun oni jam trovis pli ol dek novajn petrolkampojn.



Putobora maŝino transportata

Mi vizitis unu novan petrolkampon Ĉjiĝja. Meze de vasta marĉo staris simplaj moveblaj dometoj. Ses raŭpotraktoroj provizis la lokon per akvo kaj greno. En la marĉo vidiĝis malmultaj homoj. Post kiam la prospektoroj revenis de laboro, el la dometoj aŭdiĝis rido kaj muziko.

NOVA DISVOLVIĜO DE PETROLKEMIA INDUSTRIO

La petrolkemia industrio ricevis rapidan disvolviĝon en la ekspluatado de la petrolkampo Daĉing.

En la orienta parto de la

petrolkampo funkcias la Daĉing-a Ĝenerala Petrolkemia Fabriko, ĝi estas granda petrolkemia kombinato kun rafina, kemi-sterka kaj kemi-fibra sistemoj. La fabriko havas 38 kompletojn da produktaj instalaĵoj, kapablas prilabori 5 milionojn da tunoj da nafto kaj produktas pli ol 60 specojn de produktaĵoj. Ili vendiĝas enlande kaj el ili poraviada petrolo, parafino kaj nafto ankaŭ al 53 landoj kaj regionoj.

Pasintee la fabriko estis la Daĉing-a Petrola Rafinejo, konstruita aprile de 1962. En la fino de la sekva jaro finiĝis ĝia unuaperio-

da konstruo kaj tiujare post sia ekfunkcio ĝi prilaboris pli ol 100 mil tunojn da nafto kaj produktis bonkvalitajn benzinon, kerosenon, dizeloleon k.a. Post 1963 estis finkonstruitaj 13 kompletoj da olerafinaj instalaĵoj, inkluzive tiam monde avangardajn instalaĵojn. Rezulte de tio, ĝia prilabora kapablo kreskis de miliono da tunoj ĝis 2.5 milionoj, kaj ĝi rapide produktis kerosenon, parafinon, petrolan koakson, benzenon kaj aliajn petrolajn produktojn urĝe bezonatajn de la nacia ekonomio kaj nacidefendo. De 1968 la fabriko renovigis du kompletojn da rafinaj instalaĵoj, tio duobligis ĝian kapablon, ke ĝi ĉiujare povis rafini 5 milionojn da tunoj da nafto.

En la komenca periodo de ekspluatado de la petrolkampo, la natura gaso kaj kromproduktoj produktitaj en rafinado estis plejparte forbruligitaj kiel hejtaĵo por industrio kaj popola vivo. En 1970 oni komencis entrepreni sintezan utiligon de petrolkemiaj industriaĵoj kaj ekfunkciis instalaĵo kun jara produktopovo de 60 000 tunoj da sinteza amoniako kaj tiu kun jara produktopovo de 90 000 tunoj da amonia nitrato. En 1976 importiĝis instalaĵo kun jara produktopovo de 300 000 tunoj da sinteza amoniako kaj tiu kun jara produktopovo de 480 000 tunoj da ureo. La lasta egalas al kemi-sterka fabriko kun jara produktopovo de miliono da tunoj da kemia sterko. Samtempe ekfunkciis ankaŭ instalaĵo kun jara produktopovo de 5 000 tunoj da akrilonitrilo kaj tiu de poliakrilonitrila fibriĝo kun jara produktopovo de 3 000 tunoj. Nun pli kaj pli multiĝas la specoj de kemi-industriaĵoj de la fabriko kaj pliboniĝas la kvalito. La totala produktovalorato atingas 1.16 miliardojn da jŭanoj.

Nun instalaĵoj kun jara produktopovo de 300 000 tunoj da etileno estas streĉe konstruataj ĉe la Daĉing-a Ĝenerala Petrolkemia

Fabriko. Ĝia unuaperioda konstruo jam komencis produkti, la duaperioda konstruo estas fundamente finita kaj la prepara laboro por la triaperioda konstruo estas en streĉa irado. La konstruo estas unu el la gravaj konstruoj de la ŝtato. Ĝi havas 13 instalaĵojn kaj 82 publikajn kaj akcesorajn konstruojn kun totala investo de 4.2 miliardoj da jŭanoj. Ĝiaj ĉefaj instalaĵoj estas importitaj el Usono, FR Germanio, Britio kaj Japanio kaj havas altan teknologian nivelon. Kiam la tuta konstruo funkcios, la jara produktovalorato atingos 1.6 miliardojn da jŭanoj. Ĉiujare ĝi povos liveri al la ŝtato 588 000 tunojn da organikaj kemi-industriaj materialoj, plastaj grajnoj kaj poliakrilonitrilaj fibroj, por malpeza, farmacia, insekticida, tinktura, kaŭĉuka, hejtaja industrio kaj delikata kemi-industrio.

NOVA URBO

La urbo Daĉing, starigita en 1980, estas nova industria urbo. Ĝi konsistas el 5 administraj distriktoj kaj havas 830 000 loĝantojn. En la komenca periodo de konstruo, oni ne konstruis grandan urbon, sed dise konstruis urbetojn laŭ la konkretaj kondiĉoj kaj la principo kombini industrion kaj agrikulturon, urbon kaj kamparon, favora al produktado kaj oportuna al la popola vivo. Kaj ĉirkaŭ la urbetoj konstruiĝis centraj vilaĝoj kaj loĝkvartaloj. Nun ĝiaj pli ol 700 loĝpunktoj estas interligitaj per 29 aŭtobusaj linioj. Kaj proksime al ili punktiĝas la vilaĝoj kaj servejoj por la popola vivo. Tio estas favora al la produktado kaj la vivo de laboristoj kaj oficistoj, akcelas la disvolviĝon de agrikulturo kaj samtempe mildigas trafiknan streĉecon kaj median polucion kaŭzitan de troloĝateco.

En la unuaj jaroj de la petrolkampa ekspluatado, por koncentri la limigitan kapitalon al la petrolo produktado, la laboris-


toj kaj oficistoj vivis malfacile. Ili mem konstruis nombron da simplaj terdomoj. Kaj poste, konstruiĝis nombro da unuetaĝaj domoj el brikoj kaj ligno. Por plibonigi la loĝkondiĉojn de laboristoj kaj oficistoj, ekde 1979 oni ĉiujare konstruis etaĝdomojn kun areo de 600 000-700 000 kvadrataj metroj. Nun pli ol duono de laboristaj kaj oficistaj familioj translokiĝis en novajn domojn.

Ankaŭ la agrikultura produktado de la urbo multe disvolviĝis. Nun 90 000 hektaroj da agroj estas kultivatataj. En 1987 la grena produktokvanto atingis ĉ. 180 000 tunojn kaj la legoma produktokvanto 160 000 tunojn. Kaj krome, grandkvante produktiĝis ankaŭ bovlakto, kortobirdoj, akvoproduktaĵoj k.a.

La Daĉing-a registaro donis grandan atenton al inteligenta ekspluatado. Nun en la urbo formiĝis eduka sistemo el infanĝardenoj, elementaj lernejoj, mezlernejoj kaj altaj lernejoj. En ĝi funkcias 641 diversaj lernejoj, inter kiuj estas du altaj lernejoj.


La kultura vivo de Daĉing estas riĉa. En la urbo estas pli ol 30 grandaj kluboj, 330 amuzejoj, la Laborista Kultura Domo, Junulara kaj Knaba Domo, Daĉing-biblioteko, Daĉing-naĝdomo kaj Daĉing-a Ŝinhŭa-librejo kun rimarkinda skalo. En la urbo troviĝas tri parkoj, precipe la originala Infana Parko fondita en 1981. En ĝi staras kioskoj, surakva pavilono, zigzaga ponto, longa koridoro, groteskaj rokoj kaj arboj kaj precipe 8 kompletoj da grandaj elektraj ludiloj ŝatataj de infanoj. Ĉie en ĝi aŭdiĝas ridoj kaj gajaj paroloj de infanoj.


Iu administranto de la parko diris al mi, ke en vintro tie prezentiĝas glacia mondo. Delikatataj glaciaj skulptaĵoj kaj grandaj glaciaj konstruaĵoj bele brilas sub sennombraj lampoj kaj allogas multajn rigardantojn per sia ĉarmo. ■



Parto de la petrolkampo

Oleputoj ekipitaj per maŝinoj







Instalaĵoj kun jara produktopovo de 300 000 tunoj da etileno

En regadejo de komputiloj





Putoborado



Traktejo de malpura akvo en la petrolkampo

Semajnofina balo en la Laborista Kultura Domo



NOVAJ POŝTKARTOJ ELDONITAJ

DE ĈINA ESPERANTO-ELDONEJO

(kun 4-lingvaj klarigoj: ĉina,
Esperanta, angla, japana)



Dek Famaj Floroj de Ĉinio

En 1987, ĉinaj ekspertoj el diversaj lokoj elektis umefloron, peonion, krizantemon, orkideon, ĉinan rozon, rododendron, kamelion, lotusfloron, osmanton kaj narcison kiel dek plej famajn tradiciajn florojn de Ĉinio. Ili, kreskante en malsamaj medioj, havas variajn kolorojn, aromojn kaj formojn.

10X14.7 cm. 10 pecoj. 87-CEsEJ-582

Orkideo

La orkideo estas unu el la ok famaj florplantoj de Junnan-provinco de Ĉinio. Ĝi havas altan valoron de aprecio pro siaj floroj belaspektaj, brilkoloraj kaj bonodoraj. La 11-specaj orkideoj en tiu ĉi serio de poŝtkartoj kreskas en densaj arbaroj de malproksimaj montoj de Ĉinio.

10X14.7 cm. 10 pecoj. 87-CEsEJ-561

Pejzaĝoj de Ŝanhajo

Ŝanhajo, la plej granda industria kaj komerca urbo de Ĉinio, situas sur la delto kie Jangzi-rivero enfluas en la Orientan Ĉinan Maron. Kun delikataj ĝardenoj en rafinita stilo, majestaj antikvaj temploj, modernaj konstruaĵoj kaj luksaj hoteloj, Ŝanhajo, kiel unu el la ĉinaj urboj plej frue malfermitaj al la eksterlando, altiras al si pli kaj pli da vizitantoj en- kaj eksterlandaj.

10X14.7 cm. 10 pecoj. 87-CEsEJ-562

Liĝjang-Rivero

La montoj kaj riveroj de Guĵin estas delonge konataj kiel la plej belaj sub la ĉielo. Interalie Liĝjang-rivero, pli ol 400 kilometrojn longa, rimarkinde kompletigas la lokan belecon. La meza parto de la rivero, de Guĵin ĝis Jangŝuo, akompanata de ĝibaj karstaj montetoj, estas unu el la famaj pitoreskejoj de Ĉinio. Ambaŭborde de la fluo estas groteskaj montpintoj kaj ĉarmaj vilaĝoj, kiuj speguliĝas en la klara akvo.

10X14.7 cm. 10 pecoj. 87-CEsEJ-589

Mendu ĉe: Libroservo de UEA
Perantoj de EPĈ

aŭ Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN),
Esperanta Sekcio, P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Elektronika strato de Ĝonggŭancun

— Fenestro de ĉinaj privataj scienc-teknikaj entreprenoj

EKAPERO DE PRIVATAJ SCIENC-TEKNIKAJ ENTREPRENOJ

Ĉinoj lanĉis sputnikojn sur iliajn orbitojn, elfaris superkomputilon kun operacia rapideco de 100 milionoj da fojoj sekunde, sukcese kombinis insulinon, kio malkaŝis la sekreton de vivo... La Ĉina Akademio de Sciencoj sola jam havas mil novajn esplorajn atingojn ĉiujare, el kiuj iuj atingis la mondan avangardan nivelon. Tamen nemalmultaj mondnivelaj atingoj estas fermitaj en esploraj institutoj, ne fariĝis produktofortoj kaj ne ellasis sian energion. Ni prenu la elektronikan industrion de Ĉinio kiel ekzemplon, ĝia totala produktovalorado estas malpli granda ol tiu de Singapuro kun 2 500 000 loĝantoj.

Tio meditigis ĉinojn partoprenantajn en la politikaj kaj ekonomiaj reformoj.

En la lastaj pli ol 30 jaroj la strukturo de ĉinaj sciencoj kaj teknikoj baziĝis sur la malnova ordo, kiu apartigis la sciencajn kaj teknikajn esploradojn disde la produktado. Kiam iu scienc-esplora frukto ankoraŭ ne fariĝis varo en merkato, oni jam komencis esplori novan, pli altklasan produktaĵon. Rezulte de tio, la scienc-teknikaj fortoj de Ĉinio sola antaŭeniris, sin apartiginte de la ĉinaj industrioj kaj merkatoj en- kaj eksterlandaj. Post kiam Ĉinio ekpraktikis la politikon de ekonomia malfermo al la eksterlando, oni trovis ke la ĉinaj varoj ne povas konkurenci

kun la eksterlandaj.

La ĉinaj sciencistoj kaj teknikistoj ekkonis, ke en la nuna mondo la sciencoj kaj teknikoj ludas pli kaj pli evidentajn rolojn gvidan kaj akcelan en produktado. La kampo de altteknikoj estas plena de intensaj konkurencioj en la internacia komerco. La disvolviĝantaj landoj ne povas rapide kuratingi la disvolviĝintajn landojn sole per la avantaĝoj de malaltkostaj laborfortoj kaj abundaj riĉfontoj, ili devas turni sian atenton al la sciencoj kaj teknikoj, la plej viglaj faktoroj akcelantaj progreson de la socio kaj ekonomio. En tiu situacio Ĉinio nepre devas rompi la malnovan scienc-esploran sistemon kaj krei

novan, se ĝi volas fariĝi ekonomia potenco en la 21-a jarcento kaj eniri en la novan epokon de prosperaj sciencoj, teknikoj kaj ekonomio. Iuj malproksimvidaj sciencistoj forlasis la favorajn kondiĉojn en scienc-esploraj fakoj, elirinte el laboratorioj kaj institutoj, kaj starigis altteknikajn kompaniojn. Sekve de tio aperis unuaj privataj scienc-teknikaj entreprenoj en Pekino, administrataj de sciencistoj kaj teknikistoj.

STRATO DE ĜONGGŬANCUN

Ĉe Ĝonggŭancun de Pekino koncentriĝas institutoj sub la Ĉina Akademio de Sciencoj. Sciencistoj elirintaj el tiuj esploraj institutoj

Laboranto de Stone-kompanio rekomendas komputilojn.



funkciigis privatajn scienc-teknikajn entreprenojn unu post alia. En la kvin jaroj post 1983 aperis 150 privataj altteknikaj entreprenoj, kies varoj vendiĝas en- kaj ekster-lande. Tial oni nomas la straton elektronika strato de Ĝonggüancun.

Tiuj privataj entreprenoj administrataj de sciencistoj aŭ inĝenieroj ekspluatas novajn teknikojn kaj okupas merkaton per siaj teknikaj avantaĝoj. Post la fondiĝo en 1984 la Keli-a Altteknika Kompanio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj sin jetis al ekspluatado de novaj teknikoj. Rimarkinte, ke grandekrana, altdistinga kolora montrosistemo havas vastan merkaton en Ĉinio, kaj ke la produktado de la koncerna regpanelo estas ideala aranĝo por la kompanio, ili do komencis produkti tiuspecan panelon por provizi la merkaton. De novembro 1985 ĝis marto 1986 la kompanio jam profitis kvin milionojn da jüanoj. En majo 1987, kiam la kompanio ekprovizis la merkaton per sia novtipa regpanelo, aperis pli avangarda regpanelo en la internacia merkato. Kaj kiam ĝi organizis specialistojn ekspluati kaj produkti tiuspecan panelon post du monatoj, aperis plej nova panelo. Tiam la kompanio reorganizis esplorajn fortojn por ĝin produkti kaj ekproduktis la novspecan regpanelon en la komenco de 1988. Dank' al la penado de la kompanio Ĉinio jam kuratingis la avangardan nivelon de la mondo en tiu kampo. Enlandaj specialistoj diris, ke la ekspluatado kaj produktado de la kompanio estas pli rapidaj ol tiuj de la ŝtataj scienc-esploraj institutoj je 3 jaroj.

La avantaĝo de sciencistoj en funkciigo de entreprenoj estas en tio, ke ili posedas koncernajn sciojn kaj bone scias la teknikajn staton kaj perspektivon en sia fako. Tial ili povas agi aktive en kompleksa kaj akra merkata



En Kehaj-kompanio

konkurenco kaj ebligas al sia entrepreno disvolviĝi pli rapide. Ŭang Hongde, la ĝenerala administranto de la Ĝinghaj-Korporacio, kiu komencis sian aferon de nulo, estas komputeja specialisto. Ne-longe post la establo de la korporacio li kuraĝe akceptis la taskon konstrui grandan komputejon de la Pekina Universitato, kun helpo de UN kaj pruntepreno de la Internacia Banko de Rekonstruo kaj Disvolvo. Ŭang Hongde kaj liaj asistantoj estas specialistoj pri specifaj temperaturo, humideco, aerpureco, stabila elektroprovizado kaj antiinterfero postulataj de komputiloj. Tial ili bonkvalite plenumis tiun grandan konstruon nur en unu jaro. Per tio, ili ne nur profitis 90 000 jüanojn, sed ankaŭ famiĝis tra la lando. Multaj enlandaj klientoj sin turnis al ili kun peto por projektado kaj muntado de komputejo

Nun pli ol 100 kompanioj sur la elektronika strato de Ĝonggüancun fariĝis kombinatoj, kun tekniko, produktado kaj komerco en kombino, kun merkato kiel direkto kaj kun teknika ekspluatado kiel bazo. Jam aperis bona cirkulado: merkato → informoj → ekspluatado → produktado → merkato.

ELVOLVI LA TALENTON DE SCIENC-TEKNIKAJ LABORANTOJ

La privataj scienc-teknikaj entreprenoj sur la elektronika strato de Ĝonggüancun elektas kaj uzas laborantojn laŭ ilia talento. Post praktikado de kelkaj jaroj aperis nombro da junaj talentaj entreprenistoj kaj administrantoj kun administra talento kaj koncepto pri merkato kaj ekonomio.

Estas inĝeniero, kiu esploris novtipan antibiotikon en instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj. Li intencis fari etkvantan eksperimentadon, sed mankis al li mono, koncernaj ekipaĵoj kaj ankaŭ subteno, kio lin afliktis. En 1984 li forlasis la instituton kaj eklaboris en la Kehaj-a Kompanio. La gvidanto de la kompanio provizis lin per diversaj eksperimentaj kondiĉoj kaj disponigis al li helpantojn, ke li plenrajte respondecu pri la ekspluatado. Rezulte de tio li provfaris novan medikamenton en du jaroj. La medikamento ricevis novmedikamentan atestilon de la Higiena Ministerio de Ĉinio. Kaj la kompanio gajnis grandan profiton en la vendo de ĝia tekniko.

Stone-kompanio fondiĝis en majo de 1984, ĝia ĝenerala administranto Ŭan Ĵunnan vidis la "varmon de komputilo" en Ĉinio kaj decidis fari duafojan ekspluatadon al presiloj fabrikitaj de Japanio por ke ili adaptiĝu al la enlandaj personaj komputiloj. Li kontaktiĝis kun agento de japana kompanio kaj post tri tagoj li kontraktis kun tiu agento. Post duonmonato la presiloj duafoje ekspluatitaj de Stone jam atingis Pekinon kaj forvendiĝis en tri tagoj. Tiel Stone gajnis sufiĉe grandan profiton kaj kvitigis sin al la kreditora banko en 17 tagoj.

La mezaĝa esploristo Ni Gŭangan estis engaĝita kiel ĉefinĝeniero de kompanio sub la Matematika Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj en novembro 1984 por ekspluati sian esploratingon de asociacia ĉinlingva softvaro. Tiel li sin turnis de sia bone konata esplora laboro al ekspluatado kaj vendado de novaj teknikoj. Li iris inter klientojn por informiĝi pri iliaj postuloj, ripetade faris eksperimentojn por ĝin perfektigi kaj fine sukcese elfaris ĉinlingvan softvaron, kiu povas vidiĝi serion da asociaciaj vortoj sur la videbligilo laŭ la bezonoj de klientoj. Tio multe altigis la rendimenton. Dum la prova vendado li faris manipulan demonstradon ĉe la stando por klientoj, kolektis iliajn opiniojn kaj postulojn kaj respondis iliajn demandojn. Por perfektigi la produktajn li faris pluan ekspluatadon. Dank' al lia penado aperis ok versioj de tri tipoj de lia ĉinlingva softvaro, kio formis produktoserion, ili vendiĝas tra la tuta Ĉinio, en Singapuro, FR Germanio, Usono kaj Hongkongo. Scienc-teknikaj laborantoj, kiel Ni Gŭangan kapabla en scienc-esplorado, ekspluatado, vendo kaj serva laboro, aperis kun la leviĝo de altteknika industrio. Ili ludas akcelan rolon en transformado de sciencoj kaj teknikoj en produktivo kaj de scienc-esploraj fruktoj en varojn.

ĜANG ĈINGĜEN:

Honfan kaj EĈV

Antaŭ la 72-a UK aperis en Pekino ampleksa "Esperanto-Ĉina Vortaro" (EĈV) kun 1 600 000 ideogramoj, omaĝe al la centjaro de Esperanto. Tio sendube estis grava kaj celebrinda afero por la ĉina Esperanta rondo. Pri ĝia publikiĝo, "La Revuo Orienta", organo de Japana E-Instituto, diris, ke ĝi signifas novan prosperon de la ĉina Esp-movado, ĝi ne nur estas valora por la ĉinaj esperantistoj, sed ankaŭ utilas al la japanaj esperantistoj.

Lastatempe, mi vizitis Honfan, ĉefredaktoron de la vortaro. Komprenoble ne estis la unua fojo, ke mi renkontiĝis kun li, tamen oni povas diri, ke ĉifoje li forte impresis min. Ni reciprokis salutojn kaj intime interparolis. Honfan, 78-jara, estas ankoraŭ vigla en pensado kaj logika en parolado.

Li rakontis al mi, kiel li ekŝatis Esperanton kaj kial li decidis okupi sin pri Esperanto en la tuta vivo. En la komenco de la 30-aj

jaroj, kiam li lernis en la Unua Kampara Pedagogia Kolegio de Ĝĵinan, li kaj kelkaj liaj kamaradoj ŝtele legis progresajn librojn kaj estis influitaj de revoluciaj pensoj. Li organizis en la kolegio legado-societon por popularigi revoluciajn pensojn. Tiam li legis la libron "Unu Semajno en Moskvo" verkita de Hujucz, pioniro de la ĉina E-movado. El la libro li ne nur iom konis la sovetian staton, sed ankaŭ eksciis, ke Esperanto estas bona ilo por koni USSR kaj alilandajn popolojn. Malgraŭ ke li tiam ne havis ŝancon lerni la lingvon, tamen ekaperis amo al Esperanto en lia koro. En 1932, post kiam li estis arestita de la Kuomintanga registaro pro sia aktivaĵo kontraŭ Japanio, li hazarde trovis iun Esperantan lernolibron, do li eklernis ĝin entuziasme. De tiam Esperantaj legaĵoj ĉiam akompanis lin.

Elkarceriĝinte, li fariĝis nedisigebla de Esperanto, malgraŭ la malglata vivovojo. En la pasintaj

Esperanto-Ĉinaj Vortaroj





Honfan

jardekoj, li venkis diversajn malfacilojn kaj dediĉis sian tutan energion al lernado, uzado kaj disvastigo de Esperanto.

“Nu, kiel vi volis kompili EĈV? Tio estas peniga afero.”

“La situacio tion postulas,” li kun rideto rakontis al mi sian ideon: En tiuj jaroj, la nombro de E-lernantoj estis ne dekoj, ne centoj, sed miloj kaj dekmiloj, kiuj havis nur du vortarojn, nome “Nova Vortaro Esperanta-Ĉina” kompilita de ĈEL kaj “Plena Vortaro Esperanta-Ĉina” de s-ro Venlo Fon. La totala presnombro de la du vortaroj jam atingis 137 000 ekzemplerojn, kiuj ankoraŭ ne povis kontentigi la bezonon de la legantoj. La problemo kuŝis ne nur en la malsufiĉa kvanto de la vortaroj, sed ankaŭ en la amplekso, kiu ne povas kontentigi la bezonon de la situacio.

Li diris, ke jam antaŭ 20 jaroj li volis kompili laŭteman E-

vortaron, sed lia ideo ial ne realiĝis. Malgraŭ sia maljuna aĝo, li volis kontribui al Esperantomovado kiel eble plej multe. Li do malkaŝis sian ideon al Ĉen Jūan, vicprezidanto de ĈEL. Ĉen opiniis, ke oni pli urĝe bezonas Esperanto-ĉinan vortaron. Ĉen deziris, ke li plenumu ĉi tiun taskon. Honfan konsentis kaj tuj komencis la organizan laboron de ĉi tiu vortaro.

Nun la kondiĉoj por la kompilado multe diferencis de tiu antaŭ 40 jaroj, kiam Venlo Fon kompilis vortaron. Tiam oni havis nur tre malmultajn referencajn librojn, sed nun oni havas diversajn referencajn librojn, kiaj libroj enciklopediaj, ĉioampleksaj, fakaj, ĉinaj kaj alilandaj. Kompreneble, tio estas oportuna por la laboro, sed iafaje ankaŭ embarasas la kompilantojn, ekz., rilate la “ĉinajn naciojn” en la apendicoj de la vortaro, Honfan ne sciis kiel esperantigi 水族, unu el la 55 ĉinaj nacimalplimulto. En

“Moderna Ĉina Vortaro” kaj “Ĉina-Angla Vortaro”, oni literumis ĝin kiel *shuizu* (shui-nacio), sed Honfan trovis *suiizu* (sui-nacio) en aliaj materialoj. Antaŭ li estas du tradukaĵoj por unu sama nomo. Kiu estas ĝusta? Li skribis al pluraj departementoj por demandi. Nur dank’ al tio li akiris aŭtoritatan konkludon: oni devas esperantigi ĝin en *suj*-nacion. La similaj ekzemploj estas multaj.

La laborstilo de Honfan estis severa. Tio rememorigis al mi iun ofte uzatan frazon pri vortarokompilado de niaj antaŭuloj, t.e. “Oni hezitas tagdekojn por difini unu nomon.” Fakte Honfan uzis pli da tagoj por certigi iun tradukon.

Honfan ne estas elmontriĝema, sed iuj el liaj kunlaborantoj konigis al mi, ke en pluraj jaroj li ne ripozis en dimanĉo, nek alia feria tago, li preskaŭ neniam rigardis filmon. Eĉ en la Printempa Festo li sidis super la vortarokompilado. En 1984 kaj 1985 li laboris plej streĉe. Li devis ekzameni la tutan vortaron kun pli ol 40 000 artikoloj. Li ne vane pasigis eĉ unu minuton. Lia edzino diris al mi, ke tre malfrue li enlitiĝis. Kelkfoje li, enlitiĝinte, leviĝis por ŝanĝi ion en la vortaro. Ĝuste estis lia bonkora edzino, kiu tre bone prizorgis lin en la vivo, kiam li sin okupis pri la kompilado.

El tio oni scias, ke Honfan ŝuldas sian energian laboron eĉ en la maljuna aĝo ĉefe al sia profunda amo al Esperanto. Lia firma spirito en la laboro rezultis el lia

Membroj de la Esperanto-kurso de la Uhan-a Universitato en 1946. La kvara de dekstre en la malantaŭa vico estas Honfan kaj la unua de dekstre en la sama vico estas Ĝang Ŝu, kiu funkcias nun kiel la ĉina ambasadoro en Japanio.



eksterordinara vivovojo. Elkarceriĝinte, li tuj ekserĉis Esperantajn amikojn. Iutage, li trovis Esperantan gazeton "Heroldo de Ĉinio" en iu librejo de Ĉongĉing. Li kun granda ĝojo tuj skribis al la redakcio de la gazeto kaj, ricevinte respondon, li senprokraste ekkontribuis al la gazeto.

En 1939, la Ĉongĉing-aj esperantistoj fondis Korespondan Esperanto-Lernejon, kiun li ofte vizitis kaj tie faris ion. Poste la lernejo translokiĝis en kamparon kaŭze de la bombado de japanaj agresantoj. En 1942, Honfan forlasis sian postenon kaj eklaboris en la kampara Esp-lernejo. Li daŭre lernis Esperanton korektante la hejmtaskojn de la lernantoj. En 1945 post triumfo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, Honfan translokiĝis de Ĉongĉing en Nankinon. Tie li korespondis kun alilandaj esperantistoj per la

poŝta kesto de la Nankina Esperanto-klubo. Liaj leteroj estis tradukitaj en la japanan kaj ĉefan lingvojn kaj publikigis eksterlande.

En majo 1950, El Popola Ĉinio naskiĝis en Pekino. Kaj li eklaboris en la redakcio de EPĈ. En ĝiaj unuaj jaroj estis nur kelkaj personoj, sed li kune kun siaj kolegoj faris la revuon viveca, vigla kaj tre alloga por la legantoj. Nur en 1979, li ekokupis sin pri la vortaro.

Je mia peto, Honfan konigis la karakterojn de EĈV. Li diris, ke ĝia amplekso estas granda. Ĝi kolektis vortojn de diversaj Esperantaj vortaroj plej alte taksataj kaj por ĝin kompili Honfan uzis multegajn materialojn.

EĈV enhavas 45 588 vortojn, el kiuj estas 18 295 radikoj kaj 27 297

kunmetitaj vortoj (inkluzive de derivaĵoj). En la vortaro krom ekzemplaj frazoj estas ankoraŭ granda kvanto da vortgrupoj, kio kontentigis la bezonojn de la legantoj.

Krome, ĝi donis grandan atenton al tenado de la fundamento de Esperanto kaj forigo de senutilaj vortoj. EĈV enkorpigis la stilon de ĉina Esperanto-vortaro.

La kompilado estis plenumita kaj Honfan kvazaŭ estis malŝarĝita. Sed kiam mi diris: "Tio estas vere malfacila," li kun rideto diris: "La vortaro jam eldoniĝis, sed mi ankoraŭ ne estas trankvila, ĉar certe ekzistas iaj mankoj kaj problemoj." Je adiaŭo de la prudenta kaj bonkora maljunulo, mi pensis en mi: "La ĉinaj esperantistoj certe dankos lin pro lia oferema kontribuo." ■

KORESPONDI DEZIRAS

- * Rĵo Usui, 27-j. pentristo, volas komenci ĵurnalon de poemoj, fabeloj kaj diversaj artoj aŭ revuon malgrandan en Esperanto. Tutmondaj artistoj kaj amatoroj bonvolu skribi al mi. Adr.: 2 Kume Taraki-ĉō, Kumagun Kumamoto, Japanio.
- * Pola infan-instruistino volas ekligi korespondadon kun veraj simpatiaj esp-istoj cele al daŭra amikeco aŭ eventuala geedziĝo. Fotoj prefere kunsendataj. Eva Kazimierzczak, Dzierzynskiego 20/108, 65-001 Zielona Gora, Pollando.
- * 14-j. pionirino dez. kor. kun knaboj. Adr.: Monika Keindl, Tala 2890, Kaziucbascikai u. 3/a, Hungario.
- * 13-j. Magyari Zsolt Sheorgheri dez. kor. tm. pri pm kaj animaloj. Adr.: Str. Bucinului

Nro. 19, Jud: Harghita Rumanio.

- * Nagy Akos, 17-j., dez. kor. kun adeptoj de "New Age" pri nova Ero-"NA"-muziko. Adr.: 4193 Ulies, Jud. Harghita, Rumanio.
- * Siberiaj esperantistoj dez. kor. kun ĉinaj gesamideanoj, interŝanĝi bk., pm., kaj E-aĵojn. SU-652870 Esperanto-Klubo, Mejdureĉensk-centr, Kemerovskaja obl., USSR.
- * 35-j. geedzoj dez. kor. kun bredistoj de hundoj chow-chow kaj pri aŭtoturismo. Jaromir Veverka, Běloveska 1672, 547 01 Nachod, Ĉeĥoslovakio.
- * Esperantistoj de urbo Norilsk serĉas gestudentoj-esperantistojn, kiuj volonte aranĝus amikecajn ligojn per Esperanto inter industria instituto de Norilsk kaj instituto de alilando. Adr.: USSR, 663301, u. Norilsk, Lenina Avenuo, d. 9-15"A", Esperanta Klubo "Norda Stelo".

- * Geesperantistoj de plej norda urbo Norilsk kun ĝojo korespondas kun samideanoj. Adr.: USSR, 663301, u. Norilsk, Lenina Avenuo, d. 9-15"A", Esperanta Klubo "Norda Stelo".
- * 17-j. fraŭlo dez. kor. kun 13-20-j. knabinoj pri ĉiuj temoj, nur el Svedio, Aŭstrio, FRG, DDR, Turkio kaj Jugoslavio. Nepre respondos. Adr.: Majid Jafari, Sarbaz Shahid, St. Bage Safa, Hassan Abad-Nr. 25, Tabriz-Irano.
- * 17-j. junulino dez. kor. tm. kaj interŝanĝi bk. Adr.: Annamaria Kallos, Str. Morii 5/A, 3280 Sing. de Padure, Jud. Mures, Rumanio.
- * S-ro Tar Robert kolektas E-librojn, insignojn, karate-librojn, revuojn, muzik-kasetojn. Certe respondos. Adr.: Hutira Dezideriu No 19, Baia Mare, Maramures, R-4800, Rumanio.

D-ro Josef Kondor kaj lia helpagado por lepruloj

En la redakcio de El Popola Ĉinio ni nomas d-ron Josef Kondor nia granda amiko, ne nur pro lia alta staturo, sed ankaŭ pro lia granda amikeco al la ĉinaj esperantistoj.

Antaŭ la 71-a UK mi neniam vidis d-ron Josef Kondor, tamen lia nomo ne estis fremda por mi, ĉar li estas malnova fervora leganto de EPĈ. Dum multaj jaroj li tenis rilaton kun la redakcio, ne ŝparante al ĝi sian varman subtenon per bonaj sugestoj kaj aliaj manieroj. Mi plurfoje aŭdis pri d-ro Josef Kondor ankaŭ de miaj kolegoj en Radio Pekino. Kiel entuziasma aŭskultanto de Radio Pekino, d-ro Josef Kondor ĝuas grandan respekton de la ĉinaj Esperanto-lingvaj parolistoj. Liaj leteroj kun amikaj vortoj sendube estas granda kuraĝigo al niaj samideanoj-parolistoj kaj uzataj de ili kiel gravaj atestoj por montri al la ĉina publiko la signifon de sia laboro kaj utilecon de la lingvo. Mi scias ankaŭ, ke d-ro Josef Kondor kaj lia edzino afable gastigis hejme ĉinajn esperantistojn, ke ili tie pasigis neforgeseblajn belajn tagojn tute senĝene.

Mi persone konatiĝis kun d-ro Josef Kondor kaj lia edzino post la fermo de la 71-a UK. Apenaŭ mi vidis ilin, mi forte altiriĝis de ilia afableco kaj bonkoreco. Dum la posta ekskurso al Jangzi-rivero ili ĉiam restis miaj plej fidindaj amikoj kaj donis al mi grandan helpon kaj konsilojn. Min forte impresis ankaŭ la fajra entuziasmo de d-ro Josef Kondor al la



D-ro Josef Kondor


ĉina loka Esperanto-movado kaj devokonscio pri propagando de nia lingvo. Kie ajn li estis, li kaptis ĉiun ŝancon por kiel eble plej multe kontaktiĝi kun ĉinaj samideanoj, precipe kun junaj komencantoj. Li per vervaj paroloj kuraĝigis ilin daŭrigi la lernadon de Esperanto kaj persisti en la lingvouzado. Li notis adresojn de multaj ĉinaj esperantistoj por poste korespondi kun ili. Li kuraĝigis ilin praktiki Esperanton en korespondado.

Legi leterojn de d-ro Josef Kondor estas vera ĝuo. Ĉiu lia letero estas plenplena, en ĝi ne troveblas spaceto blanka, eĉ surdorse de fotoj estas interesaj informoj aŭ klarigoj. Krom la sincera amikeco, ankaŭ la senditaj fotoj, gazet-eltondaĵoj kaj aliaj

materialoj multe larĝigis mian vidkampon pri la monda Esperanto-movado.

D-ro Josef Kondor ne nur estas entuziasma propagandanto de nia lingvo, sed ankaŭ servigas ĝin al la socio sekvante la homaranismon de d-ro L. L. Zamenhof. Tio estas lia helpagado por lepruloj per glumarkoj kun Esperanta teksto.

Antaŭ 30 jaroj la lernantoj de la germana Johannes-gimnazio en Lahnstein apud Koblenz, sub la gvido de patro Richard Ott, aktive partoprenis en la helpagado favore al la lepruloj. En 1973, kiam d-ro Josef Kondor komencis sian instruadon en la gimnazio, li estis forte altirita de la helpagado kaj volentis partopreni en ĝi laŭ sia eblo. En 1974 li aperigis la unuan serion da glumarkoj kun la



Esperantaj glumarkoj

surskribo en la germana lingvo kaj en Esperanto respektive "helft den Leprosen!" — "Helpu al la lepruloj!". De tiam li jam sukcesis aperigi 5 seriojn da glumarkoj.

La signifoplena iniciato de d-ro Josef Kondor vekis grandan eĥon inter la esperantistoj. Gravaj mondonacoj venis de Italio, Danlando k.a. Diverslandaj samideanoj volonte cirkuligas glumarkojn. Multaj personoj, precipe tiuj el nepagipovaj landoj, sendas pro tio valorajn poŝtmarkojn, sonbendojn, pupojn, geografiajn kaj historiajn bildlibrojn ktp. Dank' al la cirkulado de glumarkoj en la mondo dum la pasintaj 14 jaroj, li jam enspezis pli ol 60 000 DM favore al la lepruloj. Kun respekto

kaj dankemo multaj Esperantaj gazetoj kaj Esperant-lingvaj radiostacioj, inkluzive de nia EPĈ kaj Radio Pekino, raportis lian agadon. ... Modesta kaj konstanta ... fariĝis giganta!" Tio estas trafa resumo de "Espero Katolika" pri la laboro de d-ro Josef Kondor. Nun d-ro Josef Kondor atendas pluan helpon de niaj samideanoj. Mi kun plezuro prezentu ĉi tie lian adreson al niaj legantoj: Josef Kondor, alte Schloss-str. 25, D-5450 Neuwied 21-Engers, F.R. Germanio (poŝta konto 113726673 Ludwigshafen/Rhein), kun espero, ke ĉiam pli multaj homoj interesiĝos pri lia afero kaj sin turnos al li por kunlaboro. ■



KORESPONDI DEZIRAS

- * 15-j hungara lernanto dez. kor. kun samaĝuloj. Adr.: Gabrielo Vajola, Budapeŝto, Fegyvernek strato 8, 1116, Hungario.
- * Gelernantoj de Esperanto Grupo Paco kaj Frateco dez. kor. kun gesamideanoj tm.: S-ro Aril Simoes Coutinho 38-j., fizioterapista teknikisto, studento, interesiĝas pri turismo, vivmaniero, kutimoj kaj pm. Adr.: Rua Angelina, 103 F/102, 20. 750/Encantado, Rio de Janeiro/Brazilo. S-ino Jussara Guimaraes, 32-j flegistino, studento, interesiĝas

- pri kutimoj, vivmaniero turismo kaj pm. Adr.: Rua Moises Lilembaun, 73/301, 21. 360/Quintino, Rio de Janeiro/Brazilo.
- * Interŝanĝi monerojn kaj monbiletojn tm. de. instruisto Vjekoslav Pesut, Brestaca 184, Novska-41330, Jugoslavio.
- * 26-j. irana samideano dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj, ankaŭ kun muzulmanoj. S-ino Farshideh Arabshahi, 233 st. No. 3, st. ferdosi, Shahin-Shahr, Esfahan-Irano.
- * Beata Traczyk, ul. Obr. Westerplatte 3/4, 80-317 Gdansk, Pollando kaj Bozena Traczyk, ul. Korczaka 3/13, 82-540 Susz,

- Pollando dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj.
- * Ruda Magdalena, 16-j., dez. kor. tm. kaj interesiĝas pri rumanaj pm. Adr.: Str. Transilvaniei nr. 2, bl 4B op 30, cod 2775. Brad, Jud. Hunedoara, Rumanio.
- * Kiss Janos, 16-j., dez. kor. kun 14-15-j. knabinoj pri ĉiuj temoj, interesiĝas pri sporto kaj muziko. Adr.: 6800 Hodmezovasashely, Hodto u. 4. 2/7, Hungario.
- * A. Avamizadeh, 18-j. lernanto dez. kor. kaj interesiĝas pri bk., pm., kaj danco. Adr.: P.O.Box 396, Mahshahr, Irano.

NOVAJ ESP-ORGANIZOJ EN ĈINIO

Post duonjara preparo en la 23-a de marto fondiĝis la Filio de Ekonomio kaj Komerco kaj Junulara Filio de la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj. Ilia celo estas akceli internacian interŝanĝon en ekonomio kaj komerco kaj en scienco kaj kulturo kaj popularigi Esperanton en la sciencistaj rondoj.

La Baŭĝji-a Esperanto-Asocio de Ŝenŝji-provinco kaj la Zibo-a Esperanto-Asocio de Ŝandong-provinco fondiĝis en marto kaj aprilo respektive. Respondecoj de la lokaj Federacioj de Sociaj Sciencoj ĉeestis la fondkunvenojn. La radiostacioj, televid-stacioj kaj ĵurnaloj de ambaŭ urboj raportis pri tio.

USONA KONSULO VIZITIS ESP-ASOCION

S-ro Lawrence A Walker, usona konsulo en Ŝenjang, Ĉinio, akompanate de sia asistanto s-ro Jin Ĉing'u vizitis la Ljaŭning-an Esperanto-Asocion. Ŭang Ĵenhu, asistanto de la ĝenerala sekretario

S-ro Ŭang Ĵenhu surbrustigas al s-ro Lawrence A Walker Esperantan insignon.



de la asocio, varme akceptis la gastojn kaj konigis al ili la Esp-movadon en Ljaŭning-provinco kaj Ĉinio. La gastoj invitite rigardis la Esperantan televid-filmon "Simpligita Tajĝiĉjŭan-ekzerco". S-ro Walker eklernis Esperanton en la aĝo de 16 jaroj. Februare, leginte raporton pri la Esp-movado en Ljaŭning, li ekhavis la ideon viziti la Esperanto-asocion. La gastoj kaj gastiganto esprimis la deziron kune klopodi por akceli la interkompreniĝon kaj amikecon inter la esperantistoj de Ĉinio kaj Usono.

FORPASIS PROF. ŜECENCZ

Profesoro Ŝecencz, konsilanto de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj membro de la societo "Amikoj de Esperanto", forpasis de malsano la 12-an de aprilo en la aĝo de 81 jaroj. En 1929 li kune kun Joĉaŝien kaj Tikos fondis la Esperantan Asocion en Hankoŭ. En 1979 li kaj esperantistoj en Hubei-provinco starigis la Hubei-an Esperanto-Asocion. Li estis elektita kiel ĝiaj ĝenerala sekretario kaj konsilanto. En 1982 li kaj Tikos




Prof. Ŝecencz

funkciigis la Xinhua-an Korespondan Esperanto-Lernejon. Li estis ĝia estro. Por kulturaj talentulojn de Esperanto li klopodis funkciigi Esp-kurson en la fremdlingva fakultato de Centraĉinia Normala Universitato. Li kontribuis multe al la Esp-movado de Ĉinio dum dekoj da jaroj. Profesoro Ŝecencz funkciis kiel dekanato de la fremdlingva fakultato de la universitato kaj dediĉis sin al studado pri Ŭen Jidŭo, fama ĉina moderna poeto kaj erudito, kaj kreis verkojn kun pli ol 200 000 ideogramoj. Lia forpaso estas grava perdo de la Esp-movado de Ĉinio. Rerezentantoj de la Hubei-a Esperanto-Asocio, Hubei-a Scienca Asocio Esperantista, Wuhan-a Esperanto-Asocio kaj Xinhua-a Korespondanta Esperanto-Lernejo adiaŭis la restaĵojn de profesoro Ŝecencz kaj metis al ili florkronojn.

E-KURSO FUNKCIIGATA EN ALTLENEJOJ

En la Pekina Ferŝtala Instituto ekfunkciis marte E-kurso nedeviga, kiu daŭros unu jaron, po du horoj ĉiusemajne, kun partopreno de 40 lernantoj. Post ĉiu semestra ekzameno ili povas gajni du lernopontojn. Vicprofesoro Li Ŭejlun gvidas la kurson.

De la printempo ĉi-jare Esperanto estas instruata en la Nankina



Esperantistoj-invalidoj en renkontiĝo en 1987

Universitato. Funkcias du kursoj, kun partopreno de 150 studentoj. La sukcesintoj de la ekzameno povas gajni lernopontojn. La studentojn direktas profesoro Je Fengĝi kaj lektoro Cuj Ĝjanhŭa.

PORINVALIDA SEKCIO DE ĈEA FONDITA

Antaŭ tri jaroj fondiĝis la sekcio de esperantistoj-invalidoj de la Ĉeĥa Esperanta Asocio. Nun ĝi havas ĉ. 300 membrojn el la tuta ĉeĥoslovaka respubliko.

La ĉefa celo por la komitato de la sekcio estas lernigi Esperanton al ĉiuj siaj invalidoj. Pere de Esperanto ili ekkonas novajn amikojn el la tuta mondo. Ĉiujare oni aranĝas la tutŝtatan renkontiĝon inter la 1-7-a de novembro en Hodonin apud Kunŝtat.

Se la invalidoj el aliaj landoj volus ekkoni nian laboron, bv. skribi al: Sekcio de esperantistoj-invalidoj, PK 63, CS 274 01, Slany, Ĉeĥoslovakio.

TEATRA KONKURSO PLILONGIGITA

La Dua Konkurso por originala teatraĵo de EVA, kies limdato estas anoncita por la fino de aprilo ĉi-jara, plilongiĝas tiel, ke la limdato por la enveno de la konkursaĵoj estos la 30a de oktobro ĉi-jara. Ĉiuj aliaj kondiĉoj restas neŝanĝitaj.

La konkursaĵojn bonvolu sendi

al la konkursa sekretario: Spomenka Štimec, Nade Dimič 1, YU-41410 Velika Gorica, Jugoslavio.

PLENA ESPERANTO-PERSA VORTARO

Grupo da iranaj esperantistoj el diversaj fakoj ĉiusemajne kunsidis en Teherano por reviziado kaj fintraktado de la plej ampleksa Esperanto-persa vortaro, verkita de s-ro Aref Azari ekde 1987. La vortaro estas farita surbaze de PIV kaj plej fidele al ĝi. Oni jam laboris por ĝi 7 jarojn antaŭe. Post interrompiĝo dum pluraj jaroj ili denove komencis la laboron kaj

antaŭvideblas la baldaŭa sukcesa finiĝo de la fintraktado kaj eldoniĝo.

INFORMOJ EL GDR

1. En aŭgusto 1988 okazos la 8-a renkontiĝo de la membroj de la pionira organizado "Erust Thalmann" en la urbo Karl-Marx-Stadt en la sudo de GDR. Okaze de tiu renkontiĝo la porjunulara komisiono de GDREA alvokis por la partopreno en la internacia arta konkurso "Ni infanoj ŝatas la pacon" kaj "Gardu la pacon por la infanoj". Multaj pacamantoj-esperantistoj el la tuta mondo reagis kaj sendis belegajn librojn kaj pentraĵojn. Ankaŭ ekspozicio okazos en la renkontiĝo.

2. La ministro pri altlernejaj kaj faklernejaj aferoj de GDR la 1-an de februaro 1988 nomumis d-ron Detlev Blanke "honoraria docento" por interlingvistiko en Humboldt-Universitato de Berlin. Por tio la interlingvistika fako estas oficiale ligita al la sociscienca fakultato de la universitato. Post la Eötvös Lorand-Universitato en Budapeŝto, Humboldt-Universitato en Berlin estas la dua en la mondo, kiu enkondukis interlingvistikon en la rangon de docenteco. ■

S-inoj Solat kaj Ahmad Nia kaj s-roj Azari kaj Mamduhi en reviziado de la Plena Esperanto-Persa Vortaro (de maldekstre)



Tri fabloj

Hakilo-perdinto

Estis homo, kiu perdis hakilon. Li suspektis, ke filo de najbaro ŝtelis ĝin. Li atente rigardis la junulon kaj trovis, ke li aspektas kiel ŝtelinto ĉu en irado, ĉu en mieno, ĉu en parolado. Ju pli li rigardis, des pli li konfirmis sian suspekton. Ĉio ĉe la filo, ago, parolo, ĝojo kaj malĝojo, suspektigis, ki li ŝtelis la hakilon.

Post nelonge li retrovis la hakilon en sia kelo. Li denove rigardis tiun junulon kaj trovis lin honesta en ĉio, ĉu aspekto, ĉu parolo, ĉu rido. ■

Maljunulo apud vojo


Apud vojo loĝis maljunulo. Li nomis sian knabo-serviston "Batemulo" kaj sian hundon "Mordemulo". Gastoj ne kuraĝis viziti lin en lia domo dum tri jaroj. Ili timis, ke ili estos batitaj kaj morditaj.

La maljunulo ne komprenis la strangaĵon kaj demandis al la gastoj, kial ili ne vizitis lin. Ili diris al li la veran kaŭzon. Aŭdinte tion, la maljunulo tuj ŝanĝis la nomojn de la servisto kaj hundo. Kaj gastoj komencis viziti lin unuj post aliaj. ■

Malfacila imitado

Antaŭ tre longe iu homo diris al sia filo: "Vi devas lerni de via instruisto paroli kaj agi."

Foje, la filo manĝis kune kun la instruisto kaj imitis ĉion de li. Kiam la instruisto prenis manĝa-



jon, ankaŭ la lernanto tion faris; kiam la antaŭa trinkis, ankaŭ la lasta faris la samon; kaj kiam la antaŭa sin turnis, ankaŭ la lasta imitis lin. Vidinte tion, la instruisto ne povis sin deteni de

ridego kaj eklernis. Tiun ĉi movon la lernanto ne povis imiti kaj riverencis antaŭ sia instruisto, petante de li pardonon: "Sinjoro instruisto, tiu ĉi movo estas tre malfacile imitebla por mi!" ■

Horaro de la Ĉiutaga Esperanta Disaŭdigo de Radio Pekino

UTC	Al Regionoj	Ondoj (m)	kHz
20:00-20:30	Eŭropo	40.1	7470
		32	9365
		30.1	9965
22:30-23:00	Latin-Ameriko	31.15	9630
		26.05	11515
11:00-11:30	Japanio, Koreio	31.64	9480
		43.13	6955
13:00-13:30	Sudorienta Azio	25.75	11650
		19.78	15165

Universitato en ĝusta tempo

En Hajdjan-distrikto, Pekino, amasiĝas altaj lernejoj, kiaj la famaj Pekina Universitato, Ĉinghŭa-universitato kaj Ĉina Popola Universitato. Oni ne atendis, ke ja tie, inter la famaj altaj lernejoj, antaŭ kvar jaroj aperis la aparta universitato — Poreksterula Universitato de Hajdjan-distrikto (en mallongigo, Hajdjan-universitato). Je la komenco iuj kaj zorgis pri ĝia estonteco kaj admiris la kuraĝon de ĝiaj fondintoj. Nun diplomitoj el tiu universitato estas aparte bonvenaj al multaj dungantoj-organizoj.

Dum vizito al la universitato mi kiel raportisto informiĝis pri ĝia malglata vojo.

KURAĜO KAJ KLARA VIDO

Direktoro de la universitato Fu Ĝengtaj estas unu el ĝiaj fondintoj. Antaŭe li estis vicprofesoro de Ĉinghŭa-universitato. Kiam mi intervjuis lin en lia oficejo, li prezentis, ke la universitato funkcias sub la aŭspicioj de la registaro de Hajdjan-distrikto, kaj ĝia lernotempo estas tri jaroj. La ŝtato agnoskas la kvalifikitecon de ĝiaj diplomitoj, sed ne asignas al ĝi monon, nek respondecas pri la dungigo de ili. Krom malmultaj funkciistoj, plejparto de la instruistoj estas engaĝita el Ĉinghŭa-universitato, la Pekina Universitato kaj Ĉina Popola Universitato. La studentoj pagas la tutan

koston por sia studo sen ricevi ian ajn subvencion de la ŝtato kaj loĝas ekster la lernejo. Diplomitoj estas rekomendataj al dungantoj-organizoj, kiuj devas pagi al la universitato “kulturad-koston” de 2 000-6 000 jŭanoj por ĉiu diplomito.

Kiam mi demandis, kial li funkciigas la universitaton, li diris, ke unue, inspirate de la alta tajdo de reformado tra la lando, li deziras per eksperimento trovi rimedon nuligi la malavantaĝojn de la nuna eduka sistemo kaj malfermi novan vojon tiurilate. La malavantaĝoj de la nuna eduka sistemo speguliĝas en la ĉiufanka prirespondeco. Funkciigante lernejon, la ŝtato devas prirespondi pri manĝado kaj loĝado de ĉiuj funkciistoj kaj lernejanoj, kaj pri dungigo de la diplomitoj. Tio perdigas al la mallaboremaj instruistoj krizkonscion kaj al la kapablaj, iniciatemon; ankaŭ la lernantoj ne scias domaĝi studkondiĉojn. Ŝajnas al ili, ke ĉio devas esti tia. Kelkiam ili eĉ grumbas pri iaj nekontentigaĵoj. Due, li aldonis, la universitato funkcias laŭ la bezono de la socio. La nun ekzistantaj altaj lernejoj en Ĉinio neniel povas kontentigi la bezonon de la landa modernigo al klerigitaj personoj. Krome, pro diversaj kaŭzoj, la nunaj oficialaj altaj lernejoj ne povas plene utiligi sian latenton por grandigi sian akceptadon. Tial, multaj sci-soifantaj junuloj ne povas viziti altajn lernejojn. Ĝuste pro ĉio ĉi tio venis al li en la kapo ideo

Direktoro Fu Ĝengtaj



fondi novtipan lernejon.

Tio tamen pruviĝis malfacila afero. Li kaj liaj kolegoj frontis al diversaj malfaciloj: mankis mono, instruistoj kaj domoj. Multaj amikoj maltrankviliĝis pri ili. Ili tamen opiniis, ke malgraŭ multaj malfaciloj ekzistas ja favoraj kondiĉoj. Ĉar la funkciigo de la lernejo konformas al la postulo de la reformado en nia socio, kaj al la bezono de konstruo de nia lando kaj tiu de sci-soifantaj junuloj, ĝi certe estos vaste subtenata de la publiko. Ili kredis, ke la malfaciloj estas venkeblaj, se nur ili kuraĝas esplori kaj praktiki. Antaŭ ĉio ili devus kuraĝe ekpaŝi.

TRAVADO EN MALFACILOJ

Oni prezentis, ke Hajdjan-universitato ekfunkciis per prunteprenitaj 50 000 jŭanoj kaj 5 luitaj elementlernejaj klasĉambroj. La unua afero por la studentoj estis alporti malnovajn tablojn kaj seĝojn el la najbara Ĉina Popola Universitato. Por ŝpari monon, la direktoro ĉiam biciklas kaj neniam aŭtadas pro oficlaboro. La studentoj studas je sia propra elspezo, tamen multaj ne povas pagi la sumon de 700 jŭanoj por ĉiu semestro. La universitato permesas, ke ili pagu nur malgrandan parton de la sumo, dum ĝi pagas la restan parton por ili, kiun poste kovros iliaj dungantoj. Tamen de kie akiri tiom da mono por pagi por studentoj, kiam la ŝtato ne asignas monon? La mono venas de kolekto de mondonacoj el publiko aŭ la antaŭpagita kulturad-kosto de komisiitaj studentoj. En 1986, en ĝi lernis la studentoj de ĉiuj tri lernojaroj, sed ankoraŭ neniu studento diplomitiĝis, kaj tiel kulturad-kosto ne povis veni. La novaj lernojaroj estis komencigontaj; la universitato havis nenian rimedon krom akcepti komisiitajn kandidatojn ekster la plano, tiel ĝi havigis al si ĉ. 400 000 jŭanojn kaj solvis la malfacilon en monrimedoj.



Studentoj en leciono


Ankaŭ manko de domoj prezentiĝas grava problemo. Ĉiujare la universitato akceptas novajn studentojn, ĉiujare peze pendas super ĝi la zorgo pri dommanko. Iujare klasĉambroj ankoraŭ ne estis luitaj kiam la studentoj estis jam akceptitaj; la universitato devis praktiki sistemon de po-duontaga leciondono, t.e., la malnovaj studentoj havis lecionojn posttagmeze, kaj la novaj antaŭtagmeze. Pro manko de domoj, la fako de ekonomia administrado, fako de natur-scienco kaj teknologio kaj fako de orienta saniga arto (fako de *ĉigong-o*) de la universitato devis havi siajn lecionojn en tri lokoj kun grandaj distancoj inter si.

Kvankam Hajdjan-universitato apartenas al la kategorio de faka lernejo, ĝi tamen ampleksas fakojn de socia scienco, natura scienco, teknologio kaj medicino. Tial ĝi bezonas diversfakajn instruistojn. La universitato sendis homojn al multaj lernejoj preni lecionojn, por elekti el ili


instruistojn. Ĉar la universitato je la komenco ĝuis malgrandan famon, oni devis venigi instruistojn per pacienca persvado. Sed malgraŭ tio, la universitato garantias la kvaliton de instruado per la regulo, ke maldungiĝas la instruisto, kiu ne bone faras instruadon kaj ne plibonigas sian laboron post kiam la universitato metis al li postulon. Tiel ĝi posedas instruistan vicaron el 200 lektoroj kaj 150 profesoroj kaj vicprofesoroj.

FRAPAJ APARTECOJ

Hajdjan-universitato havas siajn proprajn apartecojn. Ĝi elkulturas kapablulojn per kolektita mono; ĝi per granda rekompenco altiras eminentajn instruistojn el famaj universitatoj kaj formas sian fortan vicaron el instruistoj per utiligo de alies latentio. Ĝiaj studentoj sentas premon en si kaj havas krizkonscion. Ĉar ili studas je sia propra elspezo, se ili ne bone lernos kaj pro tio ne diplomitiĝos, ili do sentos sin kulpaj antaŭ siaj



Instruistino kaj studentinoj



Matena lernado de ĉigong-o

gepatroj, kiuj subtenas ilian lernadon. Krome, ĉar ĝi estas novtipa lernejo, ĝia famo ne estas komparebla kun tiu de aliaj lernejoj; por sukcesigi diplomitiĝon kaj dungitiĝon, oni devas diligente studi kaj per sia propra forto konkuri kun aliaj homoj. Tiel enkondukiĝas konkuremo en

la klasĉambrojn.

La universitato kulturis siajn studentojn laŭ linio multe malsama ol aliaj lernejoj. Nun multaj altaj lernejoj kulturis siajn studentojn por ke ili surgrimpu la pinton de scienco. Tiuj studentoj havos la eblon inventi novajn teknikojn, tamen mankas per-

sonoj, kiuj aplikas la novajn teknikojn en praktika produktado. Hajdjan-universitato metas grandan atenton sur kulturadon de praktikaj kapabloj de la studentoj. Eksperimentoj de diversaj fakoj kaj ties aranĝoj, kaj eĉ solvendaj problemoj de la universitato ĉiuj estas taskitaj senrezerve al la studentoj. Plejmulto de la diplomitoj dungitiĝos en baznivelaĵoj organizoj, en mezgrandaj kaj malgrandaj entreprenoj kaj agentejoj, kaj ne en fakoj pri teorio de avangardaj sciencobranĉoj.

Alia grava aparteco de la universitato estas ĝia facile adaptebla fak-aranĝo. Tio estas ankaŭ unu el la bazaj kaŭzoj de ĝia ekzisto, evoluo kaj konkurso. Ĉar ĝi havas kompare grandan memstaran rajton decidi siajn aferojn kiel instru-enhavo, eduk-celo k.a., ĝi povas funkciigi fakojn, kiuj mankas en la socio sed estas urĝe bezonataj de ĝi. Kiam ĝi trovas, ke iuj fakoj antaŭe neatentataj fariĝis atentataj en la socio aŭ ke ekzistas mankoj en iuj fakoj, ĝi tuj rearanĝos, reduktos aŭ aldonos fakojn. En 1984, laŭ bezono de la socio, ĝi ekfunkciigis 8 fakojn, kiaj la fakoj de sekretarieco kaj oficeja aŭtomatigo, industria administrado, kontakto, bibliotekologio, industria kaj civila konstruado, kaldronega inĝenierado k.a. Sed kiam ĝi akceptas novajn studentojn en 1985, ĝi ĉesis funkciigi la fakojn de industria kaj civila konstruado kaj bibliotekologio, ĉar en multaj lernejoj jam funkciis tiaj fakoj. Anstataŭe ĝi ekfunkciigis fakojn de planizita statistiko, hotela kaj turisma administrado, pitoreskeja konstruado, provizo per akvo kaj drenado kaj media protekto, elektronika teknologio, komputila programo k.a. En 1986 la antaŭe multe atentata fakoj de industria kaj civila konstruado jam fariĝis neatentata, ĝi tuj denove funkciigis ĝin, kaj ŝanĝis la bibliotekologian fakon en fakon de biblioteko kaj librodisonado.

En 1987 ĝi laŭ bezono de la socio refoje ne funkciigis la du fakojn, kaj aldone funkciigis la fakojn de internacia financo, ĉina gastro nomio, juro, kaj *ĉigong*-o (orienta saniga arto). La lasta fako estas la ununura inter la nunaj ĉinaj altaj lernejoj. La ĉina *ĉigong*-o ĝuas famon tra la mondo, sed tre malmultaj homoj studas la teorion koncerne ĝin. Tian fakon, bezonatan de la socio, ĝi havis la kuraĝon starigi.

En dungigo de siaj diplomitoj. Hajdjan-universitato la unua praktikis du-direktan elekton kaj pagigan rekomendon. Laŭ regulo la universitato permesas al la dungantoj-organizoj veni al la universitato kaj rekte elekti diplomitojn. La organizoj dungontaj diplomitojn devas pagi al la universitato sumon da kulturad-kosto laŭ malsameco de fakoj, por ke la universitato vivtenu sin. La diplomito devas labori almenaŭ kvin jarojn por sia dunganto sen peti transposteniĝon, alie la diplomito devas kompensi la perdon. Post kvin jaroj la diplomito povas transposteniĝi laŭ koncernaj ŝtataj politikoj; por garantii la kompetentecon de diplomitoj, la universitato difinis, ke en la provtempo de duonjaro oni povas resendi al la

universitato tiujn, kiuj havas gravajn mankojn sen forlaso post eduko, la universitato siaflanke redonas la kulturad-koston. Iu diplomito el la fako de industria administrado dungita de eldonejo estis resendita al la universitato pro sia manko de devokonscio pri laboro kaj sendisciplinemo. La pacienca kaj serioza eduko de la universitato lin progresigis. Poste li estis dungita de alta lernejo, kie per sia bonkonduco li estis bonvenigata.

“KONTENTECO” KOVRAS PAGON


El la intervjuo mi informiĝis, ke en 1987 dum “senpage rekomenditaj” diplomitoj de pekinaj altaj lernejoj pro iaj kaŭzoj estis resenditaj al la lernejoj, kie ili atendis rerekomendon, enoficiĝis ĉiuj 227 diplomitoj de Hajdjan-universitato. Por ĉiu el ili oni devis pagi 2 000-6 000 jŭanojn da kulturad-kosto.

En la pasinta jaro kvankam la diplomitoj el Hajdjan-universitato ankoraŭ ne faris rimarkindan sukceson, tamen preskaŭ ĉiu el ili povis sendepende plenumi sian taskon. Hoŭ Jan, diplomitino el la fako de kontado, enoficiĝis en la kontfako de la Hajdjan-distrikta

Kompanio de Loĝeja kaj Biena Ekspluato. Ŝi montris sin sentima antaŭ amaso da fuŝaj kontolibroj. Ŝi per lerta tekniko rapide ordigis la kontojn. Feng Jŭe kaj Hŭang Hongŭej el la fako de industria administrado, nelonge post enoficiĝo en la Lubrikaĵa Kompanio “Granda Muro”, starigis por la kompanio administradan regularon praktikan kaj bon-efikan. Tiaj ekzemploj abundas. Mi vizitis kelkajn dungantojn de la diplomitoj de la universitato. Estro de iu dunganto-organizo diris: “Ni volonte akceptas diplomitojn el Hajdjan-universitato. La monsumo por kontenteco estas paginda!”

Ĉe la adiaŭo funkciistoj de la universitato informis min, ke oni estas preta funkciigi kompaniojn kaj malgrandajn fabrikojn. Krom antaŭa rimedo subteni lernejon per pago el studentoj, oni nun aldonas novan vojon subteni la lernejon per entreprenoj. Kiam kolektiĝos pli da mono, la universitato pligrandigos la nombron de studentoj, kiu kreskos de 1 600 al 5 000-6 000. Funkcios fakultatoj pli urĝe bezonataj, pli facile adapteblaj kaj pli ampleksaj. Ĝi havos siajn domojn. Ĝi posedos pli okulfrapajn apartecojn. ■

Marŝkanto



1. Geedziĝ-registrejo

2. Ginekologia kaj obstetrika hospitalo

Ĉinaj kuracistoj sur la tegmento de Afriko

130 km oriente de Adis-Abebo, ĉefurbo de Etiopio, troviĝas malgranda monturbo Dabra Berhan, kiu signifas brilan lumon en la tiea lingvo.

Komence de 1986 medicina taĉmento el 15 ĉinaj kuracistoj venis al la urbeto hospitalo en Dabra Berhan kaj komencis tie labori kaj vivi.

MALTRANKVILO PRO LA PACIENTOJ

Etiopio en la nordorienta parto de Afriko estas altebenaĵa lando, kiu meznombre altas 2 500-3 000 metrojn super la marnivelo kaj estas nomata tegmento de Afriko. La hospitalo Dabra Berhan estas malgranda hospitalo nur kun 40 malsanulaj litoj. Tie la instalaĵoj estas simplaj, medikamentoj ne sufiĉas kaj ofte interrompiĝas elektra kaj akva provizado. Vicministro de la Etiopia Higiena Ministerio diris, ke ĝi fakte estas kuraca stacio. Ĝuste sub tiaj kondiĉoj la ĉina medicina taĉmento kuracis 90 000 patientojn, savis pli ol 1 000 krizajn malsanulojn kaj faris 1 300 operaciojn. La laborkvanto farita de ili egalas al tiu de mezgranda hospitalo en Ĉinio kun 200-300 malsanulaj litoj.

Utiligi la lokajn kondiĉojn kaj plibonigi la ekipaĵojn de la hospitalo estas ilia grava rimedo sukcese fari kuracadon. Operacia flegistino Jang Lin kaj anesteziisto Li Ŭejdong ordigis kaj ekipis la operaciejon kun sola simpla operacia stablo por iuj instrumen-

toj, por ke ĝi estu konforma al la fundamentaj postuloj de operacio. Kuracistoj tie faris cezaran operacion, kraniotomion kaj mamkanceran operacion. En duonjaro ili savis 300 krizajn malsanulojn. Dank' al siaj spertoj, tekniko kaj nobla konscienco, anesteziisto riske faris anestezon sen anesteza aparato por garantii normalan iradon de la operacioj. Iuj operacioj estis plenumitaj sub la kondiĉoj sen sang-transfuzo kaj oksigen-inhalo. Iu knabo suferis de serioza anemio. Por lin savi la sola rimedo estas sang-transfuzo. Ĉinaj kuracistoj kaj flegistinoj alterne injektis al la knabo sangon per 10-ml-injektilo, dank' al kio la knabo estis elsavita.


Vespere de la 14-a de novembro, 1986, ambulanco rapide flugis al la hospitalo kun urĝa hupado portante aŭtoakcidentan suferinton Bell Hegel. Diagnozo montris, ke lin trafis aperta frakturo ĉe la dekstra kruro kaj ĝi senĉese sangis. Lia dekstra femuro kaj maldekstra antaŭbrako suferis de ferma frakturo. Li suferis de ventrodoloro ĉe premo kaj senĉese ĝemis. Lia sangpremo estis nur 80/60 mm. Ĉina kuracisto, Li Deming kaj Sun Gŭangŝing diagnozis, ke li suferas de grava sinteza vundo, kaj la tempo ne permesis transigi lin al alia hospitalo. La hospitalo kvankam ne havis necesajn instalaĵojn por transfuzi sangon, tamen devis fari tujan savon. Kun intima kunlaboro de antesteziisto kaj operacia flegistino la du kuracistoj faris

vundordigon kaj internan fikson de aperta ostarompiĝo kaj eksteran fikson de ferma frakturo, tranĉis la abdomenon kaj riparis liajn fenditajn maldikan inteston kaj mesoenteron. La operacio daŭris ĝis la 3-a de la sekvanta mateno.

Post du semajnoj doktoro Li faris al la patiento internan fikson de ferma frakturo kaj la patiento estis elsavita de danĝero. Kun larmoj li kortuŝite kisis la ĉinan kuraciston je la mano.

Tie la ĉinaj hirurgoj ofte akceptis tiajn patientojn de komplika kaj grava traŭmato. La tro simplaj kurac-instalaĵoj ofte pliĝis malfacilojn de la kuracistoj, sed la transigo al alia hospitalo certe kaŭzos morton survoje al la

Bebo savita



pacientoj. Ĉinaj ĥirurgoj do faris ĉion eblan por savi ilin, se ankoraŭ estas ebleco. Multaj gravaj malsanuloj estis tiel elsavitaj el morto.

PACIENTOJ VENINTAJ DE FORAJ LOKOJ

Oficisto de Novaĵ-Ministerio de Etiopio kune kun sia tuta familio venis de malproksima urbeto al Dabra Berhan, kie ĉinaj kuracistoj faris tri operaciojn por liaj patrino kaj frato. Iu paciento kun anomaliaj piedoj estis kuracita en hospitalo de alia urbo, ĉesigis sian kuracadon, elhospitaliĝis, aeroplane flugis al Dabra Berhan por ke la ĉinaj kuracistoj faru al li ortopedion.

Etiopio havas 14 provincojn. Venis al la ĉina medicina taĉmento en Dabra Berhan pacientoj el 10 provincoj por peti kuracadon, iuj pacientoj eĉ venis el Saudi-Arabio, Araba Jemeno, Demokratia Jemeno, Ĝibutio, Kenjo kaj aliaj landoj.

Ili preferis fari longan veturon por viziti la ĉinajn kuracistojn, pro tio, ke la seriozeco kaj altnivela kuracarto de la lastaj ĝuas tie vastan famon.

Ginekologi-obstetrikaj kuracistinoj dum sia savo de akuŝantinoj kaj novnaskitoj ofte trovis, ke asfiksio okazas al la novnaskito. Ĉar en la hospitalo ne estas porsavaj instalaĵoj, do ĉinaj kuracistinoj Hu Junbo kaj Ĝaŭ Hongjing riskis infektigon de viruso kaj faris artan spiradon etendante sian buŝon al la buŝo de novnaskito, sekve de tio, sango, fekaĵo kaj aliaj malpurajoj makulis la brakojn de la kuracistinoj.

Okulisto Ĝaŭ Deŭan kuracis 11 mil malsanulojn per ĉina kaj okcidenta kuracmetodoj en kombino kaj revidigis centojn da blinduloj suferantaj de katarakto, glaŭkomo kaj atrofio de optika nervo.



Diagnozo

Akupunkturistino Jan Fang kuracis 25 000 diversajn malsanulojn per siaj pingloj kaj 85% de ili ricevis iagradan efikon. El Adis-Abebo venis 8-jara knabo suferanta de sekvaĵo de encefalito jam 6 jarojn. Lia dekstra mano suferis de spasma kaj lia dekstra kruro estis valga. Li parolis malklare. Li fundamente resaniĝis post 2-monata akupunkturado far doktoro Jan. Lia patro, oficisto de la Etiopia Aviada Kompanio, speciale alveturis por esprimi sian koran dankon al d-ro Jan.

DAŬROS LA KUNLABORO

En Dabra Berhan la ĉinaj kuracistoj devis venki diversajn malfacilojn kaj en la kuracado kaj en la ĉiutaga vivo. Pro manko de oksigeno sur la altebenaĵo, ĉe la komenco de sia laboro ili suferis de sufokado kaj eĉ sendormeco. La hospitalo ne havis veturilon kaj mankis al ĝi legomoj kaj viando. La kuracistoj eĉ ne povis elsendi leterojn aliloken pro malfacilo en trafiko. En pluvo, vento kaj arda suno ili devis piediri de la loĝloko al la hospitalo por kuraci malsanulojn. Tamen ili vivis

optimisme por plenumi sian internaciisman devon.

La ĉinaj kuracistoj estas laŭdataj de la registaro kaj popolo de Etiopio dank' al sia eminenta laboro. Informiĝinte pri la forveturo de la ĉina medicina taĉmento, ili foje refoje esprimis sian sinceran esperon, ke daŭros la kuraca kunlaboro.

Oni diris, ke tio estas komuna deziro de la popoloj de tiuj landoj kaj regionoj, kie laboras ĉinaj medicinaj taĉmentoj. De 1963 ĝis hodiaŭ Ĉinio sendis entute 10 000 medicinajn laborantojn al aliaj landoj de la tria mondo, ili kuracis 170 milionojn da malsanuloj por 51 landoj kaj regionoj. Nun eksterlande laboras pli ol 1 300 ĉinaj medicinaj laborantoj, kiuj laboras en pli ol 100 kuracpunktoj de 49 landoj de Azio, Afriko, Latin-Ameriko, Suda Pacifiko kaj Mediteraneo. ■



Korpo-sanigaj metodoj (II)

OKULOJ

1. Kuŝu surdorse, profunde spiru kvin fojojn, direktu la piedfingrojn supren dum la enspirado kaj malsupren dum la elspirado. La ofta ekzercado povas kuraci hemiplecion kaj doloron ĉe la talio kaj dorso kaj vigligi la funkcion de la oreloj.

2. Frotu la manojn ĉe tagiĝo kaj metu ilin sur la okulojn por varmigo. Faru la ekzercadon tri-foje. Poste fingre masaĝu samtempe la internajn okul-angulojn kaj poste la eksterajn okul-angulojn. Tio povas igi la okulojn viglaj, klaraj kaj imunaj kontraŭ malsano.

3. Kuŝu, profunde spiru tri-foje kaj knedu muskolojn de la nuko kvin-foje. Tio povas igi la okulojn klaraj. Kuŝu surdorse, etendu la kapon antaŭen, levu supren la kapon kaj kolon tri-foje kaj pinĉu muskolojn de la nuko kvin-foje. Tio povas kuraci malsanon de la okuloj.

4. Sidu, etendu la maldekstran gambon, fleksu la dekstran genuon kaj premu la dekstran kruron sur la maldekstran genuon en daŭro de kvin profundaj spiroj. Tio povas faciligi pulman spiradon, forpeli ventan malvarmiĝon

kaj fari la okulojn pli klaraj.

5. Sidu, etendu la maldekstran gambon, brakumu la dekstran genuon, laŭeble rektigu la talion kaj forte enspiru sep-foje (alpremu la brakumitan genuon al la brusto dum la enspirado kaj etendu la dekstran kruron dum la elspirado). Tio povas faciligi movadon de la malsupraj membroj kaj kvietigi doloron ĉe la kruroj.

6. Sidu kun rekta talio, enspiru malrapide kaj profunde, pinĉu la nazon per dekstraj fingroj, duonfermu la okulojn kaj elspiru malrapide per la buŝo. Tio povas kuraci obskuron kaj larmemon de la okuloj, polipon de la nazo, surdecon, febron kaj kapdoloron. La efika ekzercado karakteriziĝas per ŝvitado.

NAZO

1. Sidu kun vizaĝo al la oriento. Faru tri spirhaltojn, frotu la nazlobojn. Tio povas kuraci nazajn malsanojn kaj piedan ulceron, redukti mukon kaj faciligi spiradon tra la nazo. La ofta ekzercado povas akriĝi flaron.

2. Sidu kun kunmetitaj genuoj kaj disigitaj kruroj, kiel en la bildo 1. Enspiru kaj tenu la spirhalton.

Faru la ekzercadon kvin-foje. Tio povas kuraci nazan furunkon.

ORELOJ

1. Sidu sur planko, kun krucitaj kruroj, etendu la brakojn sub la genukavojn, klinu la kapon kaj metu la krucitajn manojn sur la nukon. Tio povas kuraci orelan frostiĝon kaŭzitan de longa malvarmo kaj altigi la aŭd-povon.


2. Metu la piedojn sur la nukon, kiel en la bildo 2. Enspiru malrapide kaj profunde kaj elspiru milde post la spirhalto. Faru la ekzercadon 12-foje. Tio povas kuraci daŭran malvarmon, surdecon kaj vertiĝon. Se vi volas fortigi vian korpon per tiu metodo, faru la ekzercadon 30-foje ĉiutage.

3. Kuŝu solflanke, forte alpremante orelon al la planko, kiel en la bildo 3. Enspiru malrapide, tenu la spirhalton kiel eble plej longe kaj elspiru malrapide. Faru la ekzercadon ses-foje. Tio povas kuraci surdecon kaj vertiĝon. Se vi estas surda je dekstra aŭ maldekstra orelo, kuŝu solflanke kun genuoj kunmetitaj, forte alpremante la malsanan orelon al la planko. La ofta ekzercado povas plibonigi la funkcion de la oreloj.


(Daŭrigota)



1



2



3

Lakpentraĵoj de Ĉinio

de ĜANG ŜIJAN*

La lakpentraĵo, ore brila kaj pompe kolora, havas luksan, gracian kaj imponan aspekton. Oni uzas naturan lakon, akaĵuarban lakon aŭ artefaritajn poliuretanan vernison kaj nitrovernison kiel ĉefajn materialojn kaj oran kaj arĝentan foliojn, konkon kaj ovoŝelon kiel akcesorajn materialojn, uzas bronson, penikon, pinglon, ŝtonon, smirgan paperon, lignokarbon kaj harojn kiel instrumentojn kaj aplikas apartajn teknologiojn por brosi modelan tabulon aŭ objekton per lako, por ke sur la lakita objekto aperu homfiguro, pejzaĝo, floro kaj birdo kun mirindaj linioj kaj pompaj koloroj.


La laka teknologio estas konsistiga parto de la antikva tradicia kulturo de Ĉinio. Jam en la neolitiko ĉinoj komencis uzi


lakon por ŝmire ornamaj objektoj. La plej frua lakpentraĵo estas sur splito de lukse ornamita muzikilo de la periodo de Militantaj Regnoj (475—221a.K.). Sur ĝia nigra fono ruĝe pentriĝis sceno pri ĉasado, kuirado, festenado, muzikado kaj dancado. La aŭtoro prezentis malsamajn vivecajn homfigurojn kaj socian vivon per simpla kolora pentrado. La ĉinaj antikvaj lakpentraĵoj plejparte estis ornamaĵoj sur lakaĵoj. Hazarde videblas sendependaj lakpentraĵoj. Unu el ili estas kolora lakpentraĵo sur lignotabulo trovita en tombo de la Norda Ŭej-dinastio (386—534). Ĝi prezentas diversperiodajn virinojn, kun linioj striktaj kaj fortaj. Samtempe kun la supre menciitaj lakpentraĵoj, aperis konka mozaiko, pingla gravuraĵo, arĝenta filigrano sur lakaĵoj k.a.

Poste en la dinastioj Tang (618—907), Song (960—1279) kaj Ĵuan (1206—1368) aperis multaj novaj teknologioj. En Ming-dinastio (1368—1644) la laka teknologio atingis sian kulminon. Ekzistis diversaj metodoj, kies sinteza apliko aperigis variajn lakpentraĵojn. La tiama spegula bildo kiel ornamo sur skatolo prezentas la vivon de graciaj virinoj. La homfiguroj, arboj kaj balustradoj en la bildo estas delikate faritaj el konkaj inkrustitaĵoj. La lakpentraĵoj de Ĉing-dinastio (1644—1911) sekvis rutinon, sed nemalmultaj el ili estis raraj pro hereditaj tradiciaj teknologioj.

La lakpentraĵoj de Ĉinio havas longan historion, tamen prosperis nur en la lastaj 40 jaroj. Artistoj de la nova Ĉinio aplikis sian bonan teknikon al lakpentrado kaj per

En mateno (Lakpentraĵo)





La patrino de la universo (Lakpentraĵo)

tio esprimas sian amon al la naturo kaj vivo.

Ili uzas diversajn lakajn metodojn sur lignaj tabuloj, kio ebligas al la lakpentraĵoj sin liberigi de objektoj kaj ties praktika valoro kaj fariĝi nova speco de modernaj pentraĵoj de Ĉinio.

Dum verkado de lakpentraĵo oni povas prezenti novan temon per sama metodo, sed la modernaj ĉinaj lakpentristoj ofte ŝatas uzi plurajn teknologiojn por prezenti temojn pli variajn kaj buntajn, pli solenajn kaj ornamoriĉajn. En la 70-aj jaroj ĉinaj lakpentristoj verkis lakajn murpentraĵojn akordigantajn kun la moderna arkitekturo, ke iliaj graciaj kaj pompaj pentraĵoj kunfandiĝis kun la luksaj ornamaĵoj de modernaj konstruaĵoj. Tiam la ĉina lakornama teknologio rapide eniris la modernan vivon.

Krome, en apliko de la laka teknologio la modernaj ĉinaj lakpentristoj faris multajn sukcesajn provojn de teknologiaj materialoj kaj rimedoj kaj per tio alportis al lakpentraĵoj novan videfekon. Oni nun vaste uzas poliuretanon vernison en verkado de lakpentraĵo, kio mallongigas tempon por la verkado kaj faras la kolorojn pli brilaj. Lakpentristoj

de Tjanĝin prenas aluminian platon kiel modelan tabulon. Post korodo kaj koloril-plenigo la plato ricevas metalajn liniojn kaj

Laŭzi antaŭ pasejo (Lakpentraĵo)



surfacon. La metodo estas facila kaj konservas la efekton de la tradicia laka teknologio. Lakpentristoj de Ĝjangŝji faras drakajn kaj serpentajn haŭstriojn sur surfaco de stanfera lado, kiun oni prenas kiel modelan tabulon de lakpentraĵo. Lakpentristoj de Pekino faras diversan ŝmiradon sur modela tabulo kun alumina pulvoro per maldensigita kolora verniso kaj kreas verkon similan al tradicia tuĉpentraĵo. Ili ŝmiras ankaŭ aluminian paston sur pentraĵo, faras frotadon kaj ricevas efekton de skrapado kvazaŭ sur olepentraĵo. La kuraĝa provado de la ĉinaj lakpentristoj senĉese riĉigas la novan enhavon de siaj verkoj en la moderna belarta vivo de Ĉinio. ■

* La aŭtoro estas vicprofesoro de la Centra Belarta Instituto.

Peco de lakpentraĵo sur
luksa muzikilo de la
periodo de Militantaj
Regnoj





La unua renkontiĝo
de Li Bai kaj Du Fu,
grandaj poetoj de
Tang-dinastio (Nun-
tempa laka mur-
pentraĵo)






Homfiguro en la klasika romano "Songô en Ruĝa Buduaro" (Nuntempa gravurita lakpentraĵo)


Aŭskultado de muzikilludo (Nuntempa lakpleto kun perlamoto)



Ĉe Minĝjang-rivero (Nuntempa lakpentraĵo)

DE ĜENG SIŬLING





Ŝtona vojo en mont-
vilaĝo (Nuntempa lak-
pentraĵo) DE ĈJAU
ŜIGŬANG

Jongle Dadjan estas la plej frua kaj plej granda enciklopedio en la historio de la ĉina kulturo; ĝi estas ankaŭ la plej granda antikva enciklopedio en la mondo. Ĝi aperis en 1408, la sesa jaro de Jongle-erao de Ming-dinastio (1368-1644), tial oni nomas ĝin *Jongle Dadjan* (Dadjan ĉinlingve signifas grandan enciklopedion).

Tiun gigantan enciklopedion kompilis kaj interpunkciis pli ol 3 000 personoj dum 5 jaroj. Ĝi prenis materialojn el tiamaj 7 000-8 000 libroj, el kiuj la plej fruaj estis tiuj antaŭ 221 a.K., kaj la plej lastaj — tiuj de la frua Ming-dinastio. Ili estas konfucianismaj klasikaĵoj, historiaj libroj, verkoj de diversskolaj erudiciuloj, beletraj antologioj, budaismaj sutroj, taŭismaj klasikaĵoj, medicinaj verkoj, dramoj, popularaj rakontoj, libroj pri metiarto kaj agronomio, ktp. Ĝi havas entute 22 877 volumojn, inkluzive de 60 volumoj da enhavotabeloj kaj aranĝo-klarigoj. Bindita en 11 095 kajerojn, ĝi havas 370 milionojn da ideografiaĵoj. Tia grandskala kompilado kaj tia ampleksa enhavo estas malofte vidataj en la kulturhistorio de la mondo.

Ĝia enhavo-tabelo estas aranĝita laŭ rimoj de ideografiaĵoj. Estas donitaj prononco kaj signifo de ĉiu ideografiaĵo. Ĉiu kapvorto staras en kvar skribmanieroj, nome, la epigrafa stilo uzata ĝis Ĉin-dinastio (221-207 a.K.), stilo furora en Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.), regula kaj rapida stiloj. Laŭvice kolektiĝas ankaŭ materialoj pri astronomio, geografio, personuloj, okazintaĵoj, objektoj, sukaj esprimoj el prozaĵoj, kaj poemoj, kaj eĉ anekdotoj. Sub ĉiuj ĝiaj artikoloj troviĝas plenaj pecoj, ĉapitroj aŭ paragrafoj el originalaj materialoj, sen ajna tuŝo. Tial ĝi komplete konservas multajn klasikajn dokumentojn antaŭ 1368. 200 jarojn poste, dum Ĉjanlong-erao (1736-1795) de Ĉing-dinastio oni kolektis pli ol 500 perditajn

Jongle Dadjan — enciklopedio de antikva Ĉinio

de ŜI LJAŬ


verkojn el *Jongle Dadjan* en kompilado de *Si Ku Ĉjŭan Ŝu*, kolekto de konfucianismaj klasikaĵoj, historiaj eventoj, verkoj de diversskolaj erudiciuloj kaj beletraj antologioj.

Jongle Dadjan suferis je pluraj katastrofoj. Komence ĝin oni konservis en la biblioteko Ŭenĵuange de Nankino. Post kiam finkonstruiĝis la Imperiestra Palaco en Pekino, la Ming-dinastia kortego prenis Pekinon kiel sian novan ĉefurbon. Ankaŭ *Jongle Dadjan* estis transportita al la dokumenta domo en la palaco. En 1557 akcidenta brulo okazis en la palaco. Feliĉe, la fajro estis estingita kaj *Jongle Dadjan* evitis pereon. Poste, imperiestro Ŝizong (1522-1566 sur trono) de Ming-dinastio timis, ke la ununuran ekzemplaron de *Jongle Dadjan* trafus alia akcidento. Li ordonis 109 klerulojn en la kortego fari kopion, kiun ili plenumis dum 5 jaroj. De tiam la oficiala ekzemplaro kaj la kopio estis konservataj en la biblioteko Ŭenĵuange kaj Hŭangŝiceng respektive. Je la fino de Ming-

dinastio Ŭenĵuange estis forbruligita kaj ankaŭ la oficiala ekzemplaro de *Jongle Dadjan* estis detruita. Kiam oni kompilis *Si Ku Ĉjŭan Ŝu* en Ĉjanlong-erao, jam perdiĝis pli ol 2 000 volumoj de la kopio pro ŝtelo fare de oficistoj. En 1900, kiam la Okpotenca Alianca Armeo invadis Ĉinion, *Jongle Dadjan* renkontis fatalon, parto de ĝi estis forbruligita, kaj la resta parto estis preskaŭ tute forrabita kaj transportita al Britio, Usono, Francio, Japanio kaj aliaj landoj.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, la registaro metis grandan atenton al kolektado kaj ordigo de *Jongle Dadjan*. Post serĉado kaj kolektado nun pli ol 200 originalaj kajeroj jam estas retrovitaj. La nombro de la kajeroj, kopioj de prunteprenitaj kajeroj kaj duplikatoj estas sume 730 volumoj. Tiuj konservitaj kajeroj, kiel suko de la antikva ĉina kulturo, estis fotopresitaj de la Ĉina Libro-Eldonejo en 1960. Kvankam nur 3% de la tuta originalo, tamen ili povas esti rigardataj kiel trezoro de la antikva ĉina literaturo. ■

Kopio de *Jongle Dadjan*



Promesplena naĝsporto de Ĉinio

La naĝsporto de Ĉinio vekis nenies atenton en la komenco de la okdekaj jaroj, sed ĝi fariĝis promesplena en la lastaj jaroj. En 1987 ĉinaj naĝistoj entute rompis 24 landajn rekordojn kaj superis 12 aziajn; 14 naĝistoj kaj 2 teamoj atingis mondan nivelon en 13 matĉoj. Interalie la rekordo de naĝistino Hŭang Ŝjaŭmin en la 200-metra brustonago estis nur je 0.38 sekundo malpli rapida ol la monda rekordo, kaj per tio ŝi okupis la duan lokon en la monda rekordo, la rekordo de Ĉjan Hong en 100-metra papilia naĝo kaj tiu de Jang Ŭenji en 50-metra ramponaĝo okupis la kvaran lokon en la mondo.

En la 3-a Azia Ĉampionea Naĝturniro okazinta en Kantono mezaprile ĉijare, ĉina teamo gajnis 24 el la 31 oraj medaloj. Japanio, fame konata kiel reĝo en azia naĝado, eksteratende gajnis nur 6 orajn medalojn; Singapuro gajnis unu. 16-jara ĉina knabino Jang Ŭenji el Ŝanhajo en 50-metra virina ramponaĝo per 24"98 rompis la mondan rekordon de 25"28, ĝis tiam tenitan de rumana sportistino. La sukceso ege

kuraĝigis la ĉinan sportistaron.

La progreso de la ĉina naĝado rezultas el ĝia ĉiam pli vasta populareco. Pasinttempe en la suda Ĉinio troviĝis la avantaĝo de naĝo. Famaj naĝistoj plejparte venis de tie, precipe de la provinco Gŭangdong. Nun la situacio ŝanĝiĝas. Popolamasa naĝado pli kaj pli vigliĝas en la provincoj Hebej kaj Hejlongĝjang kaj la urbo Tjanĝin norde de Jangzi-rivero, eĉ aperis naĝmanio. En la urbo Ĉjiĉjihar de Hejlongĝjang kun longa kaj malvarmega vintro, kvankam la naturaj kondiĉoj estas malfavoraj, tamen tre viglas naĝado. En simplaj malgrandaj basenoj kulture ĝis eminentaj sportistoj kiaj Hŭang Ŝjaŭmin kaj Jan Ming. En la subprovinco Baŭding de Hebej-provinco ĉirkaŭ 1 300 geknaboj el mezaj kaj elementaj lernejoj persistas en tutjara naĝtrejnado. Tie reputacion ĝuas la naĝa kurso en sporta infanĝardeno. Gepatroj fieras, ke iliaj infanoj estas varbitaj en la kurson. "Nanfang Ribao (Jurnalo de Suda Ĉinio)", organo de la Gŭangdong-provinca registaro, alarmis: "La nordaj drakoj maturiĝas en

naĝado. Niaj naĝistoj devas koncii pri ilia minaco."


Dum la lastaj jaroj konstruiĝis naĝbasenoj kaj naĝdomoj tra la lando. Laŭ statistiko dum 1982-1987 konstruiĝis 80 naĝdomoj, kio pretigis por sportistoj favorajn kondiĉojn de dumjara trejnado kaj teknika perfektigo.

La alia kaŭzo de la progreso kuŝas en tio, ke la ĉina naĝado havas nombron da entreprenemaj trejnistoj.

En la naĝa teamo de Hebej-provinco laboras pluraj seriozaj diligentaj trejnistoj. En la landa naĝokonkurso de 1980 la naĝoteamo de Hebej-provinco ankoraŭ estis senfama, post klopodo de 6 jaroj ĝi gajnis la teaman ĉampionecon en landa konkurso.

Jam en la tempo, kiam la naĝado de Hebej-provinco estis en malprospero, junulo Ma Ŝjaŭdong diris: "Mi ne kredas, ke ni ja estas malpli kapablaj ol aliaj!" Li fariĝis naĝa trejnisto en 1973. Dumtage li trejnis geknab-

Ĉina naĝistino Hŭang Ŝjaŭmin



Ĉjan Hong (maldekstre) kaj aliaj ĉinaj naĝistinoj gajnis la teaman ĉampionecon en la konkurso de rapidnaĝo de 4 x 100 metroj en la Azia Sportkunveno en 1986.



ojn; nokte li konsultis veteranajn trejnistojn, foliumis referencaĵojn por lerni avangardajn teknikojn. Ding Ĝjiljan trejnita de li rompis la landan rekordon de 100-metra ramponaĝo en la 5-a tutlanda sportkunveno kaj gajnis la unuan oran medalon por Hebej-provinco. Post tio Ĉjan Hong, Jang Ĝinjong kaj aliaj junaj naĝistoj trejnitaj de li unu post alia rompis landajn kaj aziajn rekordojn kaj sturmis la mondajn rekordojn. En 1986 pliaj naĝistoj estis varbitaj de la landa naĝoteamo. Por pli bone utiligi liajn originalajn trejnajn kaj administrajn metodojn, oni invitis ankaŭ lin al la landa teamo kiel trejniston. Kompreneble, oni devas atribui la sukceson de la naĝa teamo de Hebej-provinco al ĝia trejnistaro. La teamestro kaj trejnisto Ŭang Jili ne nur sin okupas pri trejnado, sed ankaŭ plenumas ĉiutagajn servojn por la tuta teamo, por krei favorajn kondiĉojn de trejnado.

Ŭang Li, la plej juna trejnistino de la teamo, konfidis sian infanon al lia avino en la hejmloko. Ŝi tuttage ŝvitis kune kun siaj trejnatoj. Ŝja Fuĝje, Ĝeng Hong kaj aliaj kulturitaj de ŝi fariĝis bonaj naĝistoj fame konataj tra la lando. Ŝi oferis pli multe ol aliaj por fariĝi bona trejnisto.

Tiaj trejnistoj ne mankas ankaŭ en la teamoj de la provincoj Hejlongĝjang, Gŭangdong kaj la urbo Ŝanhajo.

Por akiri monde avangardajn trejnajn metodojn, en la lastaj jaroj Ĉinio plurfoje sendis siajn naĝistojn kaj naĝajn trejnistojn al Usono, Aŭstralio kaj aliaj landoj por trejniĝi kaj partopreni en konkursoj, samtempe oni foje-foje invitis alilandajn fakulojn prelegi aŭ trejni en Ĉinio. Ŝanhajo en la lastaj 4 jaroj invitis 15 alilandajn fakulojn prelegi, kaj el tio ĝiaj naĝistoj multe profitis. Ili gajnis 14 el la 32 oraj medaloj de la tutlanda sportkunveno lastjare.

Klaus-Ludolph, iama ĉeftrejnistino de la landa naĝoteamo de la Demokratia Germanio, ekde la



En naĝa infanĝardeno en Ĉjiĉjihar

januaro de 1986 laboris en la ĉina naĝoteamo dum preskaŭ unu jaro. Li aplikis trejnajn metodojn al la ĉinaj naĝistoj novajn aŭ malofte uzitajn por ĉinoj. Li prenis fiziologiajn kaj biokemiajn indicojn por mezuri la sportan kvanton de naĝistoj kaj decidis trejnprocedojn laŭ analizo kaj komputado pri la donitaĵoj mezuritaj. Li metis grandan atenton sur altebenaja trejnado en oksigen-manka medio. Komence iuj sportistoj timis, ke ilia sano estus detruita en tia trejnado. Sub la zorgema gvido de Klaus, la sportistoj fizike fortikiĝis. Ili atingoj altiĝis rapide. La praktiko pruvis la sukceson de lia metodo.

Tre inspira estas la celo de ĉina naĝistaro. Ili deziras akiri orajn medalojn en la ĉi-jare okazantaj olimpiaj ludoj kaj venkon super Japanio en la azia sportkunveno en 1990. Por efektiviĝi tian aspiron, Ĉinio bezonas pli da sportistoj, kiaj Hŭang Ŝjaŭmin kaj Jang Ŭenji.

Hŭang Ŝjaŭmin, 17-jara, venis de fervojista familio de la urbo Ĉjiĉjihar. Laŭ la alta kaj fortika staturo ŝi estas tipa nordorient-ĉinia knabino, laŭ la blanka kaj bela vizaĝo, ŝi aspektas kiel knabino de suda Ĉinio, kaj eĉ ŝia parolo de tempo al tempo entenas sudan voĉtonon.

Hŭang Ŝjaŭmin 10-jare ekvizitis postlernohoran sportlernejon, 11-jara ŝi aniĝis al la naĝoteamo de sia provinco, 12-jara ŝi rompis landajn rekordojn de 100-metra kaj 200-metra brustonaĝo kaj mikснаĝo, kaj estis elektita kiel membro de la landa naĝoteamo. En la landa teamo ŝi trejniĝis pli diligente. Ŝi estas persistema kaj neniam volas konfesi malvenkon. Foje ŝi insistis konkursi kun vira sportisto fama tra la lando kaj fine ŝi venkis.

Jang Ŭenji eklernis naĝadon en 1978. Februare de 1986 ŝi venis de la ŝanhaja postlernohora sportlernejo al la landa naĝoteamo. Aprile de 1987 ŝi unuafoje rompis landan rekordon. Ŝi estas milda kaj hontema knabino, sed mal-tima kaj diligenta en trejnado. Jam de sia infaneco ŝi ŝatas diversajn sportojn, apreci muzikon kaj legi romanojn. Antaŭ la azia naĝturniro ŝi deziris rompi la mondan rekordon, pli frue ol Hŭang Ŝjaŭmin. Kiam ŝi sukcesis kaj dronis en hurao, ŝi unue ekpensis pri sia penema trejnisto.

Vere, pli da eminentaj naĝistoj kiaj Hŭang Ŝjaŭmin kaj Jang Ŭenji certe plialtigos la nivelon de ĉina naĝado, sed efektiviĝo de tiu celo dependos de senĉesa penado. Ĉar ili progresos, ankaŭ la aliaj antaŭeniros. ■

Seka herbo (Novelo)

En mielmonato mi kaj mia edzino vizitis multajn pitoreskejojn travojaĝante preskaŭ duonon de Ĉinio inkluzive Hangĝoŭ, Suĝoŭ, Hŭangŝan-monton kaj Tajhu-lagon. Nun mi baldaŭ revenos al la hejmvilaĝo en la nordo de Ljaŭning-provinco. Mi kvazaŭ jam sentis la odoron de mia hejmvilaĝo, la odoron de stufitaj manĝaĵoj kaj la aromon de herbo. Mi volis tuj surpaŝi la teron de la hejmvilaĝo. Eĉ mi mem fariĝis svaga por klarigi la motivon de la senpacienco, ĉu mi urĝiĝis paradi per mia gracia edzino antaŭ la samvilaĝanoj, aŭ paradi antaŭ mia edzino per miaj samvilaĝanoj kaj kamaradoj.

Antaŭ mia edziĝvojaĝo mia patrino sendis leteron al mi por ke mi antaŭsciigu mian edzinon pri la malriĉeco de mia hejmo, por ke ŝi ne malŝatu; malgraŭe, se ŝi malŝatos la lokon, ŝi almenaŭ devas loĝi kelkajn tagojn, alie oni mokos. Mi sciis, ke la maltrankvilo de mia patrino ne estis senkaŭza. Iu el miaj samvilaĝanoj, kiu laboras en urbo, foje revenis al la hejmvilaĝo kune kun la edzino, sed ŝi foriris en la sekvanta tago. Tio fariĝis mokitaĵo longe priparolata.

Ankaŭ min kaptis la maltrankvilo, kvankam mi kredis, ke mia edzino ne foriros nur post unu tago. Sed fakte en nia loko estis nenio vidinda. Ĝi ne portas la krudecon kaj vastecon de nordaj dezertoj, nek la ĉarmecon kaj elegantecon de sudaj akvolandoj. Tie ne vidiĝas monto nek rivero, kaj oni vidas nur sablon kaj

kabanojn...

La unika paradinda al mia edzino estas la vasta herbejo antaŭ la vilaĝo. Kredeble ĝi multe ŝanĝiĝis en la pasintaj jaroj. Kia ĝi nun estas? Mi ne scias. Antaŭ la vojaĝo mi demandis pri la herbejo, sed oni skribis al mi, ke mi sciiĝos post reveno.

Nun mi revenas. Mi baldaŭ sciiĝos pri ĝi. Sed ĉu ĝi interesos la edzinon? Mi do rakontas al ŝi pri la herbejo laŭ mia memoro.

La herbejo distancas de mia

vilaĝo nur 500 metrojn. Ĝi larĝas malpli ol 3 kilometrojn kaj longas 7-8 kilometrojn. Sed en mia infana memoro ĝi estis vastega. Mi ofte kuŝis en herbaro, ĝuis aromon de la herboj, rigardis la flosantajn nubojn senĉese variantajn, imagis al mi pri la loko, kie kuniĝas la ĉielo kaj tero. Sporadaj ŝafaroj glimis sur la verda maro. De tempo al tempo mi vidis aglon ŝvebanta sur la ĉielo, kiu rigardis malsupren kaj estas preta ataki ranon aŭ muson. Kelkfoje blekis sovaĝanseroj sur la ĉielo, kaj tuj



leviĝis resono en la fora firmamento, kio vigligis la kvietan herbejon. Ifoje verda aerondo levis birdetojn el la profundaj herbaroj, kaj ili grazie ŝvebis jen sor jen sob, flugis foren kaj fariĝis malgrandaj nigraj punktoj glimantaj en sunlumo. La ĉarma pejzaĝo kondukis min en longan fantaziadon kaj forgesigis al mi ĉian ĉagrenon kaj aflikton.

Tagmeze aŭ vespere mi ofte vidis maljunulon kun nuda brusto aŭ ŝirmatan per pajla pluvmantelo. Li estis Onklo Balbutulo, gardisto de la herbejo. Li portis pulvopafilon oblikve sur la ŝultro kaj falĉilon. Li iris en herbaro profunda ĝis talio kaj amaso da surprizitaj birdetoj ĥaose pepadis super li. Sed li neniam pafis, neniam vundis vivaĵon sur la herbejo.

Mia plej intima kamarado estis knabino Herbeto. Ŝi, unu jaron pli juna ol mi, estis solfilino de Onklo Balbutulo. Ŝi perdis la patrinon en sia aĝo de tri jaroj kaj estis prizorgata de la patro. Sur ŝia malgrasa vizaĝo brilis paro da grandaj okuloj. Ŝian figuron taŭge simbolis ŝia nomo Herbeto: ŝi estis malgrasa, sed ne debila; ĉarma, sed ne frivola.

Ni estis bonaj amikoj. Ni ofte amuzis nin per kaptado de lokustoj.

Kaptado de lokustoj estis granda distraĵo. En tagmezo kaj vespero lokustoj estis pli viglaj. Ni kuregis sur la herbejo, kaj ĉe tio leviĝis svarmoj da teruritaj lokustoj. Sed la sagacaj insektoj estis malfacile kapteblaj. Por kapti unu lokuston, ni devis multe klopodi eĉ ĝis spirego. Ni postkuris, kaj ĝi forflugis, se ni haltis, ankaŭ ĝi haltis, kvazaŭ ĝi intence ekscitus nin. Kiam ni decidis persekuti ĝin, ĝi flugis supren. Tiam Onklo Balbutulo diris al ni, ke ni devas kapti lokustojn matene. La matena roso malsekigis niajn ŝuojn kaj krurumojn. La malsekaj vestoj algluiĝis



al la korpo, sed ni tute ne zorgis pri tio, ĉar la lokustoj estis en malpli bona stato. Ili malvigiĝis de roso kaj ne povis flugi. Ni facile kaptis multe da lokustoj, trapikis ilin per herbotigoj kaj portis hejmen por nutri kokojn.

En aŭtuno maturiĝis herboj. Kiam Onklo Balbutulo jesis la komencon de falĉado, ĉiuj vilaĝanoj iris falĉi herbojn. Por akiri pli da fojno, eĉ virinoj kaj infanoj estis mobilizitaj al falĉado. Tiam la herbejon regis granda vigleco.

Mi, Herbeto kaj kelkaj samaĝaj infanoj deprenis de la respektivaj parceloj junajn maizospadikojn, bakis ilin sur fajro de seka herbo. Krakante, la herboj elsendis odoron de artemizio, kaj ankaŭ la bakita maizo portis tian odoron. Ni kaj ĉiuj falĉantoj ĝuis la frandaĵojn. La gusto de bakita maizo ne estis malpli bona ol tiu de pano, kolbaso kaj biero necesaj por pikniko de urbanoj. Kamparanoj ja estas malriĉaj, tamen havas sian propran ĝuon.

“Kiel delektinde! Ĉu vi verkas idilion?” Mia edzino montris

evidentan ĝojon, sed ŝi dube rompimis mian rakontadon. Kred-eble ŝi estis infektita de mia humoro aŭ ravita de la ĉarma pejzaĝo de la herbejo, kaj ŝia vizaĝo radiis per emocia brilo.

“Ĉu ankoraŭ fore? Ĉu ankoraŭ ekzistas la herbejo? Kie nun loĝas Onklo Balbutulo? Ha jes, kaj kie Herbeto?”

Mi ne sciis kiel respondi, ĉar la herbejo estis tre ordinara. Estis ordinara ankaŭ Onklo Balbutulo kaj Herbeto. Sed la animo vokis min, kaj anstataŭ respondo al ŝia demando, mi daŭrigis mian rakontadon pri la ordinara homoj sur la ordinara herbejo...

Post falĉado, mi kaj Herbeto interesiĝis pri distraĵoj en korto. Ni ruliĝis kaj kaŝludis sur stakoj, kaj la fojno susuris sub nia ruliĝado. Plenkreskuloj ofte ri-proĉe haltigis nian ludadon. Sed Onklo Balbutulo neniam bremsis nian amuzadon. Kelkiam li ŝutis sur nin fojnon kaj rigardis kiel ni gaje elŝoviĝis el stako, kun herberoj sur la kolo kaj vesto. Ankaŭ Balbutulo ĝoje ridis kun ni.

En vintro la fojno estis vendita, sed la odoro restis. Kiam mi ludis kune kun Herbeto, mi ĉiam flaris la delikatan bonodoron de ŝia korpo. Komence mi ne sciis, de kie ŝvebis la bonodoro. Poste mi demandis ŝin, kaj ŝi ridetante prenis el la sino saketon el diverskoloraj tolpecoj. Ŝi diris, ke ŝi enkudris la aromon en la saketon. Mi konfuziĝis, dum ŝi ridis pli gaje. Fine ŝi diris al mi, ke ŝi enkudris anaslangajn herbojn en la saketon. Sur la herbejo kreskis herbo nomata anasa lango. Ĝia folio havas la formon de anasa lango, ĝia tigo estas purpura. Sekigita, ĝi dissendas agrablan odoron. Knabinoj enkudris ĝiajn semojn kaj frakasitajn tigojn en saketon kaj portis ĝin kun si, por delecti per la odoro dum la tuta jaro.

“Kial mi ne scias pri tio?” Mi kreskis sur la herbejo, tamen mi ne sciis, ke sur la herbejo kreskas tia trezora herbo.

“Kion vi buboj scias!” Ŝi ŝovis la saketon en la sinon kaj ŝiaj nigraj brilaj okuloj vidigis la fieron specifan por knabinoj.

“Ĝin donacu al mi,” mi petis.

“Ĉu vi ne hontas peti de knabino saketon?” Herbeto ruĝiĝis, tamen ŝi elprenis la saketon, tenis ĝin en la mano montrante sin ĵaluza.

“Ĉu mi ŝanĝu ĝin kontraŭ du kraĵonoj?”

Ĉe tio paliĝis ŝia vizaĝo. Ŝi reŝovis la saketon en la sinon, ĵetis la harplektaĵon posten kaj foriris en ŝokiteco. Ŝi silentis plurajn tagojn kontraŭ mi.

Post pluraj jaroj mi komprenis, ke nur fianĉo rajtas akcepti tian sanktan donacon. Tiutempe mi estis infano, sekve ne rajtis peti de ŝi tion, kaj krome mi vundis al ŝi la koron.

“Mi preferas aŭdi plu pri la herbejo,” la gajeco de mia edzino estis anstataŭita de malagrabra

ombro. Evidente ŝin ne interesis la rakontado pri saketo.

Trapasinte vojkurbiĝon, la aŭto rampis sur deklivon. Ni venis al la sablaj montetoj, kiujn mi kaj Onklo Balbutulo ofte trapasis por vendi fojnnon. Jam estis la lastaj tagoj de printempo, sporadaj floroj ne povis moderigi la dezertecon de la sablaj montetoj. Feliĉe, ke la ŝoseo estis borderita de junaj poploj dikaj je bovlo. La aŭto anheladis kiel astmulo. La monotona bruo de la aŭto dormigis la pasaĝerojn, dum mi, vojaĝanto de malproksima loko, estis en ekscitiĝo.

“Kio okazis poste? Ĉu vi iam falĉis? Ĉu vi povas uzi falĉilon?” Eble mia edzino opiniis, ke tio ne estis malgranda bedaŭro, se mi ne falĉis kaj ne povis uzi falĉilon.

Sed kiam mi atingis la aĝon, en kiu mi povis uzi falĉilon, dezertiĝis la herbejo.

“Herboj sur stepo prosperas kaj velkas en ĉiu jaro.” Eble la malabunda tributo de la herbejo ne povis kontentigi la mastrojn, kaj en iu aŭtuno, post falĉado de herbo, grupo da lacaj homoj venis en la herbejon. Ili plugis teron, starigis padojn, fosis kanalojn... La herboj havis profundajn kaj densajn radikojn, kiuj kompakte kuniĝis kun argilo, sed malgraŭ tio la radikoj estis elfositaj supren. La bonkoraj plugantoj pensis, ke ili povis ŝanĝi la herbejon en rizkampojn. Sed fakte, pro manko de akvo, eĉ unu grajnnon ili ne rikoltis, kaj pli serioze, la herbejo komplete dezertiĝis. La homoj ŝercis kun la herbejo kaj detruis ĝin, dum la herbejo senkompate venĝis sin kontraŭ la homoj. Sed tiam nek la kamparanoj nek la herbejo povis mastri sian sorton.

Dezertiĝis la herbejo, la vilaĝanoj apudmetis ĝin, kaj ankaŭ la infanoj ne iris amuziĝi sur la herbejo. Nur Onklo Balbutulo ankoraŭ aperis de tempo al tempo sur la herbejo, kunportante la

brilan pulvopafilon. Li ofte sidis sub la oblikva ulmo kaj akriĝis sian falĉilon. Li bone konsciis, ke li jam ne bezonis la falĉilon, sed li domaĝis, ke la falĉilo rustiĝos. Kelkiam li haltis en akriĝado kaj malgaje rigardis la herbejon insultante: “Fi! Kia stultaĵo!” Oni ne sciis, kiun li insultis.

Post tio malsato tiranis kelkajn jarojn. Onklo Balbutulo pli kaj pli malfortiĝis. Liaj ŝrumpaj palpebroj glatiĝis. La manoj, piedoj kaj poste la tuta korpo ŝveliĝis. La streĉita haŭto brilis kiel akvosurfaco. Edemo trafis tiam la tutan socion. Multaj vilaĝanoj suferis de ĝi. Kaj li ne rigardis la malsanon serioza kaj daŭre okupiĝis pri io sur la herbejo.

Pluvegis en iu nokto. Herbeto haste venis al mia hejmo kaj demandis, ĉu mi vidis ŝian patron. Ŝi diris, ke ŝi ne vidis lin dum la tuta tago.

Subite mi rememoris, ke antaŭ tagmeze mi vidis Onklon Balbutulon sur la herbejo. Eble pro trolaciĝo, li kalkansidis sur la tero. Per tremanta mano li prenis el la sino amelan bulon kaj pretis manĝi ĝin. Vidinte min, li cedis ĝin al mi. Mi hontis akcepti, sed li insistis, enmanigis al mi kaj foriris... Tion rememorante, mi teruriĝis, venigis kelkajn plenaĝulojn kaj kune iris en la herbejon por serĉi lin.

Pluvis pli kaj pli forte. Malluma nokto envolvis la herbejon, kaj ni sentis sufokiĝon. Krakis la arboj kaj herboj. Tie fore en la herbejo ni fine trovis Onklon Balbutulon kviete kuŝanta en herbaro. Enkaviĝis liaj vangoj antaŭe ŝvelaj. La vizaĝo estis kovrita de fasketo da herboj evidente sekigitaj de la suno. Ne malproksime de la kapo de Onklo Balbutulo estis parcelo da tritiko. Oni konjektis, ke li intencis iri al la tritika kampo...

Onklo Balbutulo mortis, mortis nerimarkite. Ĉiufoje, kiam mi



rememoris pri lia morto, mi sentis korŝiran doloron. Mi pensis, ke Onklo Balbutulo ne mortus, se li mem manĝus sian amelan bulon, ĉar manĝinte ĝin li havus la forton rampi ĝis la tritika kampo kaj povus plenigi la stomakon per junaj tritikaj spikoj...

Larme malsekiĝis la okuloj de la edzino. Ŝi deturnis la kapon, silente rigardis eksteren tra la fenestro. Ŝajne ŝi atendis mian daŭrigon, aŭ male, ŝi tute ne volis aŭskulti. Evidente ŝi estis emociita kaj ondiĝis ŝia sento. Post longa silento ŝi turnis sin al mi kun demando: "Kiel vivis Herbeto?"

Poste mia patrino akceptis Herbeton en mian hejmon.

Kvazaŭ subite maturiĝis Herbeto. Malaperis for de ŝiaj vangoj

la knabina naiveco, la nigraj okuloj radiis melankolion. En tiu jaro ŝi ĉesigis sian lernadon kaj laboris hejme. Ŝi kolektis herbosemojn kaj manĝeblajn herbojn. Kvankam ŝi ne estis forta laborulo, tamen ŝi enspezis ne malpli multe ol plenaĝuloj. Ŝi pensis, ke nur tiamaniere ŝi povis danki al la adopto de la patrino. Sed fakte mi estis danka al ŝi, ĉar sen ŝia laboro mi devus ĉesigi la lernadon. Oni povas diri, ke ŝi pagis por mia lernado.

En la sekvanta jaro mi lernis en la gubernia urbo. Antaŭ mia foriro ŝi lavis miajn litaĵojn. En la lernejo, kiam mi malvolvis la litaĵojn, mi flaris fortan aromon de herbo: Mia kapkuseno estis remburita de Herbeto per anaslangaj herboj. La aromo akompanis

min de la elementa mezlernejo ĝis alta mezlernejo, de la gubernia urbo ĝis la provinca ĉefurbo. Kiam mi kuŝiĝis kun la kapo sur la kuseno, mi ĉiam estis kaptita de ia subtila komplika sento. La aromo firme ligis min al la herbejo. Mi informiĝis poste, ke Herbeto dissemis en mia korto la semojn en ŝia saketo kaj remburis la kusenon per la kreskaĵoj en la korto.

Antaŭ du jaroj mi vizitis la hejmvilaĝon kaj estis informita, ke Herbeto edziniĝis al instruisto de elementa lernejo 15 kilometrojn for de mia vilaĝo.

Mi ofte iris al la neĝkovrita herbejo. Mi paŝis sur neĝo, serĉis antaŭajn spurojn, la perditan verdan sonĝon dum la infaneco. Sed ĉio nebuliĝis. Mi forŝovis la neĝon sub la piedoj kaj trovis, ke sub la neĝo estis maldika tavolo da velkaj herbofolioj, kaj la tigoj portis verdetan koloron. Revenis al mi espero kaj vicleco, ĉar tio kredigis, ke la herbejo ankoraŭ vivas...

"Ĉu ni vetu? Certe la herbejo estas kovrita de novaj herboj!" Denove gajiĝis la edzino, ke ŝi eĉ neglektis la fortan tangadon de la aŭto, kaj ŝiaj vangoj radiis infanecon.

"Eble tiel estas," mi respondis ne certe, ĉar mi estis maltrankvila, ke la herbejo, kiu iam suferis detruon, senkompatate estingos miajn ardan aspiron kaj sanktan memoron. Sed la letero de mia patrino ŝajne sugestis bonaŭguron... "Vi sciiĝos post reveno." Mi ja kredis, ke la herbejo aspektos tiel, kiel mia edzino deziras. Sed mia edzino ne rimarkis mian sencertecon kaj diris al mi: "Ĉu ni loĝu pli longe? Ni iru kolekti anaslangajn herbojn kaj remburu per ili paron da kapkusenoj..." kvazaŭ la verda ondanta herbejo jam sterniĝus antaŭ ŝi. Kion mi povis diri? Ĉio estu kiel dezirate. ■

Esperantigis ŬANG CAJ

Poetoj de la malfrua periodo de Tang-dinastio

de MEJ ĜI

Ĝenerale, la malfrua periodo de Tang-dinastio daŭris de 836 ĝis 907. En tiu periodo la altrangaj eŭnukoj praktikis diktaturon en la lando, la koterioj interbatalis, la lokaj militaristoj ĉiam pli potenciĝis kaj Tang-imperio alfrontis pereon.

La socian vivon spegulis la verkoj de la tiamaj poetoj. Du Mu (803-853) kaj Li Ŝangjin (813-858) estis la plej famaj el la poetoj ĉe la komenco de tiu periodo. Iliaj poemoj vidigis iliajn grandajn zorgon kaj malĝojon pri la malkvieta socio kaj ilian



Du Mu

suspiron. La avo de Du Mu iam estis kortegano. Ankaŭ Du Mu havis oficon en la kortego, sed li ne glate vivis pro sia justamo. Vidante diversajn malfacilojn en kaj ekster Tang-imperio, li decidis iom kontribui politike. Li proponis praktikadon de prudenta politiko, malfortigon de la lokaj militaristoj por elimini la internan minacon, reprenon de la perdita teritorio kaj pacigon de la landlimaj regionoj por rezisti kontraŭ la eksteraj malamikoj. Li ne nur faris notojn por militsciencaj verkoj, sed ankaŭ skribis al la ĉefministro por klarigi la strategion. Kiam li oficistiĝis aliloke, li faris bonojn. Iuj liaj verkoj montris lian zorgon pri la ŝtato kaj popolo. En sia poemo “Penso pri la Ŝtato” li esprimis maltrankvilon pri la separatismo de la lokaj militaristoj post la ribelo de An Luŝan kaj Ŝi Siming kaj pri la malfacila vivo de la popolo kaŭzita de la peza impostado kaj esprimis sian nacisavan ideon. En la poemo “Unuopa Drinkado” li eldiris sian ideon helpi la imperiestron por pacigi la landon.

Ankaŭ la historiaj poemoj de Du Mu estis tre famaj. El ili la poemo “Hŭaĉing-palaco” akre mokis la diboĉan vivon de regantoj per historiaj epizodoj. Laŭdire Jang Juhŭan, favoratino de la imperiestro Ŝjŭanzong (712-742 sur trono) de Tang-dinastio, ŝatis liĉiojn. Por ke ŝi povu manĝi freŝajn liĉiojn, oni portis ilin al la ĉefurbo per rapidaj ĉevaloj de loko milojn da kilometroj fore. Lia poemo malkaŝis tion. Liaj aliaj historiaj poemoj “Ĉibi” kaj “Kiosko Uĝjang” donis neordinarajn opiniojn pri la sukceso kaj malsukceso en la historio. Tiu formo por trakti pri historio estis imitita de multaj postaj kleruloj.

Historie oni rigardis Du Mu kiel galantan poeton. Fakte, post kiam oni atente legis liajn lirikojn, oni povis trovi liajn poemojn sinceraj. Sendube, Du Mu estis galanta kaj verkis poemojn ankaŭ pri drinkado kaj amindumado al prostituitino, sed, ĝenerale dirite, liaj liriko akiris grandan sukceson, precipe iuj el liaj liriketoj kun nur kelkaj versoj bone prezentis la eksterordinaran stilon de liaj poemoj. Ekz., lia poemo “Printempo en Sudlando”:

*Eĥas birdotrילad' tra mar' de ruĝo kaj verdaĵo
Kaj flirtas ĉe mont-antaŭurbo aŭ akvovilaĝo
Vinflagoj¹. Kvarcent okdek temploj el*

Suddinastioj

Siluetiĝas en pluvonebul' kvazaŭ miraĝo.

La ĉarma printempo de la vasta sudo bildigita en la poemo kvazaŭ bela pentraĵo ravis kaj freŝigis la legantojn. Ankaŭ "Iro al Monto" estis pejzaĝa poemo. Ĝi bildigis vivoplenan aŭtunan pejzaĝon per densaj kaj helaj koloroj, kio montris lian amon al la naturo kaj vivo. Li iam pretervole esprimis iom da tristo en siaj liriketoj. Lia poemo "Ŝip-albordiĝo ĉe Ĉinhŭaj-rivero" priskribas la noktan pejzaĝon de Ĉinhŭaj-rivero en la urbo Ĝinling (nun Nankino). La rivero vualita de maldensa nebulo elspiras malvarmon kaj misteron. Ambaŭborde de la rivero staris iluminitaj drinkejoj. En la tempo, kiam la ŝtato sin trovis en danĝero, la tieaj altranguloj kaj nobeloj vivis en diboĉado. Tio nature vekis triston ĉe la poeto.

Li Ŝangjin estis fama kiel Du Mu. En la konfliktoj de koterioj en la malfrua periodo de Tang-dinastio, li estis plurfoje elpuŝita, ne povis elmontri sian talenton kaj fine mortis solece en la aĝo de 46 jaroj. Li estis vaste influita de antaŭuloj kaj samtempuloj, tial lia poezia stilo ne estis unueca. Sed liaj poemoj estis originalaj kaj en Tang-dinastio kaj en la historio de la ĉina klasika poezio. Liaj am-poemoj aŭ poemoj sen titolo reprezentas liajn belan stilon kaj artan trajton. Li estis unu el la ĉinaj antikvaj poetoj, kiuj multe kaj bone verkis am-poemojn. Kiam oni parolis pri liaj poemoj, oni unue rememoris liajn sentitolajn poemojn. El ili iuj portas apartan celon de la poeto, aliaj funebras pri mortinto kaj triaj estas rakontaj verkoj bazitaj sur fakto. Ili, harmoniaj kaj mildaj en la tono, kun bonaj antitezoj, estas graciaj kaj pompaj en lingvo, sinceraj kaj profundaj en sento, sed tristaj kaj melankoliaj en spirito. En tiuj poemoj interplektiĝas liaj espero kaj malespero pri amo. Ekz., lia poemo "Sen Titolo" diras:

Samkiel la kuniĝ' penigas la disiĝa horo,

La verso imagigas, ke la amatino loĝas en malproksima kaj nebula fea lando. Kaj li esprimis sian persistan kaj profundan amon per jenaj versoj:

*Silkvermo verŝas la sopiran silkon ĝis la morto,
Ĝis la cindriĝo daŭras larmo de l' kandela ploro.*

"Sendi al Sia Edzino en Pluva Nokto" estas multe laŭdata liriketo kun kvar versoj:

*Ĉu difinita dato hejmenira? Ne, ankoraŭ ne,
Sur Baŝan², la lageto ŝvelas pro la nokta pluv'
aŭtune.*

Kiam ĉe l' fenestro okcidenta en kandela lum',



Li Ŝangjin

*Pri l' tempo de la nokta pluv' sur Baŝan ni babilu
kune!*

La unuaj du versoj priskribas lian solecan gastadon en fremda loko kaj lian profundan sopiron pri la familianoj. La lastaj du versoj supozigas, ke en la venonta renkontiĝo li gaje rakontos al siaj familianoj pri tiunokta pluvado en Baŝan. Per tio la poeto forpelis sian solecon dum gastado en fremda loko kaj donis serenajn kaj leĝerajn sentojn al la poemo. La similaj lirikoj kaj pejzaĝaj liriketoj, kiaj "Serena Vespero", "Lejoŭjŭan" kaj "Prujna Luno", estas tre ŝatataj de la publiko.

Li Ŝangjin verkis ankaŭ nemalmultajn poemojn, per kiuj li suspiris pri sia sorto. Liaj poemoj ĝenerale estis melankoliaj kaj suspirantaj pri dekadenco de la ŝtato kaj liaj malfeliĉaj travivaĵoj. Ekz.:

*Longtempa pluvo de aŭtun' prokrastas prujn-
aperon,*

Sur la velkintaj lotusplantoj bruas la pluveroj.

(El "Tranoktado en la Lŭo-familia Domo")
*Malebriiĝinte post disiĝ' de l' gastoj, en meznokto
Mi aprecadas velkajn florojn kun kandelo ruĝa.*

(El "Ebriiĝo ĉe Floroj")

Tiuj versoj prezentas la sombron kaj mornon de la pereonta dinastio.

La poemoj de Li Ŝangjin ĝenerale havas tristan

kaj pimpan trajtojn. Li majstre aplikis iluziajn kaj simbolajn manierojn kaj per tio formis sian originalan stilon de profunda sento, beleco kaj delikateco. Liaj poemoj, precipe am-poemoj, grave influis la posteulojn.

Estis aliaj poetoj de la malfrua Tang-dinastio, kiaj Pi Ĵiŝiŭ (834?-883?), Nje Ĵigong (837-?) kaj Du Ŝjunhe (846-907). Ili heredis kaj disvolvis la spiriton de la nova *jüefu*-movado de la meza periodo de Tang-dinastio kaj verkis poemojn spegulantajn la realon kaj kritikantajn la tiamajn malbonajn politikojn. La ĉefaj verkoj de Pi Ĵiŝiŭ estis “Dek *jüefu*-poemoj” kaj “Tri-honta Poemo”. La lasta priskribas la mizeran vivon de la popolo en lokusta kaj tro sekeca plago:

*Geedzoj sin rigardis reciproke,
Forlasis la infanon el la brakoj.
.....*

*Apoge morusarbojn tre maldikajn,
Geknaboj nutras sin per herbradikoj.
Grizuloj mortis apud kampa vojo,
Kuŝante sur la tero en malĝojo.*

La poeto diris kun doloro:

*Rigoro povas pereigi amon,
Mizero neniiĝi bonkorecon.*

El la “Dek *jüefu*-poemoj” “Plendo de Soldataj Edzinoj”, “Plendo de Koruptiĝintaj Ŝtatoficistoj”, “Balado de Kampanoj” kaj “Kompatingaj Montanoj de Longŝan” spegulis la tiranadon de ŝtatoficistoj, la katastrofon de militoj kaj la suferon de ekspluatataj kampanoj.

Nje Ĵigong devenis de malriĉa familio. Post plurjara penado li fariĝis guberniestra asistanto. Tia travivaĵo ebligis al liaj poemoj havi du temojn: sarkasmo kontraŭ nobeloj kaj kompatado al la



suferantaj kampanoj. “Domo de Dando” estis lia reprezentanta verko pri la unua temo:

*En nobela la ĝardeno pompas floroj,
Ridas al belajoj en la koridoroj.
Unu grena planto kreskas ĉe la floroj,
Oni sarkas ĝin pro ĝia fi-odoro.*

“Malĝojo de Kampanoj” vidigis lian simpatian al kampanoj:

*Duamonte vendi novan silkon,
Kvinamonte grenon verdkoloran.
Por urĝe mian vundon tuj kuraci,
Mi devas enuklei karnon koran.
Mi volus, ke l' imperiestra koro
Fariĝu brila lumo de kandelo,
Kiu prilumu ne festenojn riĉajn,
Sed nur la kaŝloĝejoj en mizero.*

La poemo bildigis la malfacilan vivon de kampanoj. Ili vendis la silkon kaj grenon, kiam ili ĵus komencis bredi silkraŭpojn kaj kulturigi grenplantojn. La poemo spegulas maljustaĵon de la socio per klara kontrasto de “riĉula vivo” kaj “mizerula domaro” kaj donis artan efekton al la poemo.

La poemoj de Du Ŝjunhe vaste spegulis la obskuran realon kaj la suferon de la popolo en la lastaj jaroj de Tang-dinastio. La poemo “Vidvino en Monto” priskribas la mizeran sorton de kampanoj.

*En pajlkaban' ŝi vivas — mortis l' edz' militfurie,
Ĉifonaj ŝiaj vestoj, flavaj haroj ĉe-tempie.
Silkraŭpojn ŝi ne bredas, sed imposton devas pagi
Kaj ankaŭ por dezertaj kampoj impostpagi plie.
Ŝi prenas herbojn radikhavajn por sinvivtenado,
Kaj ofte uzas por brulligno branĉojn en verdstato.
Ŝi kvankam loĝas tre profunde nun jam en
montaro,
Ne povas liberiĝi de l' servuto de la ŝtato.*

Tiu vidvino, en ĉifonaj vestoj, manĝis herbojn pro malsato. Kvankam ŝi fuĝis profunde en montaron, ŝi tamen ne povis eviti la pezajn servuton kaj imposton. La figuro de la virino en la poemo estas vivovera kaj ŝia trista kaj mizera sorto estas korŝira. Kvankam la poemoj de Du Ŝjunhe ne estas rafinitaj, tamen sen aludo pri anekdotoj kaj abundo de elegantaj vortoj, ili estas popularaj kaj facile kompreneblaj. El la samskolaj poetoj de la malfrua periodo de Tang-dinastio li estis kompare eminenta en arto.

Ŭej Ĝuang (836?-910) kaj Sikong Tu (837-908) estis ermitaj, idiliaj poetoj de la malfrua periodo de Tang-dinastio. Kvankam ili certagrade esprimis

malĝojon kaj ĉagrenon pri la realaj vivo kaj socio, tamen tio ne estis ilia ĉefa karakterizaĵo. Ŭej Ĝuang verkis la poemon "Virino Ĉin", kiu estis kompare longa inter la konservataj poemoj de Tang-dinastio. Ĝi rakontas pri la granda ribelo de kamparanoj en la lastaj jaroj de Tang-dinastio. Kvankam la poeto defendis la putran feŭdan Tang-dinastion kaj malamamis la ribelantajn kamparanojn, tamen li esprimis indignon kontraŭ la putra kaj kruela armeo de la kortego. Objektive la poemo parte spegulis la historian realon. Ŭej Ĝuang verkis poemojn plejparte pri sia envio al la paca kaj luksa vivo kaj dekadenca ĝuo. Liaj poemoj estis sentimentalaj kaj klar-sencaj, ekz., la poemo "Tajĉeng" diras:

*En pluv-nebulo verdas herboj ordaj en rivero,
Forsonĝis la Ses Dinastioj³, vanas birdmuziko.
Plej senkompatas la salikoj de l' distrikto
Tajĉeng⁴,
Ankoraŭ fume ombas korpon de l' deklia⁵ digo.*

Li kreis mornan etoson per pluv-nebulo, malklaraj salikoj kaj solecaj birdkantoj. Tio sentigas nediritan malĝojon.

La poemoj de Sikong Tu priskribas ĉefe kvietajn pejzaĝojn sen solida enhavo. Li verkis "Poezian Stilon", kiu klasifikis la poemojn en 24 stilojn, kiel grandioza, malgranda kaj kompakta. En lia traktado la diversaj stiloj estis malsamaj kaj malklare kaj malfacile distingeblaj. Li distrumpetis liberan penson for de la reala vivo. ■


1. Vilaĝaj drinkejoj ofte hisas flageton kiel signon.
2. Nomo de monto en la nuna Siĉuan-provinco.
3. De la 3-a jc. ĝis la 6-a jc. la dinastio U, la Orienta Ĝin-dinastio kaj la dinastioj Song, Ĉji, Ljang kaj Ĉen sinsekve prenis la urbon Ĝinling (nun Nankino) kiel sian ĉefurbon. Historie, oni nomis ilin Ses Dinastioj.
4. Tajĉeng estis en la nuna Nankino. Tie troviĝis la palaco de la Ses Dinastioj. Ĝi estis la politika centro kaj amuza loko por la imperiestroj.
5. Unu li-o egalas al duonkilometro.

Elektitaj poemoj de la malfrua periodo de Tang-dinastio

DU MU:

Al Han Ĝuo, prefekta asistanto de Jangĝou

*De foraj montoj en nebulo fluas la rivero.
Aŭtun' malfrua de la Sud' kun herboj en prospero.
La Ponto Dudek Kvar Feinoj¹ en helluna nokto—
Kie instruas fluton ludi l' hom' de jada belo?*



Iro al monto

*Laŭ voj' oblikva frostan monton iras mi de foro.
En blankaj nuboj elrigardas domoj de popolo.
La ĉaro haltas pro l' aceroj ĉarmaj en vespero—
La prujnmordita foliar- pli ruĝas ol mart-floroj².*

LI ŜANGJIN:

Sen titolo

*Samkiel la kuniĝ' penigas la disiga horo,
La orienta vento feblas, velkas ĉia floro.
Silkvermo verŝas la sopiran silkon³ ĝis la morto,
Ĝis la cindriĝo daŭras larmo de l' kandela ploro.
Maten' ĉagrenas per blankiĝ' tempia en spegulo,
Vesper' sentigas brilon larman dum la vers-murmuro.
Ne fora estas Penglaj-monto⁴ de ĉi tiu loko;
La blua birdo⁵ ŝin vizitu ofte laŭ prokuro.*

Lejoŭĵuan

*Vespere triston sentis mi en koro,
Al Lejoŭĵuan⁶ veturis mi laŭ volo.*

Muzika insuleto Gulang

En sudorienta Ĉinio troviĝas malgranda insuleto kun areo de malpli ol 2 kvadrataj kilometroj. La loĝantoj de la insuleto ne kutimas al hupado de aŭtoj kaj bruado de modernaj fabrikoj. Ili kutimas nur al la pejzaĝo de la insuleto bela kiel muziko kaj al bela muziko simila al la pejzaĝo de la insuleto.

Tio estas la fame konata muzika insuleto Gulang.

Februare de la kuranta jaro mi veturis al la insuleto per pramo. Sur la bordo staras atendejo en formo de piano. Ĝi kvazaŭ ludas ĉarman gasto-bonvenigan muzikon kun akompano de

ondosonorado.

MUZIKAJ TALENTULOJ

Akompanate de s-ro Caj de la kultur-domo de Gulang-insuleto, mi unue vizitis la familion de la fama ĉina pianisto Ŝju Fejping. Min akceptis lia plej aĝa frato Ŝju Fejli. Informiĝinte pri mia intenco, li unue aŭskultigis al mi surbendigitan intervjuon. La anoncisto kun estima tono konigis la sukceson de Ŝju Fejping en muziko kaj alte taksis lin, ke li gajnis la grandan premion en la Pianluda Konkurso de Elizabeta. Ŝju Fejli fiere diris al mi, ke la surbendaĵo estas registrita de li hazarde el programero de "Voĉo

de Usono".

Menciinte la vojon iritan de Ŝju Fejping, lia frato diris: "La patrino multe influis lin. Kiel pia kristano, ŝi scias ludi kristanisman kantojn per piano kaj kelkfoje kondukas nin al preĝejo por ĝui muzikon."

Tion dirinte, Ŝju Fejli hontis: "Fakte, escepte de mi, ĉiuj miaj fratoj estis influitaj de la patrino kaj akiris grandajn sukcesojn en muziko. Mia unua pli juna frato Ŝju Fejŝing estas pianisto de la Centra Orkestro en Pekino kaj la kvara pli juna frato Ŝju Fejni estas violonisto de la Ensemblo de la Ĝenerala Politika Departemento

*Senlime ĉarmis la vespera suno,
Sed tamen venis jam krepuska horo.*



DU ŜJUNHE:

Revizito al la gubernia urbo Huĉeng

*Lastjare mi vizitis l' urbon de ĉi gubernio.
El la urbanoj ĉiu plendis pri maljusta io.
Hodiaŭ la guberniestr' ricevis ruĝan robon⁷ —
Per homa sango realiĝis lia promocio.*

Trad. LAŬLUM

1. Legendo diras, ke en Jangĝou estis ponto, ĉe kiu flutis 24 feinoj, kaj sekve ĝi ricevis tiun nomon.
2. T.e. printempaj floroj.
3. En la originalo estas vortludo per la ĉina vorto por silko, kiu sonas same kiel tiu por sopiro.
4. Penglaj-monto estas rezidejo de feoj laŭ ĉina mito.
5. La blua birdo, laŭ ĉina mito, estas kuriero de diino.
6. Lejotjŭan estis pitoreskejo proksime al la ĉefurbo Ĉang'an (nun Ŝji'an).
7. Ruĝa robo estis vesto por altranga ŝtatoficisto.

de la Ĉina Popola Liberiga Armeo.”

Devenis de la insuleto ankaŭ aliaj muzikistoj fame konataj en-kaj eksterlande, ekz., la unua ĉina voĉmuzika direktistino Ĝoŭ Ŝu'an, prezidanto de la Ŝanhaja Voĉmuzika Instituto doktoro Lin Ĝjunĉing kaj fratoj Jin Ĉengzong kaj Jin Ĉengĝji, famaj pianisto kaj kantisto respektive.

ORIGINALA FAMILIA KONCERTO

Laŭdire, familiaj koncertoj de Gulang-insuleto same kiel ties pejzaĝo fariĝis gustoplenaj belaĵoj kaj altiris multajn turistojn. Turistoj el Svedio, Francio, Usono, Filipinoj, Ugando, Aŭstralio, Britio kaj Japanio laŭ invito partoprenis familiajn koncertojn.

Mi vizitis la familion de Ĝeng Huj, kiu estas riĉa kaj loĝas en gotika vilao kun korto plena de floroj. Videble, la mastro tre amas vivon. En la granda gastoĉambro mi estis varme akceptata de la mastro. Li estas 66-jara, iam lernis voĉmuzikon kaj poste studis kulturadon de bananoj, sed ne forgesis muzikon. Li jam emeritiĝis kaj tutkore kolektas muzikajn sonbendojn. Ĝis nun li



Parto de Gulang-insuleto

jam kolektis ĉ. mil tiajn sonbendojn. Mastrino Jŭan Mingfeng estas emerita instruistino pri muziko kaj nun instruas al 5 infanoj pianludon. Al sia familia koncerto ili invitis turistojn sinsekve el Aŭstralio, Usono kaj Britio kaj transmarajn ĉinojn el Japanio. Ankaŭ iama usona ambasadoro en Ĉinio gloris ilian familian koncerton per sia ĉeesto.

Pasintjare iu brita inĝeniero vizitis ilian familian koncerton pro ĝia famo. Li estis infektita de la

gaja etoso de la koncerto, pretervole stariĝis, manklakis ritme kaj kune kun la gemastroj kantis la kanton “Eterna Amikeco”. Poste la inĝeniero kaj Ĝeng Huj fariĝis amikoj pri muziko kaj la brito ofte donis al Ĝeng Huj muzikajn sonbendojn. Ĝeng Huj kun ĝojo diris al mi: “Muziko ne nur plezurigis kaj junigis min, sed ankaŭ alportis al mi amikecon.”

S-ro Caj diris, ke sur la insuleto pli ol 100 familioj ofte okazigas tian koncerton. Ĉiusemajnofine aŭ festotage ili invitas parencojn kaj amikojn kanti kaj ludi muzikilojn, kio donas al ili harmonion kaj plezuron. Iun vesperon de la lasta somero, sur Gulang-insuleto 11 familioj kune okazigis familian koncerton, en kiu estis ĥoro de tri generacioj, muzikil-ludo de patrino kaj filo, dueto de geedzoj ktp. La sceno estis tre interesa kaj spektakla.

Jŭan Mingfeng direktas pianludon de sia nepino.



DEVENO DE LA MUZIKA INSULETO

La nombro de pianoj posedataj de tieaj civitanoj atingis 200-300. Laŭ proporcio ĝi okupas la unuan lokon en la lando. Se oni enkalkulas ankaŭ violonojn, akordionojn, zimbalojn kaj gitarojn, ĉiu tria familio posedas unu tian aŭ alian muzikilon. La loĝantoj de la insuleto ĝenerale havas bonan

muzikan kvaliton. Kiel do formiĝis ilia tiel bona muzika moro?

Kun la demando mi vizitis s-ron Ĝeng Jiŝjun, vicprezidanton de la Muzika Asocio de Ŝjamen, loĝantan sur la insuleto. Li estas altnivela en la voĉmuzika arto. Iam li lernis ĉe la fama ĉina voĉmuzikisto Ŭen Keĝeng. Nun s-ro Ĝeng mem instruas nemalmultajn lernantojn. En la libertempo li invitas ilin al sia muzika salono.

S-ro Ĝeng diris al mi, ke la insulanoj havas longan muzikan historion. Jam en la mezo de la 19-a jarcento ili konstruis multajn preĝejojn. En la preĝejoj misiistoj okazigis religiajn aktivadojn ĉiam akompanatajn de psalmoj. Oni instruis psalmojn ankaŭ en lernejoj. Kun la paso de jaroj, ludo de eŭropaj melodioj fariĝis loka moro. Eĉ hodiaŭ multaj maljunuloj povas kanti laŭ muziknotoj.

S-ro Ĝeng opiniis, ke alia kaŭzo de furoro de muziko rilatas al la medio. Gulang-insuleto havas nur iom pli ol 20 000 loĝantojn kaj



En la muzika salono de Ĝeng Jiŝjun

malpli ol 2 kvadratajn kilometrojn da areo, sed ĉie kreskas subtropikaj floroj kaj arboj, printempo regas kvazaŭ tutjare. Ĉar oni malpermesas veturon per ajna trafikilo sur la insuleto, tial tie aŭdeblas obtuzaj marondoj anstataŭ bruo de veturo kaj la loko estas tre kvieta. La medio ebligas al la loĝantoj bone percepti

muzikon kaj absorbiĝi en ludo de muzikiloj.

Vesperigis, kiam mi adiaŭis s-ron Ĝeng. Mi promenis al strateto kaj aŭdis belan muzikon. Ĉi-momente mi sentis min kvazaŭ en fea muzika lando, mi do per malrapidaj paŝoj iris profunde en la strateton. ■

Humuraj anekdotoj (I)

de **BERTA SCHUMANN (GDR)**

DIALOGETO

Novedzino al sia edzo: “Ĉi-semajne ni devos manĝi ĉiutage la samon.”

“Kial do, kara?”

“Ĉar leginte la kuirlibron mi malatentis, ke la preparaĵo destinitas por 12 personoj.”

SEKRETARIINOJ BABILAS

“Ĉu ankaŭ via ĉefo estas tiom distrita?”

“Ne, ankoraŭ pli. Se matene mi

ne tuj enrubujigas mian matenmanĝ-paperon, tiam li subskribas ĝin.”

INTER VIRINOJ

“Mia edzo laboras de unu monato en bierfarejo.”

“Kiel plaĉas al li?”

“Mi ne scias. De tiam li ankoraŭ ne estis hejme.”


BIERA KURADO

Ĉiujare en diversaj landoj

okazas lerteckura konkurso por kelneroj. Antaŭ nelonge portugalo rompita la rapideckrekordon de ĉiuj bierkurantoj. Havante pleton kun 2 bierboteloj kaj 2 glasoj sur la mano kaj la buŝtukon sur la brako, li startis en la urbo Porto.



Donacado de faruna ŝafo



Farunaj ŝafoj

En la kamparo de Ciŝjan-gubernio, Hebej-provinco, estas moro donaci farunan ŝafon. Tion oni notis jam en la gubernia kroniko en Ming-dinastio (1368-1644) kaj hodiaŭ la moro ankoraŭ furoras en la gubernio. Nun la loĝantoj jam difinis la 15-an de la sepa monato laŭ la ĉina luna kalendaro kiel la Tagon de Donacado de Faruna Ŝafo.

En tiu tago patrino devas fari farunan ŝafon por sia edziniĝinta filino kaj sendi iun doni al ŝi la

ŝafon simbolantan feliĉon. Pro tiu kaŭzo la virinoj en la kamparo de Ciŝjan-gubernio lertas fari farunan ŝafon. Unue ili faras figuron de ŝafo el pasto, poste per tondilo faras ĝiajn orelojn, buŝon, piedojn kaj voston kaj per kombilo sulkas la korpon, por ke ĝi ricevu striojn similajn al haroj, kaj fine faras okulojn aŭ ornamajojn el nigraj faboj aŭ io simila. Tiel la ordinara pasto fariĝis versimila ŝafo post ilia lerta laboro.

Unu jaron post la edziniĝo de filino okazas la plej solena ŝafodonaca ceremonio. Ĝenerale oni devas donaci 4 farunajn ŝafojn. Tiutage la patrino organizas malgrandan ŝafo-donacan grupon. Du personoj irantaj plej antaŭe portas grandan tabulon, sur kiu staras 4 farunaj ŝafoj unu post alia kaj unu malpli granda ol alia. La plej antaŭa pezas ĉ. 15 kg. kaj la plej malantaŭa pozas kun returnita kapo. Laŭ la loĝantoj, la 4-a ŝafo signifas, ke la filino nasku multe. Post kiam la farunaj ŝafoj estas portitaj al la familio de la filino, la bofilo devas tranĉi la plej grandan farunan ŝafon. Li unue detranĉas pecon da "karno", ligas ĝin per ruĝa silka fadeno kaj fine pendigas ĝin ĉe rulpentraĵo sur muro. La pecon oni anstataŭigos en la venonta jaro per nova. Tio signifas, ke "la malnova ŝafo renkontiĝas kun la nova, oni havas ĉiujare grenon superfluan". Poste la bofilo manĝas la kapon de la ŝafo, la filino ĝiajn piedojn kaj la

ceteran parton ili disdonas al la vilaĝanoj, por ke ili partoprenu en la ĝojo.

Tian ceremonion oni okazigas en sinsekvaj 3 jaroj. Post 3 jaroj oni donacas ne grandan farunan ŝafon, sed malgrandan kun longeco de ĉ. 2 cm. Krom ŝafoj, la virinoj de Ciŝjan scipovas fari ankaŭ ranojn, kuniklojn, gekojn, kukumojn, melongenojn, persikojn kaj kortobirdojn. Tiujn malgrandajn farunajn objektojn oni donas al infanoj kiel manĝaĵon.

Pri la moro cirkulas multaj legendoj. El ili unu, tre instrua, diras, ke antaŭ tre tre longe iu junulo ne respektis siajn gepatrojn. La vilaĝanoj kritikis lin, sed li ne korektis sin. Lia patrin-flanka onklo tion ne toleris kaj sendis lin paŝti ŝafojn sur monto kune kun iu paŝtisto. Iutage la junulo trovis, ke ŝafido mamsuĉis genuante sur la herbejo, kaj demandis la paŝtiston pri la kialo. La paŝtisto diris al li, ke sian kreskon la ŝafido ŝuldas al lakto de la patrino. Por danki la patrinon, ĝi suĉas ĉiam surgenue. Tion aŭdinte, la junulo forte kortuŝiĝis. Li pensis en si: eĉ ŝafido scias danki la patrinon pro ŝia nutrado, ĉu homo povus ne tiel agi? Li do revenis al siaj gepatroj kaj tre respektis ilin. Eble pro respekto al la paŝtisto la loĝantoj de Ciŝjan rigardas lin kiel bonan instruiston. Kaj dum farado de faruna ŝafo oni kutime modlas paŝtiston kun pajlĉapelo sur la kapo kaj vipo en mano. ■

Post 22 horoj, kurinte 132 kilometrojn, li servis la urbestron de Lamego per biero. Sed ĝi jam relative varmiĝis.

ĈAMBROBESTOJ

Specialan zorgon pri siaj gastoj montris la administrantaro de granda hotelo en la urbolando Singapuro. Laŭ ĝia ordono en la ĉambroj fiksatis atentigiloj sekvaj: Estimataj gesinjoroj, ni petas vin ne ekscitiĝi vidante musojn. Tiujn nedanĝerajn bestetojn ni aĉetis speciale por vi — ili manĝadas venenajn araneojn.

KOREKTO

Anstataŭ Dosagi legu Oosugi en la 16-a linio, maldekstra kolumno, p. 19, 3-a numero, 1988.

Naskiĝo de la ĉina civilizacio

Ĉinio estas unu el la plej frue civilizitaj regionoj de la mondo. Tamen, ĝis nun oni ankoraŭ esploras pri la naskiĝa periodo de la ĉina antikva civilizacio.

Oni devas trovi la originon de la ĉina civilizacio ne nur en la antikvaj dokumentoj, sed ankaŭ en la arkeologia esplorado.

La trovo de pli ol 150 000 testudŝelaj kaj ostaj pecoj kun skribaĵoj, delikataj ceremoniaj bronzaĵoj, armiloj, bronzaĵoj uzitaj por ĉaroj kaj ĉevaloj, grandaj maŭzoleoj kaj ruinoj de palacoj en Jin-ruino en Anĵang de Henan-provinco pruvis, ke la

kulturo de la posta periodo de Ŝang-dinastio (ĉ. 16 jc. a.K. — 11 jc. a.K.) apartenis al pli supera civilizita socio.

En la frua periodo de la 50-aj jaroj, ĉinaj arkeologoj trovis kulturajn ruinojn de la frua periodo de Ŝang-dinastio en Erligang k.a. de la urbo Ĝengĝoŭ de Henan-provinco. Oni jam trovis, ke la kulturaj ruinoj de la frua periodo de Ŝang-dinastio dislokiĝas en la provincoj Henan, Hebej, Ŝandong, Ŝanŝji, Ŝenŝji, Hubej kaj Anhuj.

Ĉe Ŝangĉeng apud Ĝengĝoŭ,


krom ruinoj de densaj loĝejoj (inkluzive tiujn de kamparanoj), troviĝas ruinoj de diversaj metiejoj kaj tombejoj, tie oni trovis multajn metiartaĵojn, ekz., bronzaĵojn, jadaĵojn, ostaĵojn, fajencaĵojn k.a. Estas menciinde, ke oni trovis tie gigantajn kvadratajn ding-ojn (tripiedojn), kiuj prezentis pli altan muldan nivelon kaj tiaman prosperan bronzan metion.

Nemultaj estas la skribaj materialoj pri la frua periodo de Ŝang-dinastio, oni trovis nur malmultajn ideografiaĵojn, gravuritajn sur ostoj kaj fajencaĵoj en ruinoj en Ŝangĉeng k.a. Laŭ la

Fajenca vinujo elterigita en la ruino de Erlitoŭ




Fajenca kuirilo elterigita en la ruino de Erlitoŭ



strukturo ili evidente apartenis al la sistemo de skribaĵoj sur testudaj ŝeloj kaj ostoj. 10 gravuritaj ideografiaĵoj sur ostopeco trovita en Erligang de Ĝengĝoŭ estas tre similaj stile kaj forme al tiuj de Jinruino. Laŭ tio, en la frua periodo de Ŝang-dinastio sendube ekzistis gravuritaj skribaĵoj. Laŭ antikvaj materialoj, dekomence de sia fondiĝo Ŝang-dinastio jam troviĝis en civilizacia periodo.

Antikva literaturo diras, ke Ŝang ne estis la plej frua dinastio en la ĉina historio, antaŭ Ŝang estis Ŝja-dinastio (ĉ. 21 jc. a. K. — 16 jc. a. K.). La supre menciita fru-perioda civilizacio de Ŝang-dinastio montris ke ne estis subita fenomeno la tiam aperintaj grandaj urboj, konstruaĵaro de grandiozaj palacoj, kompare prospera metio kaj kompare maturaj ideografiaĵoj. La civilizacio de frua periodo de Ŝang ne estis la komenco de la ĉina antikva civilizacio. Antaŭ ĝi certe ekzistis pli frua civilizacia evolua etapo kaj tiu devas esti la civilizacio de Ŝja-dinastio.

En la ĉina akademia rondo oni havas ne tute saman opinion pri la kulturo de Ŝja-dinastio, tamen parto de arkeologoj (inkluzive la aŭtoron) opinias, ke la kulturo de Erlitoŭ trovita en la lastaj jaroj estis tiu de Ŝja-dinastio. La totala areo de la ruino en Erlitoŭ de Janŝi en Henan-provinco jam superis tri milionojn da kvadrataj metroj kaj egalas tiun de Ŝangĉeng en Ĝengĝoŭ. En la ruino oni trovis du grupojn da ruinoj de palacaj konstruaĵaroj, la areo de la pli granda superis dekmilon da kvadrataj metroj kaj ĝi troviĝis en la mezo de la ruino. Esplorado konstatis ke ĝi devas esti ruino de la prapatra templo. La trovo de la prapatra templo montris, ke la ruino devis esti la ĉefurbo. La esploro pri geografia kaj historia materialo montras ke Erlitoŭ en Janŝi eble estis la ĉefurbo de Ŝja-dinastio. La prapatra templo aperinta en Erlitoŭ-kulturo kon-



Tripieda fajencaĵo elterigita en la ruino de Erlitoŭ.

firmis, ke tiam jam naskiĝis ŝtata potenco.

Erlitoŭ-kulturo jam eniris en la periodon de bronzaĵoj. Oni trovis bronzaĵojn en multaj ruinoj de Erlitoŭ-kulturo kaj pli multajn en la ruino de Erlitoŭ de Janŝi, kiaj tranĉiloj, adzoj, ĉiziloj, boriletoj, alenoj, fiŝhokoj, lancoj militistaj hakiloj, sagpintoj, ceremoniaj bronzaĵoj kaj muzikiloj. Tio montris, ke tiama bronza metio havis certan skalon kaj la bronzaĵoj estis vaste uzataj. Tamen, komparante sin kun tiu de la frua periodo de Ŝang-dinastio, ĝi estis sufiĉe postiginta. Ĝiaj bronzaĵoj estis malpli multaj en specoj kaj nombroj kaj teknike

krudaj ol tiuj en la frua periodo de Ŝang.

La skribaj materialoj de Erlitoŭ-kulturo estis malpli multaj ol tiuj de la frua periodo de Ŝang. Oni trovis nur unuopajn ideografiaĵojn gravuritajn sur fajencaĵoj. Strukture ili estis tre similaj al skribaĵoj gravuritaj sur testudaj ŝeloj kaj ostoj. De tio oni asertis, ke Erlitoŭ-kulturo estis la kulturo de Ŝja-dinastio kaj certe pli frua civilizacio ol tiu de Ŝang-dinastio.

La supre menciitaj arkeologiaj materialoj pruvis, ke la origino de la ĉina civilizacio estis Erlitoŭ-kulturo, t.e. la civilizacio de Ŝja. Ekde tiam Ĉinio eniris en novan civilizacian epokon. ■

Dongting-lago

de ĜENG ĜENGJE

Vojaĝante laŭ Jangzi-rivero, mi vidis multajn lagojn grandajn kaj malgrandajn. Unu el ili estas Dongting-lago situanta sur la limo inter la provincoj Hubej kaj Hunan.

RIĈA DONGTING

Dongting-lago, la dua granda dolĉa lago de Ĉinio, kun areo de 2 820 kvadrataj kilometroj kaj periferio de 400 kilometroj, enfluas en Jangzi-riveron ĉe Ĉenglingĝji de Jŭejang-gubernio, Hunan-provinco. Ĉirkaŭe de la lago 18 gubernioj kaj urboj, kiaj Ĉangde, Jŭejang, Jijang kaj Milŭo, estas abundaj je fiŝoj kaj rizo de antikve.


La laga regiono kun milda klimato kaj fekunda grundo

kovras 578 666 hektarojn da agroj, ĉ. 1/9 de la totala agraro de la provinco Hunan. Tie abundas greno, kotono, akvoproduktaĵoj, porkoj, ovoj kaj kortobirdoj, kaj ankaŭ multspecaj ekonomiaj plantoj, kiaj ramio, teo, mandarinaj, kolzo, lotuso, fragmito k.a. Tie produktiĝas pli ol 40 specoj da mineraloj, kiel oro, volframo, kupro, plumbo, zinko, hidrargo, kvarco, kalkŝtono, diamanto, marmoro, fosforo ktp.

La industrio en la regiono iom post iom disvolviĝas. En la urbo Jŭejang norde de Dongting-lago funkcias pli ol 380 fabrikoj de naftoprilaboro, kemi-industrio, elektroenergio, maŝino, konstrumaterialo, medikamento, manĝaĵo kaj tekstilaĵoj. La urbo

Ĉangde okcidente de Dongting-lago havas longan historion pri bredado de silkraŭpoj kaj produktado de silkaĵoj. Nun tie funkcias pli ol 40 novtipaj tekstilaj fabrikoj kun ĉ. 500 specoj da produktaĵoj, kiaj kotonaj, linaĵo, silkaĵo, kemifibro kaj trikotaĵo. Ili produktas ĉiujare pli ol 30 000 tunojn da koton- kaj lin-fadenoj kaj 3 milionojn da metroj da silkaĵoj. Ĉ. 50 produktaĵoj estis elektitaj kiel bonkvalitaj produktaĵoj de la Ĉina Tekstila Industria Ministerio kaj Hunan-provinco. La regiono ankaŭ estas unu el la plej grandaj produktaĵoj de tekstilaj maŝinoj en suda Ĉinio.

Dongting-lago estas centro de akva kaj tera trafiko de Hunan-provinco. Ĝi ligiĝas norde kun Jangzi-rivero kaj estas la ĉefa linio por komuniĝi kun surmara transportado; ĝi, tuŝante sude la riverojn Ŝjangĝjang, Ziŝuj, Jŭanĝjang kaj Liŝuj, ludas gravan rolon en akcelo de la naci-ekonomia disvolviĝo. Dongting-lago servas kiel natura akvrezervejo por reguligi kaj rezervi inundakvon de Jangzi-rivero. Ĉe la lago iu geologo diris al mi, ke en la primitiva tempo la regiono estis vasta tero. Poste ĝi fariĝis vasta lago pro sinko de terkrusto. Por ekspluati virgan teron en la laga regiono, niaj antaŭuloj baris la nordajn aperturojn de Jangzi-rivero kaj konstruis Ĝingĝjang-digon, tiel la riverakvo ellasiĝis nur suden.





Fiŝboatoj sur la lago

Nun la inundakvo el la supra baseno de Jangzi-rivero elasiĝas en Dongting-lagon tra kvar aperturoj. Post reguligo kaj moderigo, la akvo enfluas tra la elirejo en Jangzi-riveron, kio multe mildigas la minacon de la diluva pinto de Jangzi-rivero al la regiono de ĝia malsupra baseno.

Samtempe kun tio, fluante preter kaj moderiĝante en Dongting-lago, Jangzi-rivero alportas ĉiujare 112.5 milionojn da kubmetroj da ŝlimo. Tiel pli kaj pli altiĝas la lito de la lago kaj ĝia areo reduktiĝis de pli ol 6 000 en 1825 al la nunaj 2 820 kvadrataj kilometroj. Kaj pro tio la rezerva kaj ellasa povo de Dongting-lago pli-malpli malfortiĝis, kaj oftigiĝis sekeco kaj inundo.

Por reguligi la lagon la ŝtato ellaboris la orientilon "ĉiuflanke projekti, sinteze reguligi; verdigi kaj protekti teron, forkonduki sablon kaj malebligi ŝlimado". Laŭ tiu ĉi orientilo, nun oni jam plantis pli ol cent milionojn da arboj en la regiono de la lago kaj la supraj basenoj de Jangzi-rivero kaj aliaj riveroj enfluantaj en la lagon, funkciigis inunddividan konstruaĵon, plifirmigis la kontraŭinundan digon kaj dragis la riverojn kaj navigvojojn, kaj estas

elfositaj 300 000 kubmetroj da ŝlimo ĉiujare.

JŬEJANG-TURO

Ŝipveturinte suden duonhoron de Ĉenglingĝji, mi atingis la urbon Jŭejang.

Jŭejang, fama urbo en la ĉina historio, estas konata kiel turisma loko. La urbo administras 6 guberniojn kaj 3 distriktojn kun 4 390 000 loĝantoj kaj estas la centro de politiko, ekonomio kaj kulturo de norda Hunan-provinco.

Turistoj senescepte vizitas Jŭejang-turon.

Jŭejang-turo, sur la okcidenta pordoturo de la urbo Jŭejang kaj apud Dongting-lago, estas de ĉiam laŭdata per la vortoj "bela akvo sub la ĉielo en Dongting, kaj ĉarma turo sub la ĉielo en Jŭejang". Tiutage, suprenirinte laŭ la ŝtuparo de la suda urbomuro kaj trapasinte arkajon, mi venis al Jŭejang-turo. Rigardante kun levita kapo, mi vidis nove riparitan kaj lakitan trietaĝan turon. La turo kun supro en kaska formo estas ligna kaj 19 metrojn alta, kun kvar kolonoj kiel subteniloj, sen ajna metala aŭ ligna najlo. La traboj, kolonoj kaj diloj firme kunligas sin reciproke. Precipe 12 leviĝantaj tegment-

randoj de la tri etaĝoj okulfrapas kiel 12 flugiloj.

Sur la muroj de la unua kaj dua etaĝoj pendas lignaj gravuraĵoj kun poemoj kaj versduoj verkitaĵoj de diversdinastiaj turistoj. Inter ili mi plej admiras jenan versduon: "Ĉirkaŭprenas mi Dongting-vastaĵon per rigardo, inspiras kvinmil-jara historio de la lando." La 12 santalaj tabuloj, sur kiuj estas gravurita la fama prozaĵo "Pri Jŭejang-turo" de verkisto Fan Ĝongjan (989-1052) de Song-dinastio (960-1279), pendas en la dua etaĝo. La prozaĵo el 368 ideogramoj estas distingiĝa inter la samspecaj verkoj per siaj riĉa enhavo, profunda filozofia teorio kaj alta lingva artismo. La frazo el la prozaĵo "zorgi la unua pri la nacio kaj ĝui la lasta" estas maksimumo por ĉinoj de centoj da jaroj.

MITA ĜJUNŜAN-MONTO

En la vastega Dongting-lago kuŝas la smeralda insuleto Ĝjunŝan-monto. Ĝi, tutjare kaŝita en nebulo, aspektas mistere kaj nebulece. Kun multaj historiaj restaĵoj kaj mitoj ĝi vere estas altira.

La urbo Jŭejang distancas de Ĝjunŝan-monto je 15 kilometroj. Dum inundo veturinte ĉ. 40 minutojn per motorboato, mi atingis la lokon.

Ĝjunŝan-monto estis nomata Dongting-monto. Legendo diras, ke dum la periodo de Jaŭ kaj Ŝun, Jaŭ trovis Ŝun talenta kaj morala, cedis al li sian tronon kaj edzinigis siajn filinojn Ehŭang kaj Njujing al li. Post la geedziniĝo ili ame vivis. Ŝun ofte inspektis kaj ordigis riverojn. Li vizitis Dongting-monton dum sia inspektado kaj mortis de malsano en Cang'u (en la nuna Hunan-provinco). Pro longtempa nereveno de sia edzo Ehŭang kaj Njujing eliris serĉi lin kaj surgrimis la monton. Tie ili subite informiĝis, ke la edzo mortis, kaj triste ploregis apog-

ante sin sur bambuoj. Iliaj larmoj falis sur la bambuojn de Dongting-monto kaj postlasis sur ili brunajn makulojn, tial oni nomas tiujn bambuojn makulaj bambuoj (*Phyllostachys bambusoides*). Post la morto de la du edzinoj oni enterigis ilin sur Dongting-monto kaj oni ŝanĝis la nomon de la monto en Ĝjunŝan-monton memore al ili. Nun sur la monto troviĝas tombo de la du edzinoj kun versduo “Ĝjun-edzinoj anime vivas por eterne, montobambuoj larmas pro Ŝun sola triste”. Evidente, la unuaj vortelementoj de la versoj kune legiĝas “Ĝjun-monto”.

Sudokcidente de la tombo troviĝas Liŭji-puto. Laŭ legendo la puto estas la enirejo al la draka palaco de la lago, tra kiu antikva klerulo Liŭ Ji portis leteron por turmentata draka filino al ŝia patro, la draka reĝo de la lago Dongting. La puto vere estas mirinda: Ĝi situas tuj ĉe la bordo de Dongting-lago, tamen ĝia akvosurfaco estas pli alta ol tiu de la lago je pli ol 5 metroj. Ĝi neniam sekiĝas malgraŭ ke oni ĉerpas senĉese. La akvo estas dolĉa sen malpuraĵo. Tiutage iu maljuna

lokano laŭdis la puton, ke ĝi estas “dia puto”, kaj ĝia akvo “fea akvo”. De la lastaj du jaroj la vinfarejo de Jŭejang faris el la putakvo “Gujŝe-vinon”, kiu estas bonvena pro sia bongusto kaj moderaodoro.

Vojaĝante sur Ĝjunŝan-monto, mi kvazaŭ eniris naturan botanikan ĝardenon. Tie ĉielskrapas arboj, abundas tearboj kaj sovaĝaj drogherboj. Kreskas pli ol dek specoj da valoraj bambuoj, kiaj makula bambuo, kvadrata bambuo (*Chimonobambusa Quadrangularis*) kaj ventrodika bambuo (*Bambusa ventricosa*). En la monto disvolviĝas floroj en ĉiu sezono, precipe en mezaŭtuno osmantoj aromas en vento tra la insuleto. La plej alta osmanta arbo jam kreskas de pli ol 300 jaroj. La verda teo nomata “argenta pinglo”, dolĉa kaj aroma, estas propra al la insuleto. Laŭdire, la teo estis difinita kiel tributo al imperiestro en Tang-dinastio (618-907).

LA LOKO, KIE GRANDA POETO SIN DRONIGIS

En la sekvanta tago post kiam mi revenis de Ĝjunŝan-monto al

Jŭejang, mi vizitis Ĉjuzi-templon norde de Milŭo-rivero (branĉo de Ŝjangĝang-rivero, fluanta en Dongting-lagon) starigitan memore al la granda antikva ĉina poeto Ĉju Jŭan (ĉ. 340-278 a.K.) kaj aliajn historiajn restaĵojn pri Ĉju Jŭan.

Ĉju Jŭan estis Ĉu-regnanto kaj lordo de Ĉu-regno. Li insistis pri prudenta politiko kaj faris neakordigeblan batalon kontraŭ tiamaj sklavposedantoj. Poste li estis eksigita je la ofico kaj ekzilita. Dum sia ekzilo en la regiono de Hunan kaj Hubej li verkis “Disiĝa Malĝojo”, “Naŭ Odoj” kaj aliajn pli ol 20 poemojn, esprimante sian zorgon kaj tristecon pri la regno kaj popolo. En 278 a.K. Ĉju Jŭan dronigis sin en Milŭo-rivero en ekstrema angoro kaj senespereco.

Ĉjuzi-templo staras sur Jusi-monto, kie loĝis Ĉju Jŭan dum la ekzilo.

La templo konsistas el tri haloj konstruitaj laŭ la ĉina tradicia strukturo kaj dispozicio. Ĉe la supro de la antaŭa halo pendas tabulo kun la surskribo “La spirito de Ĉju Jŭan brilas kiel la suno kaj luno”.

En la meza halo estas niĉo kun memortabulo pri Ĉju Jŭan. En la malantaŭa halo staras la orita statuo de Ĉju Jŭan 3 metrojn alta. Sur la muroj estas gravuritaj epitaĵoj kaj poemoj de diversdinastiaj kleruloj.

Ekster la templo sur Jusi-monto dislokiĝas 8 ruinoj pri Ĉju Jŭan, ĉiu kun viveca legendo, kiu spegulas la sopiron de la popolanoj al Ĉju Jŭan.

Rigardate malproksimen sur Jusi-monto, la ondanta Milŭo-rivero torentas okcidenten kunfandiĝante kun la nebula ondarado de Dongting-lago. Sur la rivero punktiĝas ŝvebanĵaj veloj. Ambaŭborde de la rivero serpentas longa digo. Interne de ĝi sterniĝis vasta ebena kampo, sur kiu kamparanoj kolektis rizon.

En la Templo de Du Edzinoj





Rikolto de lotussemo sur la lago

FOTO DE ĜENG ŜJANGŜJAUŬ

Jŭejang-turo

FOTO DE ŜEN ĈEN





Dongting-lago en mateno

FOTO DE ĜENG ŜJANGŜJAŬ






Fiŝaĉetejo ĉe la lago FOTO DE ĜENG SJANGŝJAŬ

En la Jŭejang - a Fabriko de Plumaj Ventumiloj
FOTO DE ŜEN ĈEN



Liŭji-puto FOTO DE MA HOŬJI

Ĉjuzi-templo FOTO DE ŜEN ĈEN




Hu Ŝjaŭping — estonta vestoprojektistino

Kvankam la vestoj de Ĉinio ankoraŭ ne estas kompareblaj kun laŭmodaj vestoj en grandaj urboj de la mondo, tamen en la lastaj jaroj la stato multe ŝanĝiĝis: Kolorriĉaj, diversfasonaj kaj ĉarmoplenaj vestoj pli kaj pli multiĝis en grandaj kaj mezgrandaj urboj de Ĉinio. Kreskas juna generacio de vestoprojektistoj kun vasta vidkampo kaj kreivo.

En la juna generacio portanta la esperon de la ĉinaj vestoprojektistaj rondoj la plej elstara estas Hu Ŝjaŭping, studentino de la kvara klaso de la vesta fakultato de la Centra Instituto de Artoj kaj Metioj. En la Kvina Internacia Junulara Vestokonkurso okazigita en decembro 1987 en Parizo, ŝi gajnis la “Ŝtatan Premion” per sia projektita ensemblo de vespera robo.

Kiam mi vidis Hu Ŝjaŭping en la instituto, la plej granda tiufanke en Ĉinio, de la orienta Pekino, tiu estonta vestoprojektistino kun okulvitroj kaj en simpla vesto dekoraciis klasĉambrom kune kun filmistoj de iu filmstudio. Ili preparis sin por produkti dokumentan filmon pri la nuna stato de la ĉinaj vestoprojektistaj rondoj, Hu Ŝjaŭping nature fariĝis unu el la roluloj de la filmo.

Daŭrigante dekoraciadon kune kun la filmistoj, ŝi rakontis al mi pri sia pasinteco.



Hu Ŝjaŭping tajloras veston projektitan de ŝi.

Ŝi naskiĝis kaj kreskis en la fama antikva ĉina urbo Ŝji'an, kie laboras ŝiaj gepatroj. Fininte la lernadon en supera mezlernejo en 1981, ŝi eklaboris kiel servolaboranto en vesta eksperimenta fabriko de Ŝenŝji-provinco.

“Pri tiu tro monotona laboro neniu interesiĝas, ankaŭ mi,” daŭrigis Hu Ŝjaŭping kun rideto, “sed eble ĝuste dank’ al la laboro en la vesta fabriko, nun mi havas la ŝancon paroli kun vi ĉi tie.”

Ŝi konigis al mi, ke ŝi sciis nenion kaj havis neniun intereson pri vestoprojektado antaŭ ol eniri

la fabrikon. Ŝi opinias, ke la jaro 1983 estas turnopunkto dum ŝia vivo.

En tiu ĉi jaro la Centra Instituto de Artoj kaj Metioj funkciigis vestofaran kurson en Ŝji'an por altigi vestoprojektan nivelon de nordokcidenta Ĉinio. Estis hazarde, ke la sidejo de la kurso estas en la fabriko, kie Hu Ŝjaŭping laboris. Tio sendube estis granda ĝojiga novaĵo por Hu Ŝjaŭping.

La kurso difinis, ke ĝi akceptos nur projektistojn. Ŝi embarasiĝis, sed ne perdis memfidon. Ŝi informiĝis, ke la kurso bezonas



Hu Ŝjaŭping (maldekstre) kaj manekeno en vespera robo projektita de ŝi.

kelkajn servolaborantojn, kaj tuj konsciis, ke venos al ŝi la lasta espero. Ne nur estis Hu Ŝjaŭping sola, kiu volontis esti servolaboranto. Pro justeco la kurso anoncis, ke ĝi ekzamenos la sinanoncantojn pri fundamentaj scioj.

Hu Ŝjaŭping decidis ne preterlasi tiun ĉi ŝancon. Ŝi diligente studis lernitajn lecionojn pli ol unu semajnon kaj fine estis akceptita kiel servolaboranto.

“Ĉu indas, ke vi tiom penis por esti servolaboranto, kiu ja ne estas oficiala kursano?” Mi ne tute

komprenis ŝian faron siatempan.

“Kompreneble, indas,” ŝi diris, “antaŭ tio mi faris tian laboron pli ol unu jaron, sekve mi bone konas la laboron. Mi supozis, ke en la kurso ne estos tiom da servolaboroj por fari, mi certe havos la ŝancon kontaktiĝi kun instruistoj, eĉ preni lecionojn.”

Poste, fakto pruvis, ke la supozo de Hu Ŝjaŭping estas tute ĝusta. La kurso daŭris ses monatojn. Plenuminte sian laboron, Hu Ŝjaŭping ĉeestis preskaŭ ĉiun lecionon. Kvankam la lecionoj

kolorologiaj, staturologiaj, estetikaj k.a. estis sufiĉe malfacilaj por ŝi, al kiu mankis fundamentaj scioj, tamen ŝi eniris la pordon de vestoprojektado dank’ al sia penado kaj saĝo.

Ĉe la finiĝo de la kurso, la kursanoj devis fari pordiploman projekton. Ankaŭ Hu Ŝjaŭping tion faris kaj donis al instruistoj sian projekton. La instruistoj laŭdis ŝin pro ŝia obstineco kaj penado. Ŝia unuafoje projektita fasondesegno estis aprobita de la instruistoj. Hu Ŝjaŭping vidis novan teron antaŭ si. En ŝi estiĝis forta deziro fari artan kreon. Ŝi estis certa, ke ŝi povos projektiti ŝatatajn fasonojn. En la jarfino ŝi partoprenis la konkurson pri vestoprojektado de Ŝenŝjiprovinco kaj gajnis la premion “Cent Floroj”.

Poste, Hu Ŝjaŭping pli multe absorbiĝis en vestoprojektado kaj pli diligente lernis koncernajn fundamentajn sciojn kaj teoriojn. En 1984 la vesta fakultato de la Centra Instituto de Artoj kaj Metioj akceptis lernantojn en Ŝji’an. Dank’ al siaj klereco kaj lerteco pri vestoprojektado, ŝi sukcese trapasis la ekzamenon eniran al la plej alta lernejo de Ĉinio, kiu kulturas vestoprojektistojn.

Aŭtune de 1984 Hu Ŝjaŭping venis al Pekino kaj komencis lerni teorion kaj projektajn teknikojn pri vestoj en la instituto.

En la kvar lernojaroj Hu Ŝjaŭping ne nur studis la teorion pri modernaj vestoj, iliajn trajtojn kaj evoluajn tendencojn, sed ankaŭ donis grandan atenton por ĉerpi sciojn kaj nutraĵojn el la antikva ĉina kulturo kaj la reala vivo.

Ŝi ofte vizitis la Imperiestran Palacon, muzeojn, antikvaj konstruaĵoj kaj vidindejoj en Pekino. Ŝi studis ankaŭ ĉinstilajn pentraĵojn, kaligrafiaĵojn, kaj ankaŭ plastikojn de diversaj porcelanaĵoj kaj fajencaĵoj kaj pentraĵojn sur ili. Unuvorte, ŝi

esploris ĉiujn objektojn videblajn kaj edifajn en la vivo.

Ŝi ankaŭ faris vojaĝon al diversaj lokoj de Ĉinio en vintraj kaj someraj ferioj por esplori provincestilajn objektojn. Ŝi kolektis papertondaĵojn kun loka koloro en nordokcidentaj provincoj de Ĉinio, esploris diversajn fasonojn en sudokcidentaj provincoj, kie dense loĝas nacimalplimultanoj. Hu Ŝjaŭping diris: "La kvarjara lernado kaj vivo vere komprenigis al mi la veron, ke la vestoj de la homaro estas konsistiga parto de ĝia tuta kulturo. Nur nun mi povas konfesi, ke mi eniris la artan pordon de vestoprojektado."

Poste, nia paroltemo sin turnis al la vespera robo, ĉar ĝuste per ĝi ŝi gajnis la honoron.

Evidente, Hu Ŝjaŭping kun granda intereso parolis pri tiu temo. Post momenta medito ŝi komencis rakonti pri la projektado.

Novembre de 1987 la Organiza Komitato de la Kvina Internacia Junulara Vestokonkurso en Parizo sendis sian inviton al la Centra Instituto de Artoj kaj Metioj, petante ke ĝi proponu konkursajn verkojn. Tiu informo rikoltis fortan eĥon en la fakultato, kaj la studentoj ĉiuj deziris tion provi.

"Mi projektis en penso tri sinsekvajn tagojn, post kiam la fakultato donis la informon," diris Hu Ŝjaŭping. "tiam mi, kompreneble, ne kuraĝis pensi pri premio, tamen mi esperis, ke mia verko estos plaĉa en tiu internacia konkurso."

Ŝi diris: "Komence, ankaŭ mi intencis fari plastike strangan projekton, sed mi baldaŭ neis tion. Mi decidis fari ĝin ĉefe kun nacia trajto kaj iom da okcidenta stilo."

Fine Hu Ŝjaŭping elektis ĉinan robon kiel la bazon, kaj faris al ĝi iom da modifo. Ŝi ŝanĝis duflankajn paŝfaldojn de la robo



Hu Ŝjaŭping (dekstre) en foiro de modaj vestoj

en la frontan simplan paŝfaldon, ĝiajn kvadratajn baskojn en ovalajn baskojn iomete malfermiĝantajn ambaŭflanke, kaj donis al la rekta manumo de la ĉina robo hirundvostan ornamajon. La plej "revolucia" modifo al la ĉina robo estas, ke Hu Ŝjaŭping duigis ĝin. La ĉina robo estas svelta. Hu Ŝjaŭping dividis ĝin en du partojn, striktan jakon kaj jupon, kiuj pli bone montras la sturatan belon de virino. Kvankam la modifo estas tiel granda, tamen ĝi ankoraŭ havas fortan stilon de la ĉina robo, ĉar la jakon kaj jupon estas faritaj el samkvalita kaj samkolora materialo, kaj la jakon konservas la rektan kolumon, tradician stilon de la ĉina robo. Fine Hu Ŝjaŭping projektis por la vespera robo pintsupran ĉapelon kunfandinte la trajton de mandarena ĉapelo de Ĉing-dinastio (1644-1911) kaj tiun de la pluvĉapelo de nacimalplimultano de suda Ĉinio, kaj garnis la fronton de la jakon per bildo de ronda papertondaĵo kolektita en vilaĝo de nordokcidenta Ĉinio.

La fasono de la robo projektita

de Hu Ŝjaŭping finfine fariĝis reala objekto sub la helpo de instruistoj. La jakon kaj jupon de la robo estas nigraj, kun ruĝa subjupon iomete montriĝanta ĉe la paŝfaldoj de la jupon, ronda pintsupra ĉapelo kaj la bildo de ruĝa, flava kaj blua papertondaĵo brilanta fronte de la jakon.

Kiam mi vidis foton pri manekeno en tiu vespera robo (la originala verko estas konservata en la Pariza Modvesta Muzeo), mi trovis ĝin vere eleganta, arda kaj plena de juneco. Ĝi ne nur konservas la stilon de la ĉina robo, sed ankaŭ montras la vivecon ofte videblan en la okcidentaj vestoj. Mi supozas, ke tio estas grava kaŭzo por ŝia sukceso.

Ĉe la adiaŭo mi diris al tiu diplomitiĝanta studentino: "Mi esperas kiel eble plej frue vidi vian novan verkon."

Ŝi diris kun rideto: "Mi deziras denove gajni premion en internacia konkurso, sed tio ne estas mia ununura celo. Mi pretas, post diplomitiĝo, fari pli da servoj al la popolo, projekti pli da fasonoj ŝatataj de pli multaj homoj." ■

Originala nupto

Iun tagmezon antaŭ nelonge, promenante ĉe teatro en la urbo Janbjan de Ĝjilin-provinco, mi vidis paron da kore-naciecaj gejunuloj en fotado, la junulino en blanka nupta gazo-kostumo kun ruĝa floro sur la brusto kaj la junulo en eŭropaj vestoj ankaŭ bruste kun ruĝa floro. Evidente, ili estis novaj geedzoj antaŭ nupto. Por koni la geedziĝan moron de kore-nacieco, mi petis de ili permeson al mi ĵurnalisto de Pekino ĉesti ilian nupton. Ili ĝoje

konsentis.

Mi sidiĝis en ilian aŭton. Kvar aŭtoj kun ruĝaj rubandoj malrapide antaŭen kuris laŭ ĉefaj stratoj en la urbo. Ili altiris rigardon de ambaŭflankaj paŝantoj, kiuj ŝajne benus la paron de novaj geedzoj.

La aŭtoj atingis la hejmon de la novedzo, sed la novaj geedzoj ne elaŭtiĝis kaj ŝajne atendis ion. Mi rapide elaŭtiĝis kaj eniris la hejmon de la novedzo por rigardi la ĉambron de la nova paro.

Ekster mia atendo estis nenio en la ĉambro. La mastro diris al mi: Antaŭ la geedziĝo la fianĉo devis doni al sia fianĉino fianĉdonacojn kaj la fianĉino devis prepari la meblojn, litaĵojn kaj vivnecesaĵojn por ilia nova ĉambro kiel sian doton. Tiam mi vidis ŝarĝaŭton ekster la korto, pluraj junuloj malŝarĝis la doton. Post nelonge, oni transportis kaj bone aranĝis la doton en la novan ĉambron. Tiam la mastro aranĝis tablon da festeno meze de la ĉambro.

Tre riĉa estis la nupta festeno, surtable metiĝis diversaj delikataj pladoj, kukoj kaj sukeraĵoj. La plej okulfrapa estis granda kuirita koko fiere staranta en la plado, kun ruĝa kapsiko en la beko. Mi informiĝis de la mastro, ke tiu ĉi plado estas nemankigebla en la nupta festeno de kore-nacieco, ĉar ĝi signifas bonan aŭspicion.

Antaŭ elaŭtiĝo de la novedzino, la gepatroj, pliaĝaj fratoj kaj bofratinoj de la novedzo venis al la aŭto kaj dancis kore-naciecan dancon, por esprimi bonvenon al la nova familiano. Post tio, la novedzo elaŭtiĝis, malfermis la aŭtopordon ĉe la novedzino kaj invitis ŝin elaŭtiĝi. Kiam ŝi montris duonparton de la korpo eksteren, la novedzo ambaŭbrake portis ŝin sur la ruĝan tapiŝon antaŭ la domo kaj gvidis ŝin en la nuptan ĉambron tenante ŝian manon. Tiu moro montris, ke la novedzo estas fortika viro kaj kapablas protekti la novedzinon sekura kaj feliĉa dum ŝia tuta vivo.

Kondukate de la akompanantino, la nova paro eniris en la nuptan ĉambron kaj sidiĝis ĉe festena tablo. Tiam, la mastro

Novedzo portas novedzinon al sia hejmo.



unue invitis la familianojn de la novelzino kaj poste la gastojn rigardi la solenan festenon. La abunda festeno montris la bonvenon de la novelzo al la novelzino kaj aludis, ke la novelzo ne malbone traktos sian edzinon en la venontaj jaroj. En varma huraaado, la novaj geedzoj verŝis vinon unu por la alia kaj tostis. Poste restis nur la novaj geedzoj kaj akompanantino, la aliaj gastoj ĉeestis la festenon respektive en domoj de la najbaroj.


Kiel sola han-nacieca gasto mi ricevis favoran traktadon, ke mi ĉeestis la festenon en alia ĉambro de la mastro, kune kun la familianoj de la novelzino. En la festonado, mi informiĝis, ke en la nupta tago la plej juna frato de la

novelzino devas esti favore traktata, kaj la familio de la novelzo devas ĉiamaniere kontentigi ĉiujn liajn postulojn kaj doni al li ĉion, kion li volas. Li ne povis drinki vinon, sed volis sodakvon, kiun oni ne pretigis. La mastro haste sendis aĉeti ĝin por li. Post manĝado, la mastro donacis al li tornistran, skribilujon, fontoplumon k.a. por lin ĝojigi. Post la nupta festeno, la duflankaj gepatroj venis en la novan ĉambron kaj sidiĝis ĉirkaŭ la novaj geedzoj. Unue, gastoj de la novelzina flanko faris bondezirajn vortojn al la novaj geedzoj, ke ili vivu feliĉe dum la tuta vivo. Ankaŭ la gepatroj de la novelzino admonis, ke la novelzino respektu kaj zorgu la bogepatrojn, respektu kondutu al la pliaĝaj fratoj kaj bofratinoj kaj amu la edzon. Ili

diris ankaŭ al la novelzo: "Ni donas al vi nian filinon, ŝin amu kaj zorgu kaj ŝin ne ofendu." Post kiam finis parolojn la gastoj, parolis ankaŭ la mastro. Fine, antaŭ multaj pliaĝaj familianoj la novaj geedzoj prezentis siajn postulojn kaj esperojn unu al la alia kaj sian devon en la venonta vivo. En ilia varma amika atmosfero kaj gaja rido mi trovis, ke estas en harmonio la du familioj kaj en ĝojo la novaj geedzoj.

Je la hejmvreveno de la familianoj de la novelzino, la mastroj prezentis al ili adiaŭan vinon kaj la novaj geedzoj ekdancis por esprimi adiaŭon. La aliaj amikoj kaj gastoj, precipe la junaj, okazigis amuzan vesperon por la novaj geedzoj. En gaja dancmuziko, oni senĝene dancis ĝis profunda nokto. ■

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Daĉing 2. Ŝjamen 3. Ĉongĉing 4. Gŭangdong-provinco 5. Hebej-provinco
6. Hejlongĝjang-provinco

SOLIDARA KAJ PROGRESA
KUNVENO DE LA ĈINAJ NACIECOJ

Aprile, ĉijare, en Pekino okazis la unua solidara kaj progresita kunveno de la ĉinaj naciecoj por premii avangardajn kolektivojn kaj personojn. La kunvenon ĉeestis reprezentantoj de la 56 naciecoj, 565 kolektivoj kaj 601 personoj estis premiitaj en la kunveno.

Ĝaŭ Zijang, ĝenerala sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, faris en la inaŭguro gravan paroladon kun titolo "Por prosperiĝo de la ĉina nacio!" En sia parolado li asertis, ke ni devas defendi la ŝtatan unuecon, persisti en la nacieca egaleco, nacieca unuiĝo kaj kuna prospero kaj preni ilin kiel la fundamentajn principojn kaj politikon de la Komunista Partio kaj ŝtato en la naciecaj laboroj.

La kunveno estis revuo al la nacieca solidara kaj progresita afero de Ĉinio. Ĝi plene konfirmis, ke la 56 naciecoj de Ĉinio estas unuiĝintaj, defendi la naciencan unuiĝon kaj ŝtatan unuecon estas sankta misio de ĉiuj naciecoj de nia lando kaj fundamenta garantio por nia nacia prospero kaj ŝtata modernigo.

Por elradikigi la malriĉon de la nacimalplimultaj regionoj, la kun-

veno proponis, ke la nacimalplimultaj regionoj devas persisti en la reformado, pordmalferma politiko, plenenergia akcelo de la registaro kaj doni diversajn subtenojn kaj helpon al la regionoj kaj fari pli da bonaj aferoj por la kuna prosperiĝo de ĉiuj naciecoj.

HAJNAN-PROVINCO FONDITA

Laŭ la decido de la Unua Sesio de la 7-a Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio okazinta de la 25-a de marto ĝis la 13-a de aprilo, ĉi-jare, pri nuligo de la administra regiono Hajnan de Ĝuangdong-provinco kaj establo de Hajnan-provinco, la 26-an de aprilo okazis solena fondkunveno de la provinco en la urbo Hajkoŭ. La sidejo de la popola registaro de la provinco estas en Hajkoŭ.

La provinco administras la tutan insulon Hajnan, la insularojjn Ŝjiŝa, Nanŝa, Ĝongŝa k.a.

Tiel Ĉinio havas du insulajn provincojn — Taj'ŭan kaj Hajnan. La Tutlanda Popola Kongreso decidis ankaŭ, ke la provinco Hajnan estu ekonomia speciala regiono, kiu praktikos pordmalferman politikon pli apertan ol tiu en aliaj specialaj distriktoj.

BIEN-MERKATO EN ĈINIO

Ĉinio pluapase malfermas bien-

merkaton. Post kiam oni komencis aŭkcii bienon en Hajkoŭ, Fuĝoŭ kaj Ŝengen, tion faros ankaŭ Ŝji'an kaj Ĉengdu.

En la pasinta longa tempo Ĉinio praktikis politikon senpage uzi la bienon, kio malpliigis la enspezon de bienoj, malordigis la posedantecon de bienoj kaj kaŭzis malŝparon de bienoj. Vizaĝe al tio, Ĉinio deziras ŝanĝi la supre diritan fenomenon en praktiko de la rekompensa uzado de bienoj en difinita tempo.

Antaŭ ĉio oni malfermas la bien-merkaton monopoligitan de la registaro. La bona prezo estas difinita per konsiliĝo, aŭkcio aŭ adjudiko, samtempe oni malfermas bien-merkaton inter la bienuzantoj, permesas laŭvole cedi la teron antaŭ la tempolimo kaj la prezo decidiĝas de interkonsento de la vendanto kaj aĉetanto. En la bien-merkato la ŝanco estas egala al la ĉinoj kaj eksterlandanoj. Ĉiuj alilandaj entreprenoj kaj individuoj kun identeco de la leĝa persono povas partopreni en adjudiko kaj aŭkcio de bienoj.

AGRIKULTURA MEKANIZADO DE ĈINIO

En 1987 aperis bona situacio de agrikultura mekanizado de Ĉinio nevidita dum la pasintaj jaroj. Tiujare la ĉinaj kamparanoj

Kunvenantoj





Teknikisto instruas kiel uzi semmaŝinon.



Ĝaŭ Ĝanggŭang, estro de la Pekina Harpanacea Fabriko

elspezis 8.497 miliardojn da jŭanoj por aĉeti agrikulturajn maŝinojn, pli multe ol tiu en 1986 je 1.3 miliardoj da jŭanoj. Ĝis la fino de 1987 la totala valoro de agrikulturaj maŝinoj de Ĉinio atingis 70 miliardojn da jŭanoj. Ĉiu hektaro da agro meznombro posedis agrikulturajn maŝinojn de 730 jŭanoj.

Kun plimultiĝo de la agrikulturaj maŝinoj multe leviĝis la kvanto de maŝina kamplaboro. En 1987 oni per maŝinoj plugis 41 800 mil hektarojn da agro, je 1 800 mil hektaroj pli multe ol tiu en 1986. En 1987 oni per maŝinoj semis sur 15 670 mil hektaroj da agro, je 12.9% pli multe ol tiu en 1986. Tiujare oni faris maŝinan rikolton sur 6 530 mil hektaroj da agro, je 13% pli multe ol tiu en 1986.

LABORLINIO DE FLOSA VITRO EKfunkciigita en Ŝanhajo

La plej granda entrepreno kune investita de Ĉinio kaj Britio — laborlinio de flosa vitro komencis produktadon en Ŝanhajo. Tio markis ke la vitro-produkta tekniko de Ĉinio atingis la mondan nivelon.

La totala kapitalo de tiu entrepreno estas 430 milionoj da jŭanoj. La fabriksdomoj kun 54

apartaj konstruoj havas totalan areon de 120 mil kvadrataj metroj. El la enkondukita kompleto da ekipaĵoj la vitrofandujo povas produkti 5 000 tunojn da vitra fandaĵo ĉiusemajne. Ĝi estas unu el la plej grandaj vitrofandujoj en la mondo kaj produktas 200 mil tunojn da vitro ĉiujare. Ĝi povas produkti vitron de 2 mm ĝis 25 mm dikan.

Ekde la 27-a de decembro, 1987, kiam ĝi komencis sian provproduktadon, ĝiaj produktaĵoj jam vendiĝas en multaj lokoj de Ĉinio kaj Japanio kaj en Hongkongo.

ĈINAJ INVENTISTOJ PREMIITAJ EKSTERLANDE

Ĉinaj inventistoj ricevis 18 medalojn kaj unu pokalon en la 16-a Ĝeneva Internacia Ekspozicio de Inventoj kaj Novaj Teknikoj.

En tiu ĉi ekspozicio vidiĝis 20 ĉinaj inventoj. "101 Harpanaceo" kun marko Ĝanggŭang ricevis la oran medalon de invento kaj "Oskaron de 1988". Nova antisepta kaj antifiodora fibro kaj ĝia teksaĵo estis premiitaj per ora medalo kaj Sanprotekta Pokalo donacita de la Ĉina Inventa Asocio. La serio de ginseng-aj produktaĵoj de Ŝinkajhe,

Ĉangbaj-montaro, estis premiita per ora medalo kaj aliaj 14 ĉinaj inventistoj ricevis orumitan, arĝentan kaj kupran medalojn.

La granda premio de la ekspozicio estis donita al franca inventisto. La de li inventita rulseĝo povas helpi kriplulojn vivi normale.

EKSPERIMENTA BESTA SISTEMO FONDITA EN ĈINIO

Ĉinio jam fondis sian semtenejon de eksperimentaj bestoj kun dekoj da rasoj de eksperimentaj bestoj, inkl. de pli ol 50 rasoj de grandaj kaj malgrandaj musoj.

3 rasoj de musoj, kulturitaj de Ĉinio, jam estas envicigitaj en la mondan nomliston de endogamiaj musoj, ili povas esti uzataj en esplorado de leŭkemio, diabelo, hepata kancero kaj aliaj tumoroj.

Eksperimenta biologio estas nova scienco aperinta en la nuna epoko, kiu jam fariĝis unu el la kriterioj por juĝi la scienc-teknikan nivelon de lando.

Nun en nia lando fondiĝis ĉ. cent scienc-esploraj institucioj, produktaĵoj de eksperimentaj bestoj kaj laboratorioj kaj krome fondiĝis ankaŭ kontrola sistemo de mikrobiologio, parazitologio, genetiko, nutrologio, ekologia

medio al la kvalito de la eksperimentaj bestoj. Dank' al tio oni povas fari radian diagnozon pri bakteriaj kaj virusaj malsanoj kaj parazitozoj.

Koncerne la aplikadon Ĉinio havas pli ol 50 modelojn de tumoroj de eksperimentaj bestoj, inkl. tiujn de pulma, hepata kaj mama kancero, limfomo kaj fibromo.

En la fino de 1987 Ĉinio partoprenis Internacian Scienc-komisionon pri Eksperimentaj Bestoj.

4 MONDAJ REKORDOJ ROMPITAJ DE ĈINAJ SPORTISTOJ

Maje en la Internacia Naĝil-naĝa Turniro, Pekino, du ĉinaj sportistinoj 6-foje rompjis 4 mondajn rekordojn. Ĉinio gajnis 9 orajn medalojn entute. La ĉinaj virina kaj vira teamoj gajnis la 2-an kaj la 3-an lokojn respektive.

La 19-jara ĉina sportistino Ĝeng Ŝiju rompjis 3 mondajn rekordojn. En la virina prepara 100-metra mergado ŝi per 39''25 rompjis la mondan rekordon (39''55). En la 50-metra subakva apnea naĝado ŝi per 17''34 rompjis la mondan rekordon (17''63). En la 100-metra naĝil-naĝo ŝi per 42''87 rompjis la mondan rekordon (42''94). Ĉina sportistino Li Hajŝin en la 400-metra mergado per 3'14''35 rompjis la mondan rekordon (3'16''20).

La aliaj 12 oraj medaloj estis gajnitaj senescepte de sovetuniaj sportistoj. La sovetunia teamo gajnis la unuan lokon per 904 poentoj entute. La Itala, Hungara kaj Sveda Teamoj gajnis la 4-an, 5-an kaj 6-an lokojn respektive.

HISTORIAJ OBJEKTOJ DE TIBETO EKSPONITAJ EN PEKINO

Post la pentraĵa kaj kultura ekspozicioj de Tibeto, historiaj objektoj de Tibeto ekspoziciis en Pekino. En la ekspozicio vidiĝis pli ol 300 valoraj objektoj, pli ol 200

bildoj kaj granda nombro da skribaj materialoj. La ekspozicio konigis: Jam antaŭ 40-50 mil jaroj aktivadis homoj en Tibeto. Antaŭ 4-5 mil jaroj la prapatroj de la tibet-naciecanoj jam vivis en primitiva grupo sur tiu bela kaj riĉa tero.

En la 6-7-a jc., la naskiĝo de Tubo-reĝimo markis, ke Tibeto jam eniris en sklavan socion. En la 13-a jc., ĝi eniris en la feŭdan socion, kaj ĝis 1959 ĝi ĉiam tenis la servutan sistemon kun regpotenco kaj religio en kombino. Tibeto estis pace liberigita en 1951 kaj poste faris demokratian reformadon, abolis la servutan sistemon kaj eniris en la socialisman socion.

La ekspozicio montris, ke la tibeta historio estas tiu de la tibeta popolo kun la tibet-naciecanoj kiel la ĉefa parto. Ĝi montris ankaŭ la intiman rilaton inter Tibeto kaj aliaj lokoj de Ĉinio. Meze de la 13-a jc. mongoloj unuigis Ĉinion kaj fondis Ĵuan-dinastion, kio finis la pli-ol-400-jaran splitiĝon de Tibeto kaj de tiam Tibeto oficiale fariĝis parto de Ĉinio. Dum la pasintaj pli ol 700 jaroj ĉiuj centraj registaroj de Ĉinio praktikis plenan suverenecon en Tibeto. En la lasta epoko imperiistoj entrudiĝis en Tibeton kaj subtenate de la tuta ĉina popolo, la tibetanoj faris heroan batalon kontraŭ la imperiista agresado, venkis ilian intrigon spliti nian landon kaj defendis la unuecon de Ĉinio.

PEKINA KOSTUMA INSTITUTO FONDITA

La unua landskala kostuma instituto de Ĉinio, Pekina Kostuma Instituto, fondiĝis en Pekino la 10-an de majo. Ĝi estas destinita por sisteme kulturi ĉinajn vestofarantojn kaj aktive fari vastan kontaktiĝon kun alilandaj kostumaj fakuloj.


La instituto havas 6 fakultatojn, inkl. de vesta kaj metiarta fakultatoj. Ĝi fariĝos sinteza

lernejo, kiu instruas, kun kostumoj kiel la ĉefa parto surbaze de la scienco pri fibraj materialoj, ankaŭ arton, teknikon kaj ekonomian administradon.

VALOREGAJ PORCELANAĴOJ ELTERIGITAJ EN ĜINGDEĜEN

La koloraj porcelanaĵoj reprezentataj de *doŭcaj*, produktitaj en Ĉenghŭa-erao (1465-1487) de Ming-dinastio, estas senprecedencaj majstroverkoj en la historio de la ĉina porcelana historio, tamen nun vidiĝas malofte. Antaŭ nelonge en Ĝingdeĝen, Ĝjangŝi-provinco, elteriĝis nombro da porcelanaĵaj pecoj, el kiuj oni riparis pli ol 200 porcelanaĵojn Ĉenghŭa-ajn, el kiuj estas 50 malsamaj porcelanaĵoj, kiaj *doŭcaj*-aj porcelanaĵoj kun subglazuraj bluaj desegnoj kaj surglazuraj koloraj desegnoj, delikataj porcelanaĵoj kun bluaj desegnoj, bluaj porcelanaĵoj imitaj al tiuj faritaj en Ĵu-bakujo de Song-dinastio kaj Ge-bakujo de Longĉjŭan en Song-dinastio. La malkovro estas grava en la porcelana arkeologia historio en la lastaj 40 jaroj.

Porcelanaĵoj de Ming-dinastio (1368-1644) elterigitaj en Ĝingdeĝen



La Budhosunuma Festo

Fotoj de CAJ HAJFENG



Rigardo de buteraj budhostatuoj kaj floroj


En la Ganan-a Tibet-nacieca Aŭtonoma Subprovinco, Gansu, nordokcidenta Ĉinio, estas Ŝjahe-gubernio, kie staras la fama Labuleng-templo, unu el la ses ĉefaj temploj de Gelu-sekto de lamaismo. Laŭ tradicia moro, ĉiujare de la 13-a ĝis la 16-a de la unua monato laŭ la luna kalendaro okazas en la templo la solena Budhosunuma Festo. Krom tieaj loĝantoj, ĝin partoprenas ankaŭ multaj tibet-naciecanoj kaj bonzoj el Ĉinghaj, Siĉuan kaj Tibeto.

En la budhosunuma tago lamaoj portas tolan portreton de Ŝakjamunio longan ĉ. 50 metrojn kaj larĝan ĉ. 20 metrojn al la montodeklivo apud la templo kaj ĝin sternas. Post recito de sutro iu viva budho malrapide deprenas flavan tukon de sur la portreto en akompano de muziko, tiam oni kriante genuiĝas antaŭ la portreto.

En la aliaj tagoj oni dancas kaj prezentas buterflorojn. Lamaoj en maskoj bluaj, flavaj kaj blankaj dancas laŭ forta ritmo de religia muziko. Vespere oni prezentas buterflorojn en formoj de diversaj homaj kaj bestaj figuroj kaj diversaj objektoj. La buterfloroj impone brilas sub sennombraj buterlampoj.

Dancado





En la Budhosunuma
Festo



FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ

**Pejzaĝoj de Rana-inter-
monto en Rumanio**

de Nagy Akos (Rumanio)

